Gyula Hernádi

La fortreso

Hungaria Esperanto-Asocio
2026

e-libro HEA

Gyula Hernádi

La fortreso

Romano

Hungaria Esperanto-Asocio
Budapeŝto 2026

Originala titolo: Az erőd
Eldonis: Szépirodalmi Könyvkiadó, Budapest, 1971

Tradukis el la hungara originalo: Jozefo Horvath

Eldonis: Hungaria Esperanto-Asocio, 2026

kun la kompleza permeso de la rajtoheredantoj
Ilona Hernádi kaj Krisztina Hernádi
en la jaro de la centa naskiĝ-datreveno de la aŭtoro.

Kiadta: a Magyarországi Eszperantó Szövetség, 2026

a jogörökösök, Hernádi Ilona és Hernádi Krisztina
szíves engedélyével
a szerző születési évfordulójának századik évében

Titolpaĝo: Jozefo Horvath
Sceno el la filmo *Az erőd* de Miklós Szinetár

ISBN 978-963-571-529-9

@Horváth József 2026

e-libro HEA

1

Malhelblua Porsche 907 proksimiĝas al la ponto, kondukanta al la monto Metarkos. Ĝi bremsas kaj haltas antaŭ la ponto, rande de la betonvojo, laŭiranta pinarbaron. Du viroj sidas sur la antaŭsidiloj. La stiranto reklinas sin al la dorsapogilo de la cervolede tegita seĝo, turnas sin al sia najbaro:

– Mi kredas, post la monto... – li komencas malrapide.

– Mi prenos la mapon, ni rigardu!

– Ne necesas. Arĝenta kolono staras meze de la urbo.

– Mi ne komprenas.

– Skulptaĵo.

– Kia skulptaĵo?

– En la regiono troviĝas multaj ĉevalbredistoj, oni faris ĝin pri ĉevaloj.

– Ĉu vere? Ĉu vi jam pasis tie?

– Refoje mi ne diros, hieraŭ vespere mi ja rakontis.

– Mi ne memoras, mi ebriis.

– Nenio perdita. Ĉu vi scias mian nomon?

– Ne.

– Tamen vi sidiĝis en mia aŭto.

– Kial ne sidiĝi? Vi stiras bone.

– Mi povus vin mortigi.

– Mi pli fortas ol vi.

– Ĉu vi havas pistolon?

– Jes, tri.

– Mi kvar.

– Tro multe.

– Pro kio, kiel vi uzas la trian?

– Mi ne uzas ĝin. Samtempe mi manipulas nur du.

– Kiaj ili estas?

– Du Walter, unu Browning. Kaj vi, ĉu vi scias mian nomon?

– Vi estas Francisko Kolhaus. Cetere vi estis ankoraŭ sobra, kiam ni prezentis nin reciproke.

– Cetere mi povus diveni vian nomon.

– Kiel?

– Mi citus el libro – respondas Kolhaus.

– Citu!

– Neniam oni povas tute certi, ĉu temas pri malamiko aŭ nur fuĝinto, reveninta nur pro forgesita dentopasto aŭ io simila. Ĉio ĉi ne scieblas, do ĉiuokaze oni pafu senplie.

– Vi havas bonan memorkapablon.

– Mi memoros pli, se vi volas.

– Ĉu?

– Pridemandado. Se oni pridemandas iun, oni trabatu lin, alie li diros nenion gravan. Kaj se li fine pepas, li konsideriĝas renversulo, do staranta eksterleĝe, kiun oni devas mortigi. Tute nature. Inter normalaj cirkonstancoj oni ne prenas kaptitojn, kaj se jes, oni fortranĉu pecojn de li. Unue la dekstran piedon, poste la maldekstran.

– Do tamen vi ne tiom ebriis?

– Ŝajnas tiel.

– Ĉu vi scias ankaŭ, ke Kortena situas trans la monto?

– Mi scias – respondas Kolhaus.

– Vi sekretumis, por ke mi vidu, kiom vi taŭgas?

– Povas esti.

– Se vi scias mian nomon, vi devus scii ankaŭ, ke mi konas ĉiujn.

– Ĉu ĉiujn? – demandas Kolhaus.

– Al la taĉmento 43 apartenis du amerikanoj, Kower kaj Ziegler.

– Kiel precize vi scias!

– Tshombe[1] konsultis min fojfoje, kiun nomumi komandanto.

– Ĉu rekomendis min vi? – demandas Kolhaus.

– Jes.

– Kial?

– Plaĉis al mi tiu filmafero via.

– Kiu? – miras Kolhaus.

– Ĉu estis pluraj?

– Oni filmadis min sufiĉe ofte.

– Kiam vi mortpafis la kaptitojn antaŭ la kameraoj.

– Tiun mi ne partoprenis – diras Kolhaus.

– Ne modestumu!

– Vere. Ĝuste tiutage mi devis veturi al Sala.

– Kiu pafis?

– Mi ne scias. Kiam la gazetoj komencis pritrakti la temon, mi provis rekonstrui la tuton, sed koncerne la esencon, neniu povis informi min. Mi scias, kiel Jakoro laboras, li estas bona reĝisoro, eble li instigis iun tie: “Vidu, jen homo mortpafota, bonvolu starigi lin iom maldekstren, tie pli sunas”. Jen kio povis okazi.

– Mi kredis, ankaŭ vi kunagis.

– Oni akuzadis min, ja mi estis la komandanto. Sed ankaŭ mi havis filmaferon.

– Kion vi faris?

– Se ni enmarŝis vilaĝon, mi elserĉigis la tribestron, lian plej belan edzinon, kaj devigis ilin roli kiel Napoleono kaj Jozefino. Ni volvis mantelon ĉirkaŭ ilin, surkapigis al ili kronon, elpelis la loĝantojn sur la placon. Jozefino publike senvestigis Napoleonon, poste vipis lin. Ni filmis, fotis ĉion, pendigis la pretajn fotojn sur fosto meze de la placo kun la averto: mortos, kiu deprenos ilin. Revenante ni trovis novajn tribestrojn en la vizititaj vilaĝoj. Ni demandis, kie troviĝas la genapoleonoj. Oni respondis: ni ne scias. Sed la fotoj restis sur la fostoj…

– Sprite. Certe ili kaŝis sin.

– Ne, estis mortigitaj – diras Kolhaus.

– De kie vi scias?

– Mi ekzamenis la fotojn, la kapoj sur ĉiuj estis trapikitaj.

– Ĉu sur la fotoj?

– Jes.

– Ĉu vi retrovis la farintojn?

– Sufiĉe malfacile, sed fine mi iĝis scivolega, do mi igis trabati kelkajn infanojn, kaj ili rakontis, ke oni ekzekutis la virinon kaj la viron, trapikis al ĉiu la kapon. El ilia haŭto oni faris vipon, ekde tiam la viroj draŝas per ĝi la virinojn. Ĉiusemajne dufoje ili trabatas ĉiujn. La tribestro komencas, la aliaj daŭrigas laŭ rangordo. Vi vidos, jam post dek jaroj ili faros kulton el tio. Mi donis al ili mitologion. La scienculoj trovos belajn klarigojn pri la kialoj kaj kieloj, kaj min rido skuos proe.

– Aŭ vi malkaŝos la aferon.

– Ideo ne malbona. Nur la tempo devas esti retroŝovita. Mil okcent sepdek kvin konvenus – diras Kolhaus ridetante.

– Tiam fotoj ankoraŭ ne ekzistis.

– Jes ja. La eksponado pli longis, sed vekis pli da miro.

– Ĉu vi scias, ankaŭ birdoj havas mitologion?

– Ne ŝercu!

– Serioze mi parolas. Mi aŭdis pri tio en Johanesburgo. Mi postspuris, priserĉis. Neniu kredas min, tial mi ĉiam kunportas la raporton. Jen ĝi. Ĉu mi voĉlegu ĝin?

– Legu ĝin! – konsentas Kolhaus.

– La titolo estas: „Psikologio”. Ĉu vi atentas min?

– Eku! – diras Kolhaus ridante.

– Je Pasko en Fo oni inaŭguris la ŝoseon al Dorkrad, la plej modernan aŭtovojon de Sudafrika Unio, eĉ de la tuta kontinento. La ĉefministro distingis la konstruintojn, kaj sidiĝinte en sia aŭto, dum du horoj li traveturis la dukilometran vojon laŭ la marbordo.

Sur la larĝa trotuaro laŭanta la vojon staris jubilantaj civitanoj, vivuis, ŝutis florojn al la aŭto kaj la ĉefministro. De la maro blovis milda vento, flirtigis la rubandojn en la haroj de la knabinoj kaj la albojn de vilaĝaj paroĥestroj.

La solenaĵo finiĝis, la trotuaro senhomiĝis. Aŭtoj preterbruis inter la plastaj kilometrofostoj, starigitaj ambaŭflanke de la aŭtovojo.

Frumatene, la 23an de aŭgusto, proksime al la kilometrofosto 63, sur la laŭtrotuara herbostrio oni trovis renversitan aŭton. Ĝi estis komplete frakasita, la kvar pasaĝeroj akcidente mortintaj.

La enketado venis al mortopunkto, la policaj organoj fermis la protokolon kun la supozo, ke la la akcidento estis kaŭzita probable de la subita misfarto de la stiranta familiestro.

Frumatene, la 24an de aŭgusto oni trovis du frakasitajn aŭtojn, je kvarcent metroj for de la kilometrofosto 63, je tridek kvin metroj for de la vojrando. Restis vivanta nur unu pasaĝero, juna virino. Ŝi rakontis, ke ŝi sentis nenion, dum sekundero ĉesis ĉio ĉirkaŭe kaj ene, ŝi rekonsciiĝis nur sur la hospitala lito.

La polico esploris la akcidentejon kaj konstatis, ambaŭ aŭtoj ekgiris, kaj suprensaltinte refrapiĝis sur la asfalton; supozeble ili ekglitis sur oleo elfluinta el aŭtoj, trapasintaj tie, kvankam ĉirkaŭe videblis nur sporadaj olespuroj.

La 25an de aŭgusto policanoj denove trovis renversitan, frakasitan aŭton proksime al la kilometrofosto 63. La du pasaĝeroj ne plu savebliis.

Nun oni jam serioze ĉirkaŭesploris. Trairis la danĝeran vojsekcion, traesploris ĉiun kvadratan metron. Okulfrapis, ke malplenaj konkoj rompitaj diskuŝas sur la asfalto.

Oni sendis la radojn de la frakasitaj aŭtoj en laboratorion; la ekspertoj konstatis, ekskludante ĉiun dubon: sur la pneŭoj gluiĝis konkopecetoj, la aŭtoj ekglitis sur la konk-eroj.

Oni starigis tabulojn „Veturu malrapide!” ambaŭflanke de la danĝera vojsekcio, postlasis surloke junan detektivon, por kaŝobservi, kiu metas konkojn sur la asfalton. Oni suspektis infanojn.

Posttagmeze okazis nenio. Nokte la detektivo kuŝiĝis sur la kampo, atendadis. Flanke de la maro li aŭdis nekutime akrajn birdoŝrikojn, dikaj lumfaskoj de aŭtoj proksimiĝadis kaj foriĝadis kun granda rapideco, poste iĝis silento.

Neatendite laŭta frapiĝo aŭdiĝis el la direkto de la vojo. La detektivo rampis singarde, malrapide en la direkto de la bruo, kuŝiĝis vojrande, orelumis.

Aŭdiĝis ĉiam pli da pluglitantaj frapiĝoj, flugilsusurado, mevokrioj, skrapado, poste denove flugilsusurado.

La detektivo rampis ĝis la vojmezo.

Brilaj, malplenaj konkoj kovris ĝisrande la asfalton. Li rompis branĉeton, forbalais la glitigaĵojn de sur la vojo.

Matene alvenis la deĵoranta oficiro. La detektivo raportis al li pri siaj noktaj spertoj. „S-ro inspektoro, la konkojn alportas mevoj. Portas ilin enbeke, lasas ilin fali sur la asfalton, el la rompitaĵoj elbekas la molaĵon kaj postlasas la konkopecojn. Ĉi tiu vojkoridoro plej proksimas al la maro, ĉi tien la flugo plej mallongas. Tio evidentiĝis al ili. Ĉi-nokte jamis multaj konkoj, morgaŭ pli multos.” „Mi ne sciis, ke ankaŭ mevoj

estas inteligentaj bestoj” – miris la oficiro. „Ĉiuj bestoj estas inteligentaj.” „Sed ĉu tiom?” „La vojo blankas, videblas de malproksime.” „Eĉ tiam.” „Io farendus.” „Mi konsultos prie” – diris la oficiro.

Oni vokis ekspertojn, zoopsikologojn al la loko.

La trian tagon aperis seriozmiena, eleganta junulo kun du laboristoj ĉe la kilometrofosto 63.

Li demetis sian kitelon, eltekigis longan, blankan kreton, genuiĝis vojmeze, kaj malrapide, raŭpire desegnis ĉirkaŭ si grandegan, dek metrojn longan mevon. La flugiloj de la birdego etendiĝis ĝis la herba vojbordero. La unuan li desegnis apud la kilometrofosto 63, poste ankoraŭ dudek kvar, laŭlonge de la danĝera laŭmara vojsekcio.

La laboristoj ŝutis blankan farbopulvoron en sitelojn, solvis ĝin kaj tiris larĝajn, brilajn striojn per siaj penikoj laŭ la kretaj linioj.

Vespere la desegnoj komencis lumi, la fosforeskantaj birdegoj videblis defore.

Dum unu semajno ĉio reordiĝis, la aŭtoj ne glitadis, la mevoj forrestis.

Nokte, la 10an de septembro advokato Konden bremsis sian aŭton, proksimiĝante al la famaj lumbirdoj. Li pasis paŝrapide.

Li surveturis la unuan desegnon. La aŭtomobilo skusaltis. Konden haltigis ĝin, prenis poŝlampon, elaŭtiĝis, reiris al la desegno.

Inter la fosforeskantaj flugiloj kuŝis senvivaj mevoj en strikta sinsekvo tra la vojo. Konden ektimis, rekuris al la aŭto, pluveturis.

La aŭto skusaltadis ĉe ĉiu lumanta birdo.

Sekvatage vojflegaj laboristoj venis, kolektis la plurcent senmovajn mevojn, enterigis ilin sur la marbordo.

La tutan nokton de la 11a policistoj observadis la ĉirkaŭaĵon de la kilometrofosto 63.

Ili aŭdis nenion, okazis nenio.

La 12an de septembro ili forlavis la pentritajn birdojn de sur la vojo.

Ekde tiam forestas trafikobstakloj sur la vojo al Dorkrad, ne plu videblas mevoj; la aŭtistoj tamen forlasas la vojon ĉe la kilometrofosto 63, traveturas la dukilometran apudmaran vojon sur malglata, herb-

eca ebenaĵo, kaj nur inter la montetoj revenas sur la asfalton. Jen la rakonto, kiel vi opinias pri ĝi?

– Stultaĵo, oni mensogas – opinias Kolhaus.

– Vi ne pravas, mi parolis kun iu, kiu vidis tion.

– Kiom vi pagis al li?

– Ĉu vi vere ne kredas?

– Ne. Birdoj flugas, poste aŭ falas, aŭ ne. Eble ili kontraŭflugis aviadilon.

– La ĵurnaloj plenplenis prie.

– Ĉu mi klarigu al vi, kion signifas, ke ĵurnaloj plenplenas pri io?

– Kial vi ne kredas?

– Mi havas dudek tiajn rakontojn, sed ankoraŭ ne enkapiĝis al mi, kredi ilin – diras Kolhaus ridetante.

– Vi ne havas tian rakonton.

– Mi ne volis fabeli, sed vi devigas min per ĉi tiu gravmienado. Ankaŭ mi kunportas raportojn, mi same povas voĉlegi iun.

– Ne misŝercu, ĉu vere vi kunhavas tiajn?

Kolhaus levas sian tekon de apud la sidilo, elprenas dosieron, trafoliumas la gazeteltondojn, ellevas iun, komencas ĝin legi:

– La nomo de la arkipelago Midono, preskaŭ nevidebla en la senfina akvaro de la Pacifika Oceano, menciiĝas malofte en la gazetaro. En la unua duono de la Dua Mondmilito granda ŝipbatalo okazis proksime al ĝi inter la japana kaj usona militflotoj, el kiuj ĉi lasta elvenis forte malpliigita. Lastafoje oni povis legi pri Midono, kiam la spackajuto de Gordon Cooper descendis proksime al la insularo sur la surfacon de la oceano.

Sed la atolaro famas ankaŭ pro io alia. La usona mararmeo konstruadis ekde 1945 gravajn militbazojn en ĉi tiu regiono. Sed ekde kelkaj jaroj la ekzisto de la kostege konstruitaj bazoj iĝis akre problema. Kio minacas ilin? Escepte ne la elemente forta protesto de la loka loĝantaro, ĉar la Midon-insuloj estis origine neloĝataj, krom usonaj soldatoj ankaŭ nun neniu restadas tie.

Ĉi-okaze la usona mararmeo ekhavis zorgojn pro birdoj. Malfortune por ĝi, ankaŭ iu specio de albatrosoj elektis sia bazo – Dio scias, an-

taŭ kiom da jarcentoj – la dezertajn insulojn, kaj ĉi tiuj „praloĝantoj” serioze endanĝerigas la bazojn malgraŭ sia origine pacema naturo.

Ilia nombro takseblas je tridek mil, kaj ili ne malofte paralizas la trafikon de la aerodromoj. Ili konstruas siajn nestojn sur hangaroj, municiejoj kaj kerosen-cisternoj, eĉ sur kontraŭaviadilaj kanonoj. La de- kaj alteriĝo de aviadiloj prezentas por la birdoj unuaklasan sensacion, „honore” al kiu ili are leviĝas en la aeron. Kaj tio – precipe por fuzaviadiloj – kaŝas en si grandan danĝeron kaj iĝis nun jam kaŭzo de pluraj akcidentoj.

La komandantaro eksperimentis unue per birdotimigiloj. Enuantaj ideoriĉaj soldatoj memfabrikis ĉifonfigurojn, vidante kiujn eĉ Frankenstein[2] terurmortus. Sed koncerne la albatrosojn, la rezulto evidentiĝis seniluziiga. Ili ariĝis ja entuziasme ĉirkaŭ la timigiloj, kaj konstatinte, ke ties pajlo kaj tekstilaĵo bone taŭgas por nestofarado, ili disbekadis la ĉifonfigurojn.

La dua ofensivo, bruligo de radbendoj, restis same senefika. Dum la homoj svenetis pro la infera odoraĉo, la albatrosoj ripozis indiferente en siaj nestoj.

La sekvo de kvinminuta salvo el ĉiuj pafarmiloj de la militbazo estis, ke la birdoj nestantaj sur la proksimaj insuloj – albatrosoj ja laŭnature tre scivolemas – are tumultiĝis al la loko.

Simila sekvo rezultis el disaŭdigo de diversaj bestaj kaj birdaj voĉoj tra megafonoj: la birdoj videble plezuriĝis pri Ia orelmurda kakofonio.

Tiam la alta komandantaro decidis ilian transloĝigon. Ferminte en kaĝoj, ses mil albatrosojn oni transportis en aviadiloj al Aleutoj, malproksimaj je kvar mil kilometroj kaj parte al Filipinoj, situantaj je dekmil-kilometra distanco. Sed la birdoj markitaj per ringoj, jam post unu semajno komencis reflugadi, kaj post du monatoj ankaŭ la deportitaj al Filipinoj revenis; eĉ, ili venigis kun si novajn.

Fine naskiĝis kruela ordono: la albatrosoj devas esti ekstermitaj. Ne facilis instigi la soldatojn ke, armitaj per ferstangoj, ili mortfrapu la birdojn, pace ripozantajn en siaj nestoj.

Kaj la albatrosoj – kvazaŭ fine kompreninte la danĝeron embuskantan ilin – nun ne plu descendas, nur rondflugadas super la insulo,

kaj per tio ĝenas pli, ol iam la aertrafikon. Kiel vi opinias pri la rakonto!

– Ne tiom nervostreĉa, kiom la mia.

– La epilogon mi ankoraŭ ne rakontis.

– Kio do ĝi estas!

– La usonanoj ne plu povis labori, deviĝis malinstali la bazon. Dum la birdoj rondflugadis super la insulo, oni forportis ĉion. La novan bazon oni instalis kvin mil kilometrojn for de tie. Iu kapitano ŝipis post duonjaro preter Midono; scivolis, kio novas pri la birdoj. Li eliris, ĉirkaŭrigardis. Eĉ unu birdon li ne trovis sur la insulo. La tuta malplenis, eĉ la nestoj ne plu videblis. La birdoj restis nur, ĝis ili forpelis la soldatojn kaj aviadilojn. Neniu scias, kien ili formigris.

– Jen tiel pli interese. Kial ili faris tion laŭ vi?

– Hazarde. Ili tediĝis de la rondflugado – respondas Kolhaus.

– Ne povas esti hazardo.

– Min ne interesas, mi fajfas pri birdoj. Mi havas sufiĉe da zorgoj – pro homoj.

– Do kial vi kunportadas la artikolon?

– Mi eltondas ĉiuspecajn kuriozaĵojn. Ekde pri la mortinta anglo, kiu vekiĝis en ĉerko kaj komencis kanti, ĝis tiu franca admiralo, kiu ordeniĝis karmelano post la milito, ĉar li volis pentofari. Mi kolektas kuriozaĵojn. Ankaŭ ĉi tiu birdafero estas kuriozaĵo, tial mi konservis ĝin. Eblas, ke ĝi ne veras. Bone ni satbabilis ĉi tie, antaŭ la ponto. Ĉu ni ne devus eki? Ni ne alvenos ĝis vespero.

– Ni proksimas.

– Ĉu vi jam parolis kun la virino? – demandas Kolhaus.

– Jes, ankoraŭ en Ateno.

– Ĉu bona virino?

– Maljuneta, ĉirkaŭ kvindek, tamen ankoraŭ bona.

– Ĉu pri mono vi babilis?

– Ĉefe pri ĝi.

– Kaj kio? – interesiĝas Kolhaus.

– Ĝi dependas de tio, kiom da servojaroj vi povas dokumenti.

– Ĉu ĉio enkalkuliĝas?

– Kion vi komprenas sub „ĉio”? Enkalkuliĝas, kio estis post la milito.

– Mi instruktoris ekzemple du jarojn en Riado – diras Kolhaus.

– Mi scias.

– De kiu diablo?

– La virino komisiis al mi la organizadon, la paperoj de la kandidatoj troviĝas ĉe mi. Mi malkaŝas al vi, ni ja kamaradas, privata detektivo el Kairo skribis pri vi, ke el Kongo vi kunportis bolpreparitajn kraniojn en Riadon, faris lampojn el ili, kiuj nun pendas en via ĉambro,

– Malsaĝaĵo, mi bolpreparis neniajn kraniojn. Ĵurnalistoj stultumis ĉirkaŭ ni, kaj leŭtenanto Moles lavis la kraniojn de kelkaj mortintoj, kiam insektoj kaj vermoj traronĝis ilin, sed ne veras, ke li purboligis ilin. Kompreneble, la lavado estis bona cirko por la ĵurnalistoj, ili ankaŭ fotis Moles. Sed ili faris ĉi tiujn bildojn, ne ĉar la kranioj interesis Moles, ili absolute ne interesis lin, simple: la ĵurnalistoj volis kunporti kelkajn suvenire. La leŭtenanto ne purboligis ilin, nur trempis en sapakvon kaj purigis ilin. Jen ĉio. Kiam tiuj envenis la tranoktejon, ili kunportis la kapojn, ŝovitajn sur rostostangojn, ridadis, ŝercadis. Iu ĵurnalisto venis al mi: „Jen al vi, kapitano Kolhaus, ankaŭ al vi ni portis unu." Per tio li transdonis al mi kapon, kaj mi metis ĝin sur florstablon, kaj lasis ĝin kuŝi sur la sama loko. Poste Moles envolvis en mian bluan plejdon kaj metis ĝin en mian keston. Mi restigis tie, ne hejmenportis ĝin. Idiotaĵojn ili volas atribui al mi, tiuj merduloj.

– Ne gravas. La ulo ne sciis, kial oni petas de li enketadon. Se nenion malbonan li elfosas, li pruviĝas malbona detektivo. Li kredis, estas misfamige, kion li skribas. Li ne sciis, ke mi konas vin jam el Kongo, kaj ankaŭ ne, ke por mi, via estonta komandanto, la letero egalas al laŭdo.

– Kiel nomiĝas la virino? – demandas Kolhaus,

– S-ino Niĥarĥos. Por mi Edit.

– Ĉu grekino?

– Grekino. Ĉio estas ideo ŝia. Ŝia kapo ne malplenas.

– Kaj la mono? – demandas Kolhaus.

– Ĉu vi legis *La modema soldulo*?

– Ĉiuj legis ĝin.

– Do vi memoras la salajran etaton. Horizontale: jaroj de servado,

vertikale: postenoj.

– Kiomas la postenoj? – demandas Kolhaus.

– Kvin. Batalanto, grupestro, plotonestro, rotestro, komandanto. Esceptokaze estas ankaŭ regimentestro, sed por tio necesas granda lando.

– La komandanto direktas ĉion.

– Li havas elstaran soldon, aparte li interkonsentiĝas pri tio kun la dunganto. Kiom da servojaroj vi havas?

– Dudek tri. Tuj post la milito, en septembro de kvardek kvin mi dungiĝis en la legio, ekde tiam mi laboras seninterrompe. Mi memoras, vi skribas en via libro, ke ankaŭ la rango enkalkuliĝas.

– Enkalkuliĝas, sed ne tre gravas. Mi ne volas ofendi vin, sed en tia lando, kiel Sauda Arabio, oni povas iĝi generalo dum minutoj…

– Mi ne profitis de tio. Restis kapitano kiel en Kongo. Tie mi promociiĝis al ĉi tiu rango.

– Nu vidu, bonege. Do vi havas dudek tri jarojn. Mi faros vin rotestro, vi havos tri mil dolarojn monate. Ĉu sufiĉas?

– Ankaŭ en Kongo la soldo ne pli multis, kvankam tie estis pli malfacile.

– Ne kredu! Ankaŭ ĉi tie estas sufiĉe malfacile. Nur ŝajne pli facile.

– Kie vi ekkonis la sinjorinon? – demandas Kolhaus.

– Mi estis hejme en Karlstein, volis iom malstreĉi min. Mi ricevis leteron de ŝi, ŝi volis paroli kun mi, petis min veturi ĉi tien. Ni renkontiĝis en Ateno.

– Ĉu ŝi konsentas pri viaj tarifoj?

– Ŝi havas monon. Ŝi mem elpensis la aferon, nun investas en ĝin sian monon. Kaj ankaŭ direktoras ĝin.

– Kaj vi, kiom vi ricevas?

– Mi estos komandanto.

– Kiom? – redemandas Kolhaus.

– Vi tro scivolas. Kie vi lernis tion?

– Se vi ne volas, vi ne diros.

– Ok mil.

– Bele – komentas Kolhaus.

– Sed por ĉi tiu mono mi devas prizorgi la virinon.

– Kia peno! Se vi laciĝos, ni dividos la „laboron”.

– En ordo, kapitano Kolhaus. Kvankam via birdrakonto estas preskaŭ merdo.

– Laŭ mi, eĉ mia idiota albatrosaĵo pli interesas ol viaj sentimentalaj mevoj. Sed se vi nervozigas min, mi rakontos ion pli bonan.

– Ni aŭdu!

– Ĉu ni ne devus ekveturi? – demandas Kolhaus.

– Mi ja diris, ke ni estas proksime. La vojo glatas cetere, ni informiĝos pri ĝi en la urbo, sed ĝi kondukas tra la arbaro, daŭras kvaronhoron. Kaj Edit atendas min nur por la kvara, ni alvenis pli frue.

– Kiel ĝentila vi estas.

– Al virinoj ĉiam.

– Mi aŭdis pri viaj aventuroj Kongolandaj.

– Afero alia, tie ni estis venkintoj, ni devis terori la loĝantaron. Multe mi lernis de kolonelo Trinquier, li sentencis jene en Alĝero: „Cent ekzekutistojn al mi, kaj mi teroros Parizon.” Se tiel plaĉas, konsideru min faŝisto, sed ni devas doni lecionon pri moroj al la popolo, por ke ni povu ĝin regi pli facile. Kaj krome: la modernaj militoj celas konkeri la loĝantaron. Kaj por tio teroro plej taŭgas kiel instrumento. Nu, jam diru vian rakonton!

– Kial birdoj tiom interesas vin? – demandas Kolhaus.

– Vi priridos min. Ĉar ensonĝe mi ofte estas birdo.

– Nu kaj?

– Nenio. Mi estas birdo. Verdire mi ne scias, kia, simple mi havas flugilojn kaj bekon. Manojn mi ne havas. Sed mia beko fortas, povas preni ĉion. Ankaŭ skribi mi povas per ĝi.

– Kiel?

– Elsekiĝinta ŝlimtavolo kuŝas antaŭ mi. Mi ekiras de la rando, klinas min kaj skribas sur ĝi.

– Kion, kutime? – demandas Kolhaus.

– Ĉiuspecaĵojn. Leterojn, hejmen al patrino, al najbaroj. Kantojn, kiujn mi lernis knabaĝe…

– Kaj kion vi sentas en tiaj okazoj?

– Nenion. Kion nun. Nu, rakontu tiun fabelon…

– Ĝi temas pri vulturoj – diras Kolhaus ridetante.

– Tre bone. Rakontu!

– Juna bioĥemiisto rimarkis en Hindio, ke vulturoj antaŭscias, kiu homo kiam mortas. Se iu vojeraras en dezerto kaj estas mortonta, ili eksentas tion, kaj samtiel ankaŭ en urbo. Li observis nome, ke dum oni kondukis al la urborando sanajn junulojn, kondamnitajn al morto, vulturoj giradis super la ekzekuta taĉmento: ili jam sciis, ke la junuloj estas mortontaj. La scienculo heredis monon, decidis klarigi la sekreton. Li instalis farmon, aĉetis ĉirkaŭ ducent birdojn, komencis eksperimenti per ili. Evidentiĝis, ke en la cerbo de la animaloj troviĝas sintezebla kombinaĵo, kiu pro iu neelspurebla kaŭzo signalas la tempon de la morto. Dek jarojn li eksperimentadis, ekstraktis la efikanton el la cerbo de vulturoj, enkonstruis ĝin en aparateton, sur kiu li muntis montrilon kaj temposkalon, kaj komencis kontroli siajn hipotezojn. La aparato fakte montris la tempon de la morto. Li iradis tra la urbo, haltis apud nekonato, elprenis la skatoleton kaj rigardis sur la skalo, kiam la koncernato mortos. En pluraj kazoj konkrete li postiris la pruvojn, sekvis la koncernaton, konatiĝis kun li, komencis lin observi, sciigis al li, kiam lia morto okazos. Komence oni priridis lin, sed poste, kiam la mortoj vere okazis, liaj proksimuloj kuris terurite al instancoj, kuracistoj. Oni fermis lin en frenezulejon. Ankaŭ tie oni ridis pri li, ĝis, helpe de la aparato, li antaŭdiris, ke post duonjaro, precize la 8an de aŭgusto, la ĉefkuracisto mortos. Tiu vere mortis la 8an de aŭgusto, kaj tiam oni elĵetis lin el la hospitalo. Li vivis silente dum certa tempo, sed foje neatendite li komencis disfamigi, ke la mondo finiĝos en 1980. Oni demandis lin, kial li asertas tion, kaj li donis la klarigon, ke la aparato ne montras mortotempon postan al 1980, ke kaj infanoj kaj plenkreskuloj mortos pli aŭ malpli frue la 3an de junio 1980, tiam estos la fino de la mondo. Li ripetadis tion tiel longe, ĝis en iu kunveno oni mortbatis lin pro tio, frakasis lian aparaton en mil pecojn…

– De kie vi konis lin?

– En kvindek tri mi estis en Pakistano kaj transiris al Delhio, tie ni renkontiĝis, interamikiĝis.

– Ĉu vi vidis la aparaton?

– Ĝi aspektis, kiel kvadrata horloĝo – respondas Kolhaus.

– Ĉu li vere kapablis aŭguri?

– Mi ne scias.

– Ĉu li aŭguris al vi?

– Ne.

– Kial?

– Li diris, kiun li amas, al tiu li ne aŭguras. Cetere, se veras, ke en 1980 venos fino al la mondo, tiam ni ne havas tro da problemoj. Ni ja havas maksimume dek unu jarojn antaŭ ni.

– Stultaĵo.

– Strange vi pensas, Wagner. Se vi kredas pri mevoj, kial ne kredi ankaŭ pri vulturoj?

– Vi pravas, mi kredas pri ili.

– Ĉu ni ne devus ekveturi – demandas Kolhaus.

– Jes. Ni povas ekiri, estas la dua. En la urbo ni demandos, tra kie la vojo plej mallongas.

Wagner funkciigas la aŭton, ĝi akceliĝas dum ok sekundoj ĝis 100-kilometra rapido. La ponto retroglitas, la vilaĝoj leviĝantaj el la montoflankoj, iĝas blankaj latoj en ia preterkuranta manrelo.

Kortena havas forumon de regula kvarangulo. Malalta ŝtonmuro ĉirkaŭas ĝin, la sunlumo fiksas la ombron de la plattegmentaj domoj sur la montoflanko.

Ili enveturas la urbon. Wagner bremsas, stiras malrapide supren, en mallarĝaj stratoj. Haltas ĉe angulo de la ĉefplaco. Placomeze, inter du ĉevalformе tajlitaj ŝtonblokoj staras kvinmetra, arĝenteca metalkolono, de ĝia supro pendas korbeto, en ĝi arĝentaj buŝfero kaj sprono, kunvelditaj.

Wagner malŝaltas la motoron, atendas, ĝis la plej proksima pasanto preteriras kaj turnas sin al li. Li parolas la grekan kun forta, fremdeca akĉento:

– Sinjorino, pardonu pro la ĝeno, bonvolu diri, kiel ni venos al la Metaksas-linio? Ni volus tra la arbaro.

La juna virino haltas, alridetas ilin, poste senkonsile dismetas la

brakojn, atendas, ĝis du junaj viroj venas parolproksimen:

– La sinjoroj serĉas la Metaksas-linion – ŝi diras al ili kaj montras direkte al la aŭto.

Iu el la junuloj paŝas al la aŭto, duonkliniĝas al Kolhaus:

– Ĉu vi demandas pri la Metaksas-linio? Vane vi iros, tie ĉio fiaskis. Ankaŭ la hotelo ĉesis, la gastejo same. Ĉio dezertas.

– Malgraŭ tio, ĉu vi bonvolus? – petas Wagner. La junulo levas la ŝultrojn, komencas klarigi.

– Eĉ du vojoj alkondukas.

– Ni volus tra la arbaro – petas Wagner.

– Tiam pasu rekte plu, ĉe la tria vojkruciĝo turnu vin maldekstren, tie demandu pri la urba hospitalo. Post la hospitalo la vojo kondukas ekster la urbon. Sur tiu vojo pluveturu, kaj veninte inter la montojn, vi trovos vojtabulon. Sed se vi ne trovus ĝin, vi povos demandi iun ajn, ĉi tie ĉiuj scias, kie la Metaksas-linio troviĝas.

– Mi tre dankas – diras Wagner kun rideto kaj levas honorsalute sian blanke gantitan manon al la tempio.

La junulo klinas sin ĝentile kaj ekrapidas post sia foriĝanta kunulo.

Wagner turnas sin al Kolhaus.

– Ĉu ne trinki ion? Ĉi tiu aspektas bona gastejo.

– Ni povas ensidiĝi.

Ili elaŭtiĝas, Wagner eltiras la sparkadŝlosilon el la panelo, ŝlosas la pordojn. Ili ekiras al la podio, ŝovita apud la arĝentecan kolonon. Larĝa bufedrimorko vidiĝas antaŭ la podio, du kelneroj staras en la ombro de la veturilo.

Ili sidiĝas sur pajloseĝoj, mendas viskion, oportuneme sorbetas la glacian trinkaĵon.

– Kiel vi imagas la instruktoradon? – demandas Kolhaus.

– Estas sufiĉe trejnitaj, kiujn ni venigis.

– Kiom ni opos?

– Kvardek.

– Ĉu nur?

– Poste ni altigos la nombron ĝis okdek.

– Kiomope ni faros unu skipon?

– Ĉirkaŭ tridek.

– Kiam estas ripoztago?

– Komence estos sufiĉe multa laboro. Dek homojn ni metos en rezervon, la ceteraj estos en funkcio. Poste ni interŝanĝos.

– Kiel mi rotestros, se ni nur tiom opas?

– Lasu tion al mi!

– Kial ne tuj dungi duoblan etaton?

– La sinjorino volas fari provon.

– Per nombro ne valoras eksperimenti. En peniga deĵorado la homoj iĝas incitiĝemaj, ne povas plenumi la taskojn…

– Eble la sinjorino volas ĝuste tion.

– Kial ŝi volus? – demandas Kolhaus.

– Ĉar tia prenas neniam la partion de la dungitoj, por tia la gastoj idolas.

– Tamen estas stulte umadi kun la armeo.

– Ni ne estas armeo, ni estas civilaj dungitoj. Ĉi tio ne estas Kongo.

– Sed ni havas armilojn – objetas Kolhaus.

– Por kio ili sufiĉas? Ĉu vi scias, kiel grandan armeon Grekio havas?

– Mi ne scias.

– Mi diros al vi, mi scias, ellernis tion. La nombro de ĉiuj militaj fortoj estas cent sesdek mil kapoj, laŭ la jena divido: terarmeo: cent dek ok mil kapoj, aerarmeo dudek kvar mil kapoj, mararmeo dek ok mil kapoj. Ĉi tie, proksime al la norda linio stacias ok terarmeaj divizioj. Ĉu vi scias, kiom ok divizioj nombras?

– Okdek mil homojn.

– Aŭ cent. Do ne indas militi kontraŭ ili.

– Ankaŭ mi ne tiel pensis. Ekzistas ankaŭ alia solvo, se la sinjorino estas kontraŭ ni. Simple ni forlasos ŝin, foriros – diras Kolhaus.

– En ordo, vi foriros. Kaj kie vi ricevos tiom da mono?

– Nenie – diras Kolhaus.

– Jen, vi mem vidas. Venu, ni ekvoju. – Ili pagas, ekiras al la aŭto.

Enaŭtiĝas, oportune lokiĝas sur la sidiloj, Wagner funkciigas la motoron.

Malrapide li veturigas, ĝiriĝas antaŭ la urban hospitalon. Sur la

plata supro de la alta, sep-etaĝa konstruaĵo du marmoraj hundoj staras unu kontraŭ la alia, iliaj malfermitaj buŝoj formas kune kamentubon; fumo leviĝas el ĝi.

Ili ĉirkaŭveturas la hospitalon, transiras al la elurba vojo, pasas tra larĝa pordego, tranĉita en alta muro. Wagner akcelas la veturilon, kun granda rapido turniĝas al la arbaro, etendiĝanta antaŭ la urbo.

Li atingas la randan arbovicon, ĝiriĝas sur la traarbaran tervojon. Wagner ne reprenas la rapidon.

Neatendite grandega termaŝino turniĝas el flanka pado antaŭ la kuregantan aŭton.

Wagner bremsas malespere, sed jam ne povas malhelpi la kolizion. Kun fortega puŝo la Porsche frapiĝas kontraŭ la elleviĝantan ŝtalkorpegon, la frapbruo supertondras ĉiajn aliajn sonojn. La aŭto ekgiras dufoje ĉirkaŭ sia akso kaj falegas laŭ larĝa arko en la vojfoson.

La nedamaĝita termaŝino iom flankenturniĝas, la kondukisto desaltas el la alta manipulejo, kuras al la vojfoso.

El la frakasita aŭto ekfluas sango sur la herbon. La ĉifita karoserio premtenas en si Wagner kaj Kolhaus, ili estas senmovaj. La kondukisto de la termaŝino provas liberigi ilin, sen sukceso. Li stariĝas, ekiras, kuregas cele al la hospitalo.

El la direkto de la urbo alvenas aŭtoj, biciklistoj; scivolemaj kamparanoj ĉirkaŭstaras la vrakon.

Oni liberigas ambaŭ mortintojn el la lamenaĵoj, karoseripecoj, kuŝigas ilin sur la fosrandon. Alvenas ambulanco, policanoj.

La ambulancanoj konstatas ĉe ambaŭ viktimoj la faktiĝon de la morto, poste foriras.

Juna policoficiro paŝas al la mortintoj, delevas la kovrilon, rigardas la kontuzitajn, sangoŝmiritajn vizaĝojn kaj rekovras ilin. Li turnas sin al la kondukisto de la termaŝino, apud kiu jam staras armita policano.

– Pri kio vi memoras? – li demandas.

– Pri nenio, sinjoro. Ili venis tre rapide. Mi havis pasrajton.

– Kie vi laboras?

– Ĉi tie, ĉe la Metaksas-linio.

La policoficiro ekridas.

– Ĉu denove vi laboras ĉi tie?
– La unuan fojon mi estas ĉi tie, sinjoro.
– Sekve, ne vi fiaskigis la pasintjaran entreprenon?
– Mi estas simpla laboristo, sinjoro.
– Mi nur ŝercis. Ĉu vi scias, ke la hotelo kaj gastejo estas fermitaj?
– Nun ni faras ne hotelon.
– Mi scias, kion vi faras. Tio min ne interesas.
– Sinjoro, mi ne kulpas.
– Ni vidos.

Forta bruo aŭdiĝas el la direkto de la montoj. Ĉiuj ekatentas. Helikoptero flugas super la akcidentejon. Ĝi pendhaltas, poste sinkas malrapide sur la kampon apud la vojfoso.

La oficiro forturnas sin de la kondukisto kaj atestantoj, ekiras al la alteriĝanta helikoptero.

La veturilo haltas sur la herbo, la rotaciado de ĝia helico malrapidiĝas, la motoro ankoraŭ iom zumas, poste ĉesas. La travidebla plasta pordo malfermiĝas; maldika, alta virino aperas en la aperturo, viglapaŝe sobrapidas sur la ŝtupetaro. Paŝinte sur la herbon, ŝi turnas sin al la oficiro:

– Bonvolu forigi la homojn! – ŝi petas, kaj etendas la manon. La policoficiro kisas al ŝi la manon, mansignas al siaj subuloj, ke ili forigu la scivolantojn.

– Disponu pri mi, sinjorino Niĥarĥos! – li diras ĝentile, returninte sin al la virino.

– Ambaŭ viktimoj de la akcidento estas niaj dungitoj – diras la sinjorino.

– Mi komprenas.

– Por hodiaŭ mi atendis ilin, ili estas geodeziaj inĝenieroj el la Federacia Respubliko Germanio, Johann Wagner kaj Franz Kolhaus.

– Kion vi deziras de mi, sinjorino?

– La formalaĵojn pri la kadavroj mi jam aranĝis telefone kun s-ro Ruferios.

– Jes.

– Pri ilia transporto hejmen mi mem deziras disponi.

– Nenia malhelpo. Kompreneble mi bezonas havi skriban permeson en la mano.

– Morgaŭ antaŭtagmeze vi ricevos ĝin. Mi petas vin, ne malhelpi min, forportigi ilin.

– Se telefone vi jam ricevis permeson, tiam nenia malhelpo, sinjorino. Mi petas vin nur, sendi al mi morgaŭ la paperojn al la prefektejo.

– Mi sendos ilin.

– Mi dankas vin. Disponu pri mi, sinjorino!

– Mi petas vin, se vi bonvolus... la mortintojn...

– Memkompreneble.

La policoficiro mansignas al la du policanoj apud si. Tiuj rapidas al la loko de la akcidento, paŝas al la kovritaj mortintoj, levas kaj portas ilin al la helikoptero.

La sinjorino paŝas al ili, levas la kovrilon, longe, esplore rigardas la kontuzitajn, sangoŝmiritajn vizaĝojn, poste rekovras ilin. Mansignas al la policanoj, kiuj singarde levas la mortintojn en la kajuton, poste desaltas sur la herbon.

La policoficiro atendas ĝentile, kaj kiam la sinjorino etendas sian manon por adiaŭo, denove li kisas ĝin.

– Mian elkoran kondolencon – li diras, kaj prenas la lozan, tremetantan ŝtupetaron de la helikoptero, por ke la sinjorino povu oportune suprenpaŝi en la kajuton.

Ŝi staras en la aperturo, laŭte, preskaŭ kriante ŝi respondas:

– Mi dankas vin en la nomo de la Societo.

Ŝi tirfermas la pordon, sidiĝas apud la piloto.

La motoro ekmuĝas, la helikoptero leviĝas alten, traflugas super la akcidentejo, turniĝas direkte al la montoj, malrapide malaperas el la vido post la arbaro.

2

Alta betonmuro leviĝas montoflanke, sube etendiĝas larĝa herbokampo ĝis la najbara monteto. Sporte vestitaj viroj staras en aretoj sur la kampo, ili babilas, atende rigardadas supren.

Unumotora sportaviadilo aperas el la direkto de la arbaro, descendas pli suben, komencas giri super la kampo. La viroj diskuras, elpoŝigas kolorajn flagetojn, komencas svingadi ilin, donas rondgeste signojn por alteriĝo.

La flugmaŝino sinkas malrapide, atingas la teron, skuiĝante ankoraŭ trakuras kelkajn metrojn, poste haltas antaŭ la rande staranta signalanto. La pordo malfermiĝas, virino, Edit Niĥarĥos en pantalona kostumo saltas malsupren el la kajuto sur la herbon.

La viroj ariĝas ĉirkaŭ la aviadilo, ili eble estas dudek, respekte salutas la virinon. Tiu afable akceptas la salutojn:

– Bonan tagon, sinjoroj. Mi dankas, ke vi atendis min; mi jam timis resti sola en la fortreso pro la du mortokazoj. Kiu estas inter vi majoro Efe Narviks?

Alta, juna blondulo antaŭenpaŝas el la vico:

– Estas mi – li diras kaj levas sian pugnitan manon honorsalute al la vizaĝo.

– Wagner mortis, vin mi nomumas komandanto – diras la virino.

– Komprenite, dankon – respondas Narviks.

– Mi esperas, vi havas nenion kontraŭe? – ŝi turnas sin al la viroj.

Ankaŭ Narviks returnas sin, rigardas siajn kamaradojn. Tiuj ekridas.

– Mi vidas, vi konsentas kun mi – diras la virino kaj ekiras al ili.

Ŝi promenas tien-reen antaŭ la disiĝantaj vicoj, paŝas al iu sporte vestita viro, ridetante alparolas lin:

– Propradire ankaŭ ĉi tiu ne estas vera amasprofesio. Ĉiun duan mi konas inter vi. Vi estas Karlo Ferrori – ŝi montras al iu.

– Ties kaŭzo estas la troa publikeco kaj viaj fakkonoj, sinjorino. Mia edzino nombris, ke ekde kiam mi batalis en Kongo, du mil sescent dudek kvar fotoj de mi aperis. Ŝi kolektas la bildojn, enalbumigas ilin, tio estas ŝia hobio. Ŝi korespondas kun ĉiuj gazetoj de la mondo. Cetere mi tre bedaŭras Wagner kaj Kolhaus, ili estis bonaj kamaradoj; mi ĝojis

denove renkontiĝi kun ili. Ankaŭ en Afriko stiris Wagner kiel frenezulo. Mi memoras, foje ni ĵipveturis por skoltado, kaj ribeluloj eksplodigis la ponton antaŭ ni. Li transsaltigis la aŭton super la rivereto. Ni prenis elanon de kvincent metroj kaj kun centdek-kilometra rapido ni traflugis tiujn sep metrojn – rakontas Ferrori.

Grizhara viro paŝas apud ilin, ridetas:

– Ĉu vi memoras, kian ŝercan kanteton komponis Kolhaus en Darton: „Soldulestro ne manĝas hundon”.

La sinjorino aŭskultas ridetante, poste turnas sin al Narviks:

– Majoro Narviks, bonvolu rakonti pri viaj spertoj.

– Mi ne volas laŭdi vin, sed interne ĉio estas vere profesie aranĝita. Mi konsideras iom troa la ekipitecon de la fuortoj. Se la sieĝantoj ne ricevos pezajn armilojn aŭ kanonojn, oni devas iom redukti la pafpovon de la fortreso. Mi ne scias, kiel oni elektos la poziciojn…

– Simple, per ĵeto aŭ enpugnigo de monero kiel en sportludoj.

– Tiam estas eĉ pli motivite, egaligi la ŝancojn.

– Kial, kiel vi opinias?

– Mi kredis: la defendantoj estos ĉiam ni.

– Ne, ni ne povas tion fari, tio misfidigus la gastojn. Sed mi petas vin, detale ekzameni ĉion el la vidpunkto de la ŝancegaleco de ambaŭ kontraŭuloj. Mi pensas, ankaŭ via ĝuste komprenita intereso postulas tion.

– Jes. Estas ĝusta principo, ke ĉio estu teĥnike sur la nivelo de la dua mondmilito. Almenaŭ dum la bataloj. Pro tio, laŭ mia opinio, oni forigu la tv-kameraojn, starigitajn en la fortreso kaj sur la tereno. Ili ja ĝenas la ludon. Kompreneble, la venkinto jam povus uzi tiajn teĥnikaĵojn, se li fakte venkos, kaj la kontraŭulo senkondiĉe kapitulacos.

– Pri kio vi aludas? – demandas la sinjorino.

– Pri tio, se mi bone komprenis la aferon, ke oni metu la venkiton en situacion, en kiu ĉiuj sekvoj de la milito sperteble rekreiĝas por kaj ĉirkaŭ li.

– Mi kredas, niaj fakuloj laŭdinde solvis ĉi tiun taskon. Mi ne scias, ĉu vi konas la proponojn pri la imitado de militkaptiteco?

– Ne, mi ankoraŭ ne studis detale la Regularon.

– Mi diros ekzemplon. Konsiderante, ke la daŭro de ludo estas kvardek ok horoj, la malsatigo de kaptitoj solveblas nur tiamaniere, ke en certaj intervaloj ili ricevas insulinan injekton. Sekve de tio ilia glukozemio falas, ili sentas nemildigeblan malsaton, kio pliigeblas ĝis sveno. Kompreneble, antaŭ la ludo la partoprenantoj estos submetitaj al kuracista ekzameno, kaj se iu evidentiĝas ekzemple diabetulo, tiun ni kompreneble ne malsatigos, tiun ni traktos per aliaj rimedoj.

– Tre interese – komentas Narviks.

– Ni solvis ankaŭ la problemon de la tempodilatado. Niaj bioĥemiistoj aĉetis simplan subhaŭtan vakcinon, kiu transformas ĉi tiujn kvardek ok horojn en la strukturo de la ribonukleata acido, do en la memorsubstanco de la cerbo, en daŭron de du ĝis tri jaroj, kio signifas, ke la ludantoj riĉiĝos per impreso de ordinara, vera milito.

– Kaj se la gastogrupo venkos?

– Mi esperas, tio okazos malofte, sed se tamen, ĉi-okaze la venkinto certe revenos ĉi tien, al la loko de sia gloro, kaj denove ludos. Homoj ŝatas ja venki.

– Mi ne konsentas pri la tempodilatado – objĵetas Narviks, mi vidas en ĝi la endanĝerigon de la rentabilitato.

– Eble vi pravas, kvankam mi kredas, sufiĉe da riĉuloj ekzistas en la mondo. Vi forgesas, ke la plej grava movilo de tia entrepreno estas la reklamo. Se la partneroj ricevos sufiĉe fortajn impresojn, ili transdonos nin, por tiel diri, el mano en manon. Kaj ĉar ni fiksas sufiĉe altajn prezojn, la amortizo ŝajnas realiĝi en du jaroj.

La sinjorino disetendas la brakojn, turnas sin al la tuta societo:

– Vi vidas, sinjoroj, ke en la nomo de la Societo plej sincere mi malkaŝas antaŭ vi niajn problemojn, kaj agos same ankaŭ estonte. Ni volas de vi reciprokajn sinceron kaj fidelon, kaj se ni ricevos ilin, pordegoj de Hades ne superfortos nin[1].

La viroj aplaŭdas, vivuas.

La sinjorino daŭrigas:

– Antaŭ ol vi enpaŝos nian servon, mi havus ankoraŭ demandon. Mi esperas, ke vi konas la bazan kondiĉon de la Societo, vi scias, ke ne

[1] Citaĵo el la Biblio (Mat 16:18).

allaseblas tiu, kontraŭ kiu estas iniciatita kriminala proceso. Majoro Narviks respondas:

– Kiel vi komprenas tion, sinjorino? Ĉi tie, en Grekio, ne. Kie ni laboris, tie povas esti, sed, tio, laŭ mia kredo, por vi indiferentas. Ĉi tie, en Grekio, kontraŭ neniu el ni komenciĝis kriminala proceso. Pri tio vi povas trankvili.

– Mi pensis pri Grekio. Cetere la demando estas ĉi tie, sur la kampo, tute formala. Interne, en la registrejo ja troviĝas ĉiuj gravaj informoj pri la agado de vi ĉiuj – diras la sinjorino.

– Vidu, ni precize scias, al kiu ni povas, kaj al kiu ni devas mensogi.

– Mi dankas por la komplimento, Narviks.

– Kaj cetere, en malgrandaj militoj ne ekzistas militkrimuloj. UN ja ĉiufoje intervenas kaj aparte dankemas, se ni konsentas ĉesigi ilin.

La sinjorino ne respondas, ridetante ekiras al la betona muro. La viroj sekvas ŝin.

Atinginte la muron, ili haltas. Larĝaj ŝtupoj kondukas al la blendita pordo, konstruita en la muro. La sinjorino ekiras sur la ŝtuparo, la viroj sekvas ŝin. Antaŭ la pordo ŝi elprenas etan radioaparaton, donas signalon, sekve de kio la peza pordo aŭtomate malfermiĝas.

Ili enpaŝas, venas en modernan, plene betonan kaj glasan konstruon. La muroj de la longaj koridoroj estas prilumitaj, dikaj tapiŝoj kovras la plastan plankon, nigraj vitroŝildetoj sur la altaj, arĝentece brilaj pordoj indikas la destinon de la ĉambroj, haloj.

La sinjorino enpaŝas tra pordo kun la surskribo „Demonstrejo”, la viroj sekvas ŝin.

Sur la muroj de la halo, de la planko ĝis la plafono, estas gluitaj fotomozaikaj tabuloj; la kombinaĵoj de kolorviglaj kvadratetoj bildigas amoscenojn. Nudaj virinoj rajdas tra helverdaj kampoj, fore atendas ilin abstraktaj taŭroj, levitaj per kelkaj penikmovoj super la kampon.

En longa matena prilumo tri vagonoj staras sur neĝblankaj reloj. La vagonpordoj estas fermitaj, sed tra la diafanaj flankoj videblas kuŝiloj, surŝutitaj per pajlo, sur kiuj sterniĝas malhele bluaj, nudaj knabinoj en katenoj. Viroj, vestitaj en flavaj virinaj balroboj, staras super ili, levas siajn manojn, iliaj longaj, maldikaj ungoj tuŝas la harojn de la knabinoj.

Sub la altegaj fenestroj staras profundaj ledfoteloj, antaŭ ili etendiĝas longa, helbruna tablo.

Tri junaj virinoj en blankaj kiteloj akceptas ilin. La sinjorino manpremas kun ili, ankaŭ ŝi sternas blankan kitelon sur sin kaj turnas sin al la viroj:

– Sinjoroj, bonvolu transiri en la najbaran ĉambron, tie atendas la aliaj. Bedaŭrinde vi ne povas eviti la sufiĉe ĝenajn pridungajn formalaĵojn. Ne koleru, sed unuflanke vi devos submetiĝi al medicina-psikologia ekzameno, aliflanke vi devos ekzameniĝi pri la koncernaj fakkonoj. La statuto de la Societo preskribas tion, ankaŭ via intereso estas akcepti la plej taŭgajn, la plej elstarajn de la profesio. Apud la najbara ĉambro troviĝas vestejoj, banoĉambroj; mi petas vin, bonvolu malvesti vin kaj post la X-radiaj, elektro-kardiografiaj, elektro-enkefalografiaj ekzamenoj reveni ĉi tien.

Mallaŭte babilante, la viroj transiras en la najbaran ejon, la sinjorino mansignas al iu el la junulinoj:

– Bonvolu transvoki la kuracistojn ekspertojn, kiuj faros la resuman raporton, kaj alportu la registrajn kartojn!

La knabino paŝas al monŝranko, staranta angule de la ejo, malŝlosas ĝian pordon, elprenas longan lignokeston, surtabligas ĝin, poste diskumas kaj mallaŭte teleparolas:

– Doktoro, sinjorino NiĤarĥos alvenis kun grupo de kandidatoj, nun jam ĉiuj ĉeestas, bonvolu sobveni en la demonstrejon en la dua etaĝo! Dankon.

La sinjorino elrigardas tra la fenestro. La herbokovrita korto etendiĝas malproksimen, pli fore du altaj tendoformaj konstruoj leviĝas, al la korto aliĝas senpere tereno kun altaĵetoj kaj arbustoj. Larĝaj, gruzitaj vojoj kruciĝas en sistema ordo sur la korto. Sur iu malantaŭa vojo malalta viro en ponĉo kondukas tri interligitajn mulojn. Surdorse ili portas etkalibrajn montajn kanonojn, la radoj pendolas ambaŭflanke, frapas la flankojn de la bestoj. Sur la ĉefvojo malpeza raŭptraktoro trenas kvartuban kontraŭaviadilan kanonon.

Malfermiĝas la pordo de la najbara ĉambro, nudaj viroj aperas sur la sojlo, proksimiĝas malrapide. La unua venas antaŭ la sinjorinon.

Alta, larĝŝultra, blonda junulo kun paperoj en la mano. La sekretariino en blanka kitelo prenas larĝan karton el la lignoteko, transdonas ĝin al la sinjorino.

Tri viroj en blankaj kiteloj paŝas en la helon, riverencas senvorte, sidiĝas fine de la longa tablo.

La sinjorino longe rigardas la karton, la surgluitan foton, identigas ĝin kun la antaŭstaranta nudulo, poste suprenrigardas:

– Do vi estas Hellmuth von Kreisbach? – ŝi demandas.

– Jes, sinjorino, tio mi estas.

– Vi aĝas nun tridek naŭ. Sekve, vi ricevis la kavaliran ŝtupon de la Ferkruco estante dek kvar.

– Mi ankoraŭ ne plenumis dek kvar.

– Pli ol mirige.

– Sinjorino, mia familio estas tia. Eĉ, foje ni savis iun Hohenzoller[a]. Eble ni ne pravis, pri reĝaj aferoj oni gardu sin.

– Mi kredas koni vian edzinon.

– Kiun?

– Gerda von Eisach – respondas la sinjorino.

– Ŝi estis mia dua edzino.

– Pardonu min, privataj aferoj ne interesas la Societon. Dankon. Bonvolu transiri al la kuracistoj.

Kreisbach plupaŝas al la tri blanke kitelitaj kuracistoj. Juna negro venas antaŭ la sinjorinon. La sekretariino eltekigas lian karton, la sinjorino transprenas ĝin kaj turnas sin al la dikmuskola nigrulo:

– Kiel vi venas ĉi tien, Winskay? – ŝi demandas.

– Mi havas du rekomendantojn.

– Jes, jen ambaŭ leteroj. Van Dougen mi konas, mi bedaŭras, ke li ne venas al ni. Ankaŭ pri Kabitschek mi jam aŭdis.

– Ĉu vi jam pasis en Usono? – demandas Winskay.

– Mi estis. Mi ŝatas Usonon – respondas la sinjorino.

– Vi estas blankulino, ĉu vi ŝatis tie ankaŭ la nigrulojn?

– Mi ne komprenas la demandon. Cetere ankaŭ la negrojn, mi ne estas rasisto. Malgraŭ tio mi ne dungos vin.

– Do tamen vi havas antaŭjuĝojn?

– Ne. Ĉu vi jam vidis kolortelevidon?

– Mi vidis.

– Ĉu vi scias, ke la parolistoj ne povas surhavi buntajn vestaĵojn?

– Kial?

– Por ne distri la atenton de la spektantoj. Se vi laborus por ni, vi vekus tute aliajn sentojn en la klientoj, ol ni celas. Ne koleru min, vi estas vere simpatia al mi, sed mi ne povas fari alie. Jen estas via adreso, telefonnumero sur la karto, la Societo sciigos vin, se troviĝos laboro por vi.

Winskay ne respondas, returnas sin senvorte, reiras en la najbaran ĉambron.

Grizhara, malpli juna viro paŝas loken de Winskay, komencas plende paroli, montras al la kuracistoj:

– Sinjorino, la kuracistoj en la najbara ĉambro diris, ke mi ne kapablos kunfari. Rigardu la liston de miaj distingoj, kredu, mi estas profesiulo, scipovas ĉion, kio ajn imageblas en ĉi tiu fako. Elprovu min!

Bedaŭre la sinjorino disetendas la brakojn:

– Ne koleru, nenion mi povas fari, devas cedi al la opinio de la kuracistoj. Ni venigis ĉi tien la plej bonajn fakkuracistojn.

– Kredu min, ili eraras. Einstein oni ne volis akcepti en la universitaton.

– Ĉu vi scias tiajn aferojn? Unu aferon tamen ne forgesu: Einstein tiam estis juna.

– Vi pravas, li fakte estis juna. Sed vi ne kompetentas pri ĉi tiu metio. Foje venu al mi por tagmanĝo, vi havas mian Parizan adreson, mi klarigos al vi... Malbone estas en ĉi tiu fako, ke kiu havas monon, preskaŭ ĉiam amatoras, prijuĝas la situacion, la ŝancojn ĉiam nur laŭ eksteraj, formalaj ecoj, celas ĉiam mezen. Laŭ via pitema strategio Karolo la 12a, Napoleono, Rommel aŭ Dayan estus neniam fariĝintaj tio, kio ili fariĝis. Tamen mi ne koleras, kaj se foje vi bone ellernos la fakon, vi venos al mi, kaj ni pribabilos. Mi akceptos vin ĉiam volonte. Ĝis revido, mi kisas vian manon.

La sinjorino ridetas:

– Ĝis revido – ŝi diras kaj turnas sin al la laŭvica dungoto.

Magra altulo haltas antaŭ la tablo. La sekretariino transdonas lian karton, la sinjorino studas ĝin kun serioza mieno, poste suprenrigardas kaj demandas mallaŭte:

– Ĉu tre gravas por vi labori ĉe ni?

– Mi ne komprenas la demandon – li respondas.

– Mi volas diri, ĉu vi jam provis ankaŭ aliloke?

– Mi ne provis. Kial?

– Vi tro famas por ni.

– Vere mi ne komprenas vin.

– Do mi parolos pli klare. Nia Societo estas privata societo; ĉi tiu entrepreno, per kiu ni realigos laŭ mia opinio gravajn aferojn, estas privata entrepreno. Ni ne volas, ke la gazetaro, la interkomunika reto tro atentiĝu pri ni. Ne nur en Kongo vi estis unu el la plej famaj solduloj; ĉie en la mondo vi ĉeestis, kie io eĉ plej malmulte moviĝis, en Pakistano, Jemeno, Peruo apud Trujillo, do mi volas diri, vi estas ĉie registrita. Se diskoniĝos, ke vi troviĝas ĉe ni, eĉ momenton da trankvilo ni ne havos. Kaj en tiel komenca stadio ni ne povas permesi al ni, elmetiĝi al diversaj atakoj.

– Mi kredis, ke vi bezonas bonajn fakulojn.

– Vi pravas, ni bezonas bonajn fakulojn, sed ne tro bonajn.

– Vidu, al tio mi povas respondi nur: malsaĝaĵo. Ĝis nun mi havis dek tri laborlokojn kaj nenie skandalojn.

– Tio dependas de tio, kion vi nomas skandalo. Ĉu mi montru la gazeteltranĉojn? Jen ili, apud via karto.

– Mi konsideras skandalo nur diplomatian konflikton.

– Mi kredas, vi pensas en aliaj dimensioj, ol ni, s-ro Kaprowsky. Ekzistas ekstremaj valoroj, kiuj jam ĝenas la matematikan konstruon. En nia konstruo vi konsideriĝas ekstrema valoro, tial mi petas vin, ne malfaciligu mian laboron, prenu vian vojaĝkoston ĉe la kaso kaj forlasu la fortreson.

– Mi kredas, sinjorino, iam vi pentos tian traktadon.

– Ĉu vi minacas min?

– Vi povas konsideri tion ankaŭ minaco.

– Vi scias bone, ke ankaŭ ni havas niajn rimedojn.

– Ĉu vi pensas pri Wagner kaj Kolhaus?

– Vi havas tre kolorriĉan fantazion, s-ro Kaprowsky, sed por milde diri, viaj informoj ne precizas. Wagner estis mia amato.

– Des pli suspektige.

– Malaperu, for de ĉi tie! Mi petas elkonduki lin – diras la sinjorino al la ĉeestantaj nudaj viroj.

Kaprowsky ridas moke, ne kontraŭstaras, kiam du dikmuskolaj kandidatoj prenas liajn brakojn, kaj elkondukas lin el la halo.

La sinjorino rigardas ridetante la karton de la sekva viro:

– S-ro Shadow, vi pasigis kvin jarojn en punlaborejo.

– Pro murdo. Sub forta emocio, sindefende.

– Se sindefende, kial?

– En Anglio troviĝas la plej stultaj juristoj de la mondo. Krome mi ne havis monon.

– Ĉu vi ne perdis la trejnitecon?

– Ni povus elprovi.

– Vi havos du monatojn por tio, dume vi povos ripari la kvin jarojn da ellaso. Ni rezervigos vin por du monatoj.

– Mi ne ĝojas pri tio.

– Ni kutime decidas ne laŭ emociaj konsideroj. Ĉu vi preparis vin por la ekzameno?

– Ne.

– Ĉu tio signifas, ke vi scias ĉion?

– Mi ne aŭdacus diri, tamen mi scipovas sufiĉe multe.

– En ordo. Bonvolu pluiri al la kuracistoj. Mi petas la sekvan sinjoron.

Ondhara junulo kun fermita vizaĝo paŝas al la tablo.

– S-ro Lundquist, mi kredas, vi faris grandan eraron – ŝi diras al li.

– Al kio vi celas, sinjorino?

– Vi venigis kun vi la edzinon en Atenon.

– Neniu diris, ke mi ne rajtas venigi ŝin.

– De kiam vi laboras en la profesio?

– Ekde dudek jaroj.

– Ĉu ĉien vi kunveturigis la edzinon?

– Jes.

– Ĉu eĉ al Porto Novo?

– Jes.

– Ĉu vi ne timas pri ŝi?

– Ne.

– Ĉu vi ne havas loĝejon en Oslo?

– Mi havas du loĝejojn en Oslo.

– Do kial vi kunveturigadas ŝin?

– Ĉar mi amas ŝin.

– Vidu, pri tio mi ne pensis; tio estas afero nepre respektinda. Sed bedaŭrinde ni ne povas dungi vin, se la edzino troviĝas proksime.

– En Ateno ŝi ne proksimas.

– Sed ankaŭ ne tiel foras, ke vi ne deziru veturi al ŝi de tempo al tempo – diras la sinjorino.

– Mi venis ĉi tien ne por esti monaĥo.

– Temas neniel pri tio. Je kvin kilometroj de la ĉefkonstruo ni instalis por vi unu el la plej modernaj porsoldataj bordeloj de la mondo. Ne parolante pri virinoj, kaptotaj dum la bataloj.

– Ĉu ankaŭ tiaj estos?

– Kiel ankaŭ tiaj? Vi devos perforti ilin en la ĉeesto de viraj kaptitoj. Mi vidas, sinjoroj, vi ne multe legis la libron, kiun vi ricevis ĉe la alveno. Sed ni restu ĉe la temo. Mi do petas vin, telegrafi al via edzino, ke ŝi tuj hejmenveturu.

– Mi devus priparoli la aferon kun ŝi.

– Bedaŭrinde, por tio ni ne havas tempon. Decidu nun, alie mi ne povas dungi vin.

– Mi telefonos al ŝi.

– Ne eblas. Telegrafu.

– En ordo, mi telegrafos.

– Dankon, bonvolu transiri al la kuracistoj.

La sinjorino levas sian dekstran manon:

– Sinjoroj, mi spertas, ke vi ne legis la libron, ricevitan ĉe via alveno. Mi tre petas vin trastudi ĝin, ĝi enhavas serion da informoj, kiuj post iam povos esti tre gravaj. Mi kredas, ankoraŭ ne malfrue, sinjoroj, bonvolu legi ĝin. Dankon, ni povas daŭrigi.

Juna homo kun neĝblankaj haroj stariĝas antaŭ la sinjorino. Longe ŝi observas la foton, gluitan sur la karto.

– Kio okazis al viaj haroj, s-ro Rother? Ĉu tiu foto pretiĝis pasintjare, kaj sur ĝi ili ankoraŭ malhelas?

– Mi ne scias. Foje mi rimarkis, ke la koloro foriĝas el miaj haroj.

– Dum kiom da tempo?

– Dum semajno.

– Kion vi faris ĝuste tiam.

– Mi estis surmare, en Port Grimau.

– Ĉu ankaŭ pli frue nenio okazis?

– Pli frue tre multaj aferoj okazis al mi, sed mi ne povas diri al vi, pro kio. Eble temas pri simpla bioĥemia procezo.

– Kion la kuracistoj diras?

– Ĉiuj demandas, kiom da homoj mi mortpafis.

– Kial?

– Eble ili rilatigas la aferon al tio.

– Kaj kiom?

– Mi ne nombris ilin.

– Mi komprenas. Ĉu vi havas bonan memorkapablon?

– Neriproĉeblan.

– Dankon. Bonvolu pluiri al la kuracistoj!

Rother mire rigardas la sinjorinon, poste levas la ŝultrojn, plupaŝas.

La sinjorino levas sin, ŝovas la kartotekon al la sekretariino:

– Daŭrigu! – ŝi diras al ŝi kaj ekiras al la malalta, blanka pordo vidalvide.

Koridorfine ŝi enpaŝas tra pordo markita per „Projekciejo”. La vicoj de seĝoj, tegitaj per sangoruĝa veluro, malplenas. Ŝi eniras iun mezan vicon, sidiĝas sur la meza apogseĝo, turnas sin, mansignas al la aparatejo.

La spektejo malheliĝas. Ŝi ekbruligas cigaredon, lokiĝas oportune sur la sidilo, nur ŝia spirado aŭdiĝas.

Aperas kadroj el kinokroniko, restintaj el la unua mondmilito. Sur la tolo marŝas groteske saltantaj soldatoj kun brilantaj butonoj sur la uniformoj, ili returnas sin, farante transkapiĝojn, retiriĝas al arbaro,

kuŝanta, kiel grajneca, nigra surtuto sur la neĝkovrita deklivo de monteto.

Knabino saltas tra ĉevalkadavro, rekuras, denove trasaltas ĝin, frostotremantaj soldatoj staras ambaŭrande de vojo, rigardas, aplaŭdas ŝin.

Tirola vojdefenda fortreso altiĝas sur la supro de monteto, kvarobla dratkoridoro ĉirkaŭas ĝin, en la koridoroj kuradas du hundoj, ne trovas la elirejon.

La parolisto komentas france; seke, senemocie diras la tekston: „En la kazo, se ŝtata forsto estas destinita bari la invadon fare de malamiko, ĝi havas defendan karakteron. Sed se ĝi certigas la ekipaĵon kaj atakon de la propraj fortoj, tiam atakan karakteron. Ĉe miksaj ŝtataj forstaj sistemoj unuiĝas la ĵus menciitaj du karakterizaĵoj."

Neatendite la lampoj de la spektejo eklumas, juna viro staras ĉe la pordo. La sinjorino admonas lin ordoneme:

– Bonvolu resti ekstere! Ne ĝenu min, mi ja diris, oni ne ĝenu min!

La viro retiriĝas, la pordo fermiĝas.

La spektejo denove malheliĝas.

Bildoj de la dua mondmilito aperas sur la tolo. Germanaj plonĝaj bombaviadiloj atakas la Metaksas-linion. Poiome flosas ŝtonkonstruoj, koridoroj, instalaĵoj de la fortresa sistemo en la bildon. Grekaj soldatoj en manteloj kun levitaj kolumoj kuras, marŝas tien-reen en la arbara zono, ŝovas kanonojn en mallarĝaj koridoroj, kradvandaj liftokestoj glitadas supren-suben.

Germanaj kaj italaj tankoj atakas, paraŝutistoj alteriĝas sur la konstruojn de la fortreso, pafas per flamĵetiloj en la aerumajn aperturojn de la betonmuroj.

La voĉo de la germana parolisto estas tre fora, apenaŭ aŭdebla, supersonas ĝin la venkaj marŝmelodioj.

Unuoj de la itala kaj germana armeoj marŝas sur stratoj de Ateno, timigitaj, kurbadorsaj lokanoj staradas laŭlonge de la trotuaroj.

Germana soldato postenas kun dismetitaj kruroj, armilo apogita antaŭ si sur Akropolo antaŭ Panteono.

Subite la sinjorino saltleviĝas, vokas al la aparatejo:

– Halti! Tuj haltu!

Oni haltigas la projekciadon, nur la blanka tolo helas, lumo ekbrulas.

La sinjorino stariĝas senvorte, forlasas la spektejon.

Trairas la koridoron, malfermas pordon kun la surskribo „Instruĉambro”.

En la ejo staras rondaj tabloj antaŭ brakseĝoj, tegitaj per verda veluro, sur la tabloplatoj radioaparatoj, mapoj, kolorkrajonoj, kretoj, aĵetoj de kurioza formo.

Kvin kandidatoj sidas unuj apud aliaj en la unua vico, vidalvide, malantaŭ la longa, hela skribotablo du pli aĝaj viroj aranĝadas aktojn.

La sinjorino sidiĝas senvorte en la lasta vico, atentas.

La ekzamenanto, sidanta maldekstre, ekparolas:

– Mi estas d-ro Doksiadis, jura konsilisto de la Societo. S-ro Kolter, bonvolu diri al mi, en la servo de kiu entrepreno vi estas, kaj kio estas via okupo?

Junulo kun nigra ĉemizo stariĝas el randa fotelo:

– Mi estas dungito de la Societo por Rekonstruo kaj Utiligo de Forlasitaj Fortresoj, kaj estas okupata, kiel ĉefĉasisto. La celoj de la Societo estas jenaj: por la plivigligo de la ĉiam pli kreskanta fremdultrafiko de Grekio funkciigo de komplekso, liveranta specialajn amuzojn, pliigo de la greka nacia havaĵo per renovigo de la malnoviĝintaj, kadukiĝintaj instalaĵoj de la fortresa komplekso, nomata Metaksas-linio, per funkciigo de novaj instalaĵoj.

– Ĝuste, mi dankas vin. Kaj nun eble s-ro Servet. Via okupo?

– Mi estras la blokon de amuzejoj.

– Jes. Nombro de viaj prostituitinoj?

– Provizore tridek du.

– Ilia meza aĝo?

– Dek naŭ jaroj.

– Kiajn sankciojn la Societo povas uzi kontraŭ neobeantaj prostituitinoj? Mi pensas unuavice pri la rimedoj de fizika teroro.

– Ni disponas unusolan eblon, procese repreni la donitan antaŭpagon. Bedaŭrinde, korpa puno ne eblas.

– Dankon. La demando estis kaptilo. Mi ĝojas, ke vi rimarkis tion.

– Tamen mi pensas, se necese...

– Tion vi devas lasi al mi, sinjoro.

– Sekvas s-ro Michelson. Vi?

– Mi inspektas la muzeon de la fortreso.

– Kiajn valoraĵojn vi gardas en la muzeo?

– La muzeo eksponas armilojn kaj formojn de fortikigado, uzitajn ekde la 18a jarcento. Ĉio trovigas en ĝi, kio povas interesi en ĉi tiu fako.

– Dankon. S-ro Strongsky!

– Mi direktoras la hotelon.

– Bone. Kiom da apartamentoj ĝi havas?

– Cent dudek tri.

– Kiom da unuaklasaj?

– Sesdek kvar.

– En kio diferencas la unuaklasaj de la duaklasaj?

– En la unuaklasaj funkcias speciala aparato, per kiu la gastoj povas senpere kontakti ajnan punkton de la mondo, kie troviĝas telefono. La aparato transformas la voĉon en bildon kaj fotas ĝin.

– Kial tio gravas?

– Por esti sincera, mi ne scias.

– Tio havas nenian sencon, estas lukso. Sendepende de tio, kio klarigas ĝian apartan valoron?

– Tio, ke per analizo de la ŝanĝiĝoj de la sonmapo detekteblas, kiu pri kio kaj kiom mensogas.

– Ĝuste. Jen ĝia esenco. Ankoraŭ en kio la unua klaso diferencas?

– En tio, ke ĝi staras je dispono de diversaj nervmalsanuloj.

– Kion tio signifas?

– Ni demetas orajn juvelojn, orajn objektojn en la ĉambroj, por ke kleptomaniuloj povu ŝteli. Por piromaniuloj la meblaro bruligeblas, la apartamentoj estas izolitaj unuj de la aliaj, la interna fajrobrigado atingas la fajron dum minutoj...

– Tre bone, dankon. S-ro Murketos, eble vi parolu iom pri la bredado.

– Bestojn ni tenas por la postludaj ĉasoj. En niaj kaĝoj troviĝas preskaŭ ĉiuj specioj de foliarbaraj grandanimaloj, krom tio ni rezervas sennombrajn leporojn, fazanojn, perdrikojn.

– Kiel oni procedas ĉe leporĉasoj?

– La pelistoj portas la leporojn en sakoj al la kaŝejoj, kaj kiam la pelo komenciĝas, ili elsakigas kaj direktas la bestojn al la ĉasistoj.

– Jes, dankon. La rajdbestoj?

– Ni tenas ilin same por ĉasoj. Ni havas okdek ses rajdĉevalojn. Ni aĉetis ilin el la plej bonaj bredejoj. Mi denombros la stalonojn…

– Ne, dankon, mi vidas, vi konas ilin. Nun mi transdonas la vorton al la milita eksperto, mia amiko Kuvros.

La alia ekzamenanto, malalta, dika viro foliumas inter siaj dokumentoj, poste suprenrigardas, fortavoĉe, preskaŭ krie parolas:

– Mi pensas, unue mi starigos demandojn pri la temaro fortreso. S-ro Michelson, mi demandas vin ĝenerale pri nocioj kaj ties difinoj. Klarigu la nocion fortresa sistemo!

– Fortresa sistemo estas plejofte jam en paco preparita, por milita agado daŭre instalita kaj per kampaj fuortoj kompletigita terenzono ĉe la limo kaj kelkfoje profunde en la teritorio de lando.

– Ĝuste. Kio estas fortresa zono?

– Fortresa zono estas parto de fortreso, kiun samtiel defendas speciale instruita superunuo, kunlabore kun kampaj trupoj.

– Fortresdefenda segmento?

– Fortresdefenda segmento estas parto de fortresa zono. Ĝi konsistas el du ĝis tri, en larĝo kaj profundo lokitaj fortresaj kantonmentoj, tiuj de rezervo, respektive ties areoj.

– Fortresa kantonmento?

– Fortresa kantonmento estas parto de fortresdefenda segmento; ĝi konsistas el du ĝis kvin, en larĝo kaj profundo lokitaj fortresaj bazopunktoj, el tiuj de rezervo kaj subtenaj subunuoj.

– Fortresa bazopunkto?

– Fortresa bazopunkto estas parto de fortresa kantonmento, konsistas plej ofte el kvar ĝis kvin fortresaj elementoj.

– Fortresa elemento?

– Fortresaj elementoj estas la pilieroj de fortresa bazopunkto. Iliaj konstruoj el ferbetono kaj blendo, instalitaj en rokomuro kaj provizotaj per pafarmiloj kaj aliaj batalaj, teĥnikaj rimedoj estas pretigitaj jam en paco.

– Eminente, s-ro Michelson. Kaj nun eble vi, s-ro Strongsky, provu respondi al miaj demandoj. Kiam la germanoj konstruis la Siegfried-linion?

– Inter mil naŭcent tridek kvin kaj tridek naŭ.

– Ĝuste. Kiel oni nomis la plej faman fortresan sistemon de la belgoj?

– Albert-linio.

– Kaj tiun de Svedio?

– Fortikigita tereno Sargans.

– Kiom kilometris la Maginot-linio?

– Tricent kvindek.

– Eminente, vere eminente, dankon. Do, eble s-ro Kolter, nun iom da historio. Parolu al mi pri la Schwarzlose-mitralo.

– En la Schwarzlose-mitralo la kulaso aliĝas per du artikaj braketoj al la framo, kaj la kulaso proksimas en antaŭpozicio al la mortopunkto de la meĥanismo. La kulaso mem sufiĉe multe pezas; post ĝi estas lokita tre forta reŝova risorto. Ili kune...

– Ne daŭrigu, dankon! Kio estas strategio?

– Sistemo de sciencaj konoj rilataj al la fenomenoj kaj leĝoj de la tuto de perarmilaj luktoj.

– Kaj taktiko?

– Scienco studanta la trajtojn kaj esencon de la batalo kiel parto de la perarmila luktado.

– Kio estas la esenco de la nocio ŝtupo en la taktiko?

– Ĝi estas unu el la elementoj de la batalordo aŭ operaca strukturo de trupoj aŭ marŝkolonoj. En la unuopaj ŝtupoj povas lokiĝi subunuoj, unuoj aŭ superunuoj, kiuj ĉiam povas ricevi antaŭdifinitajn bataltaskojn.

– Vi estas vere elstaraj soldatoj. S-ro Servet, ĉu vi dirus al ni, kiuj estas la proprecoj de la venko al montaraj fortresaj bazopunktoj, iniciat-

ita el marŝado.

– La proprecoj de la venko al montaraj fuortoj resumeblas al jeno: pro manko de vojoj, la atakantaj trupoj ne povas ĉirkaŭbraki la fortresajn bazopunktojn, sekve plej ofte ili deviĝas ataki tiujn fronte, el ireblaj direktoj. Ankaŭ la ebloj de manovrado restriktiĝas, kaj en la ireblaj direktoj povas disvolviĝi plejofte nur etnombraj bazunuoj. Al la atakantaj trupoj…

– Jes, en ordo. Eminente. Mi povas diri, eminente. Nun restis nur s-ro Murketos. Al vi mi donas facilan demandon. En kio diferencas la militpovoj de Turkio kaj Grekio?

– La plej grava diferenco montriĝas en la nombro de armeanoj. Grekio havas cent sesdek mil, Turkio kvarcent dudek naŭ mil soldatojn. La tuta loĝantaro de Grekio sumas ok milionojn, tiu de Turkio tridek du milionojn, do se ni analizas la militpovon laŭ proporcio, Grekio havas relative pli grandan militan potencon.

– Dankon, sinjoroj. Mi kredas, ke kune kun mia amiko Doksiadis ĝoje ni povas rekomendi vin por akcepto al niaj komisiantoj.

La kandidatoj stariĝas kontentaj, inter ridoj, malrapide ili eliras el la ĉambro.

La sinjorino antaŭenvenas al la du ekspertoj, starantaj ĉe la tablo;

– Sinjoroj, mi tre dankas vin por la ĝisfunda ekzamenado. Mi ne komprenas nur, kial vi metis tiom da superfluaj demandoj? Diru, kial interesas, koncerne nian aferon, kiom da soldatoj havas Grekio, aŭ kiel difineblas la fortresa elemento?

Respondas Kuvros:

– Sinjorino, mi kredas, vi komprenos la ĝustecon de nia metodo. Ĉi tiuj homoj estas elektitaj kaj plej kvalifikitaj solduloj de la mondo. Ĉu vi ne rimarkis, kiel ili brilis pro la ĝojo, povi respondi al tiaj demandoj ŝajne abstraktaj? El ĉi tiuj respondoj, el ĉi tiu ekzamenado evidentiĝis, ke ili estas ne nur praktikaj fakuloj, sed ke ili scias eĉ, kiam la Siegfriedlinio estis konstruita, kaj kiel la strategio difineblas. En la praktiko ili eble ne bezonos ĉi tiujn konojn sed psike certege. Ni liberigis viajn homojn, donis al ili teoriajn valorojn. Ĉu vi ne pensas, ke la esenco kuŝas en tio?

– Mi komprenas vin, sinjoroj, kaj mi kredas, vi pravas. Demandindas nur, ĉu ankaŭ en praktikaj aferoj ili tiom spertiĝis.

– Tion konfidu al majoro Narviks, li direktas la instruadon; vi povas tute certi: se li sentos, li tuj anoncos, se iu forigendas. Li estas unu el la plej fidindaj.

– Ĉu vi konas lin?

– Jes, kiam mi ankoraŭ aktivis, mi renkontis lin en militafera konferenco. Li havas mirindajn kapablojn.

– Mi ĝojas, ke ankaŭ vi havas favoran opinion pri li. La sukceso de la entrepreno kuŝas en liaj manoj – diras la sinjorino.

– Elstara organizanto.

– Sinjoroj, mi tre ĝojis, kaj vere mi ne volas tuŝi vian sentemon, sed ripete kaj insiste mi devas atentigi vin, ke la plej rigora konservado de niaj sekretoj estas por ni sortodecida. La honorarion bonvolu transpreni ĉe la kaso.

– Sinjorino, estas bone, ke vi diris, ke vi ne volas ofendi nin, alie vere ni estus ofenditaj – diras Kuvros ridetante, poste ĝentile adiaŭas ŝin kune kun sia kolego.

En la najbara ĉambro okazas psikologia ekzamenado.

La sinjorino retiras sin en angulon, provas resti nerimarkita.

Nur unu kandidato, Hellmuth von Kreisbach staras meze de la ĉambro. Psikologo en blanka kitelo demandas lin:

– Ĉu vi jam aŭdis pri Milgram?

– Mi ne scias, kiu li estas – respondas Kreisbach.

– Aŭtoro de interesa esplormetodo. Mi nun volas ripeti la eksperimenton ĉe vi pro tio, ke malofte doniĝas okazo okupiĝi pri tiom da inteligentaj homoj. Mi esploras, kian influon la puno havas al la memorkapablo kaj lernopreteco. Ĉu vi komprenas la grekan?

– Iomete. Iam mi batalis ĉi tie.

– En ordo. Kadros, envenu! – vokas la psikologo tra la pordo de la apuda ĉambro.

Etstatura, maldika knabo paŝas en la ejon, haltas ĉe la pordo. La psikologo klarigas plu al Kreisbach!

– Ĉi tiu knabo servas kiel eksperimenta animalo. En la apuda ĉambro

troviĝas elektra seĝo, ni laĉos lin en ĝi, kaj vi sidiĝos ĉe ĉi tiu ŝaltotabulo. Vi ricevos libron, en kiu vi vidos diversajn demandojn. Vi legos la unuan en la mikrofonon; se la knabo donos ĝustan respondon el la alia ĉambro, okazos nenio. Se ne, vi forturnos la ŝaltodiskon. Ĉe la forturnado de la disko, la knabo ricevas kurentofrapojn de diversaj fortoj laŭ tio, kiel longe vi turnas la diskon sur la skalo. Post ĉiu malĝusta respondo vi devas pliigi la intenson de la ŝoko. La knabo ricevos belan sumon por tio, vi ne bezonas lin domaĝi. Ĉu vi komprenas, sinjoro?

– Jes ja – respondas Kreisbach.

– Jen rigardu la ŝaltotabulon, sur la subdiska skalo estas tridekona divido, de dek kvin ĝis kvarcent kvindek voltoj. Jen tie la mikrofono kaj la laŭtparolilo, tra ili vi povas interkomuniki. Nun mi ŝokos vin per frapo de kvardek kvin, por ke vi precize perceptu, kiel fortas la unuopaj ŝtupoj.

Li volvas du elektrodojn ĉirkaŭ la brako de Kreisbach, poste forturnas la diskon. Kreisbach ekskuiĝas, paliĝas, videblas, ke la frapo doloris lin, sed li ne movas sin, atendas ridetante. La psikologo malvolvas de li la elektrodojn, poste transpetas lin en la apudan ĉambron. La knabo postiras malrapide kaj sidiĝas en la blankan fotelon meze de la ejo. La psikologo laĉas lin al la sidilo, fiksas elektrodojn sur liaj brakoj, kruroj. Kreisbach rigardas interesite la procedon, kaj sekvante la psikologon, senvorte li reiras en la eksteran ĉambron.

Tiu fermas la pordon de la ĉambro kaj enmanigas libreton al Kreisbach, jam sidiĝinta al la ŝaltotabulo.

– Bonvolu meti la unuan demandon.

Kreisbach, kun fremdeca prononco, legas la unuan demandon en la mikrofonon:

– Kiu estis la ĉefministro de Grekio en mil naŭcent tridek ok?

– Mi ne scias – aŭdiĝas la malaŭta respondo de la knabo el la laŭtparolilo.

– Ŝokon al li! – diras la psikologo.

– Kiom? – demandas Kreisbach.

– Kvindek!

Kreisbach turnas la montrilon de la disko al la cifero kvindek.

La knabo ekveas en la najbara ĉambro.
– La sekvan demandon! – diras la psikologo.
– Kiel la papo nomiĝas?
– Mi ne scias – venas la respondo.
– Ŝokon al li! – diras la psikologo.
– Kiom? – demandas Kreisbach.
– Sepdek kvin!
Kreisbach forturnas la diskon.
La knabo ekmuĝas, poste plorante, poiome silentiĝas.
– La sekvan demandon!
– Kiel naskiĝis Palas Ateno?
– Mi ne scias – respondas la knabo kun plorema voĉo.
– Ŝokon al li!
– Kiom?
– Cent kvindek!
Kreisbach forturnas la diskon.
– Ellasu min! Mi ne bezonas la monon! Ellasu min, mi ne bezonas la monon! – kriegas la knabo.
Kreisbach atentas senvorte, interesite.
La psikologo stariĝas strikte apud li.
– Bonvolu daŭrigi! – li diras energie. Kreisbach voĉlegas la sekvan demandon:
– Kiom da insuloj havas Grekio?
– Mi ne scias – diras la knabo mallaŭte.
– Ŝokon al li! – diras la psikologo.
– Kiom?
– Cent okdek.
Kreisbach forturnas la diskon.
La hurlado de la knabo plenigas la ejon:
– Mi ne povas plu! Mi mortos, mi ne povas plu! Ĉesu!
– Daŭrigu! – diras la psikologo.
Kreisbach demandas malrapide:
– Kiam estis la unuaj Olimpikaj Ludoj? Silento, ne venas respondo.
– Ripetu la demandon! – diras la psikologo.

– Kiam estis la unuaj Olimpikaj Ludoj?

Silento, ne venas respondo.

– Li ne respondas, devas esti punita! – diras la psikologo.

– Li mortos – rimarkigas Kreisbach.

– Ĉe tricent li ankoraŭ ne mortos! Ŝaltu!

– Mi ne ŝaltos! – diras Kreisbach.

– Mi ordonas! – kriegas la psikologo.

– Tio ne interesas min, iru al la diablo!

– Faru tuj, kion mi diras!

– Ĉesu, alie mi diskikos vin.

– Mi elĵetigos vin! Leporkoro, mi elĵetigos vin! – krias la psikologo.

– Eĉ en Kongo mi ne pafmortigis infanojn. Iru al diablo kun ĉi tiu idiotaĵo! Venu, ni transiru, por vidi, kio okazis al li.

– Vi rigardos nenion! Forlasu la ĉambron! – krias la psikologo kaj malfermas la pordon al la koridoro.

Kreisbach okulmezuras lin, poste senvorte eliras, fermas post si la pordon.

La sinjorino paŝas al la psikologo!

– Mi ne komprenas tion, doktoro.

– Ĉu vi ne konas ĉi tiun teston?

– Mi ne konas ĝin.

– Al la knabo okazas nenio, li estas inicita, dum la tuta tempo li aktoris, eĉ unu frapon li ne ricevis. Mi aŭdigis lian kriegadon el magnetofono.

– Kaj nun, kio kun Kreisbach?

– Oni devas lin dungi. Ankaŭ tiaj necesas en certaj cirkonstancoj. Ne multaj el ĉi tiu speco, maksimume kvar ĝis kvin procentoj. Ĉi tiun vi povas dungi.

– En ordo, doktoro, plufaru!

– Ĝis revido – diras la psikologo.

– Mi transiros, rigardos la vestomodelojn – diras la sinjorino.

Meze de la modrevuejo, apud ruĝe tapiŝita podio staras du junaj viroj. De tempo al tempo unu el ili dufoje kunklakigas la manojn.

Je la signalo aperas viraj manekenoj el la direkto de la koridoro,

iras sur la podion. Ili surhavas altkolumajn, fermliniajn, grizajn kaj turkisajn uniformojn. Modeste ornamitaj, plektitaj arĝentaj epoletoj sidas sur la kamizoloj, arĝentaj butonoj lumas sur ili.

Foje sapeistaj botoj, foje botetoj, foje brilaj nigraj rajdbotoj vidiĝas sur iliaj piedoj.

La sinjorino interesite rigardas la defilantojn.

Ĉe la apero de la manekenoj la alia junulo laŭte konigas la servocelon de la uniformoj:

– Kazerna porekzerca kompleto, terena porekzerca, kompleta batalvesto, libertaga eksterkazerna, dimanĉa solena, okaza solena.

La lasta manekeno surhavas strangan, duone civilan, duone uniforman kostumon. La jako havas epoletojn, la eksteraj poŝoj estas larĝaj, fermeblaj per ostobutonoj: similan oni portas dum ĉasado. Turninte sin al la sinjorino, la junulo laŭtvoĉe anoncas:

– Specialaĵo aĉetebla aparte, sed se ĝi ne plaĉas al vi, sinjorino, ni preterlasu ĝin.

La sinjorino ne respondas, aplaŭdas al la manekeno, poste turnas sin al la viro apude staranta:

– Kaj kion surhavos tiuj, kiuj estos sur la alia flanko?

– Ili mem decidos pri tio. Povos porti anglajn, usonajn, francajn, rusajn, germanajn uniformojn, povos vesti sin ankaŭ civile; pagos ili, do ili povos surmeti, kion ajn ili volas. Nur ĉi tiujn, do tiujn de la Societo ili ne rajtas surhavi – respondas la viro.

– Estas en ordo, ke la gastoj povas libervole elekti, sed ni ne devas ligi nin al iu konkreta uniformo.

– Laŭ mia opinio oni devas verŝajnigi la fikcion ĉiam per konkretaj elementoj.

– Vi pravas, sed ĉi tiuj ja estas germanaj uniformoj, preskaŭ sen iaj modifoj. Ni ne konservu supraĵajn memorigaĵojn. Ne koleru, ni devas iri pli profunden. Kion ni faras, estas ne simpla ludo. Prefere filozofia agado. Mi preskaŭ dirus: konvertado.

La viro surprizite rigardas ŝin, iom ofendite li respondas:

– Sinjorino, en mia profesio oni ne laboras per tiel komplikaj nocioj. Bonvolu diri, mi petas vin, kion vi deziras, kaj ni precize laŭfaros la mo-

delojn.

– Ne koleru, mi ne volis vin ofendi. Eble ni iru en mian ĉambron, por priparoli la detalojn.

Ŝi ĉirkaŭbrakas la ŝultrojn de la viro, poste demetas la brakon, lasas, ke li kisu al ŝi la manon. Ili ekiras al flankopordo apud la podio.

Ili venas en ĉambreton, kies muroj estas tapetitaj per desegnoj de uniformoj en diversaj koloroj, tajloj kaj formoj.

La sinjorino prenas la manon de la viro:

– Disrigardu, ĉi tie vi trovas ĉirkaŭ cent specojn, povas esti ducent, mi ne nombris ilin. Kreu novan, tute novan. Konsideru: se tia konkreta simileco kreiĝas ĉe ni, tuta institucio estos false engaĝita.

– Sinjorino, vi estas genia. Vi nun sukcesis komprenigi ion al mi. Ĉu mi rajtas vin kisi?

La sinjorino ridetas?

– Se tio gravas al vi.

La viro ne respondas, brakumas, kisas ŝin. Kondukas ŝin al la divano, kuŝigas, komencas malvesti ŝin, enmanigas ŝiajn mamojn.

– Vi ne pensis, ĉu ne, ke mi havas mamojn, ja estis tiel vireca, kion mi diris? – ŝi demandas.

Ŝi levas la manon al la tablo, funkciigas la gramofonon. Vira ĥoro kantas per raŭka voĉo strangan kantikon hebrean. La viro ekatentas la kanton, observas ŝian vizaĝon.

– Ĉu vi estas juda? – li demandas.

– Ne, mi ne estas juda. Mi estas greka.

– Kion vi deziras? Kiel vi deziras?

– Mi volus stari antaŭ spegulo. Mi volus vidi niajn vizaĝojn, kiam al ni estos bone – diras la virino.

Ili stariĝas, estas nudaj.

Mankas spegulo en la ĉambro. Malrapide ili eliras en la koridoron, al la ĝisplanka spegulo, fiksita sur la muro, ili kuŝigas sur dika tapiŝo.

3

Longa, aperta Ferrari venas al la traarbara vojo. Ĝi haltas ĉe la vojkruciĝo.

Fosrande tabulo staras: averto skribita en la greka, franca, angla kaj germana: „Privata areo! Eniri malpermesite! Foti malpermesite!”

Juna viro elaŭtiĝas, tenas fotilon enmane, fotas la tabulon, la vojon, poste plupaŝas, eniras la arbaron, ankaŭ tie li fotas. Faras kelkajn paŝojn inter la arboj, ekiras returne, enĵetas la fotilon sur la postsidilon de la aŭto, sidiĝas al la stirrado, ekfunkciigas la motoron.

Malrapide li veturas sur la vojo.

Ĉe la unua vojokurbo arbargardisto kun pafilo paŝas antaŭ lin el inter la arboj, manavertas, ke li haltu. La viro haltigas la aŭton.

– Pardonu min, sinjoro, kien vi bonvolas? – demandas la arbargardisto.

– Ĉi tiu vojo kondukas al la Metaksas-linio, ĉu? – redemandas tiu.

– Kial min vi demandas? Vi devus pli bone scii, laŭ la numerplato vi estas lokano – diras la arbargardisto, poste paŝas subite al la aŭto, enŝovas sian manon al la postsidilo, ellevas la fotilon de la viro:

– Sur la tabulo, kiun vi fotis, staras ankaŭ, ke la trapasantoj estas petataj ne foti – li diras, dum li elprenas la eksponitan filmon el la aparato, eltiras ĝin, por ke ĝi ricevu lumon, poste forĵetas ĝin en la vojfoson.

– Vi uzas perforton kontraŭ mi – diras la viro kun rideto.

– Nur ĉar vi perforte penetris en ĉi tiun privatan areon. Cetere mi petas vin, bonvolu returni vin!

La viro elpoŝigas koverton, transdonas ĝin al la arbargardisto:

– Mi havas invitilon, mi rajtas eniri.

La arbargardisto transprenas la koverton, levas el ĝi mallarĝan kartonon, zorge, esplore observas kaj tralegas ĝin kaj ekparolas:

– Mi ne rajtas enlasi vin, sinjoro. Necesas tri rekomendoj, vi eĉ unu ne havas.

– Mi opinias, tiaj problemoj solveblas. Kiom mi donu?

– Ne ofendu min! Mi avertas vin, returnu vin!

– Akompanu min al la direktorino!

– Mi ne rajtas, sinjoro.

– Voku ŝin per radioaparato!

– De kie vi scias, ke mi havas radioaparaton? La viro ridetas:

– Mi nur divenis.

La arbargardisto senvorte eniras inter la arbojn, neaŭdeble mallaŭte vokas la fortreson per la aparato.

Dume la viro, kovrante la aparaton per sia korpo, volvas novan filmon sur la bobenon, elujigas la aparaton, rapide enpoŝigas ĝin, ĵetas la ujon inter la arbustojn.

La arbargardisto revenas el inter la arboj, haltas ĉe li:

– Bonvolu veni, mi akompanos vin – li diras.

– Sidiĝu apud mi!– proponas la viro.

La arbargardisto enaŭtiĝas al la viro, ili ekveturas.

– De kiam vi servas ĉi tie? – demandas la viro.

– Ekde duonjaro.

– Kian salajron vi havas.

– Mi ne rajtas malkaŝi ĝin, sinjoro.

– Ĉu vi havas familion?

– Mi havas du infanojn, du filinojn, unu aĝas dek kvin, la alia dek kvar – respondas la arbargardisto.

– Ĉu vi jam renkontis fremdulon ĉi tie, en la arbaro?

– Ekskursantoj misvojadas. Venontjare ĉio estos ĉirkaŭbarita.

– Kial vi havas kuglan pafilon?

– Tian mi ricevis. Mi diris, pli taŭgus ŝrota, sed oni diris, mankas tia.

– Mi komprenas – diras la viro.

La arbara vojo plilarĝiĝas, kondukas al alta, dika betonmuro. En la muro malhelas larĝa, ŝlosita ŝtalpordo. La aŭto proksimiĝas paŝrapide al ĝi.

La arbargardisto denove elprenas la radioaparaton, donas signalon:

– Ha lo, ha lo, ĉi parolas dek du, mi petas malfermi la pordon.

La pordo aŭtomate malfermiĝas, ili enveturas en samtiel betonmuritan kortegon, kies parkadejo plenas de aŭtoj. Ĉiuspecaj fabrikaĵoj, de diversaj nacioj troviĝas inter ili: longaj sportaŭtoj, larĝaj, nigraj luksveturiloj staras unuj apud aliaj. Inter la aŭtoj promenas viroj,

virinoj, plue, antaŭ vitroflanka dometo atende staras grupo da viroj.

La viro retrostiras en parkadlokon. Unue la arbargardisto, poste ankaŭ li elaŭtiĝas. Tiu adiaŭas lin:

– Ne koleru min, sinjoro, mi nur plenumis mian devon.

– Nenio malbona, ĝis revido – respondas la viro. Intertempe alvenas la sinjorino. Ŝi etendas la manon, la viro kisas ĝin kaj prezentas sin:

– Mi salutas vin, sinjorino, mi estas Petro Kirios.

– Bonvenon! Edit NiĤarĤos, la direktoro. Ĉu estas vi, kiu ne havas rekomendojn?

– Mi ne trovis.

– Lasu vidi vin! Vi ne aspektas tia, kiu spionas.

– Kial, kiu asertas, ke mi spionas?

– Oni anoncis tiel.

– Mi nur fotis en la arbaro.

– Ŝajnas al mi, eĉ tiom sufiĉas. Kvankam mi devas diri al vi, ni havas nenion por kaŝi. La estraro de la Societo decidis tiel, mi povas fari nenion alian, ol plenumi la instrukcion. Ĉu vi loĝas en la ĉirkaŭaĵo?

– Jes, ĉi tie ni havas bienon.

– Mi ankoraŭ ne aŭdis pri vi.

– Vi restadas ĉi tie de nelonge.

– Vere, de nelonge.

– Cetere la bieno apartenas al mia patro, li mastrumas ĝin.

– Kaj vi, kion vi faras?

– Nenion.

– Kial vi venis ĉi tien?

– Mi scivolas.

– Ni ne ŝatas grekajn gastojn.

– Kial?

– Ĉar neniu estas profeto en la propra urbeto, se diri banalaĵon.

– Kion vi timas?

– Mi ne timas, sed ne volas, ke oni miskonu nin. Pro tio vi devos subskribi deklaron, en kiu ni precize priskribas, kion ni faras ĉi tie, kaj vi atestos, ke estas vero, kion mi diras. Se ekstere vi asertos ion alian, la tribunalo kvalifikos tion kalumnio.

– Volonte mi subskribos ĝin.

– Do en ordo, venu, mi akompanos vin. Mi respondecos pri vi, mi estos via rekomendanto. Malkaŝu tamen, de kie vi sciiĝis pri ni?

– De iu s-ro Haecker, kiu same venos kaj partoprenos la ludon. Li estas kliento de mia patro kaj tre ŝatas nekutimaĵojn.

– Ĉu?

– Li jam elprovis ĉion.

– Mi ĝojas havi tiel kvalifikitajn gastojn. Venu, ni iru.

Ili ekmarŝas. La sinjorino ridetas:

– Ĉu vi kunportis sufiĉan monon? Ni akceptas nur kontantan.

– Mi kredas kunhavi sufiĉan. Ĉu dek kvin mil sufiĉas?

– Apenaŭ. Ĉu vi havas vivasekuron?

– Jes. Haecker konigis ankaŭ la tekston.

– Bone, transdonu ĝin al mi!

La viro elprenas, etendas al ŝi polison.

Ili venas en la kasĉambron. Granda vitra septo dividas la klientejon disde la laborspaco. Ses giĉetoj estas enkonstruitaj en la septo, malantaŭ ili sidas ĉarmaj junulinoj. Antaŭ ĉiu fako kvar-kvin viroj staras en vico, antaŭeniĝadas malrapide. Sur molaj ledobenkoj atende sidas virinoj, virinoj.

La sinjorino montras al la unua giĉeto:

– Ĉi tie komencu! Ĝis revido! – ŝi diras kaj lasas Kirios sola. Du viroj staras antaŭ li; li ĝisatendas sian vicon. La knabino malantaŭ la giĉeto klinas sin al sia mikrofono:

– Sinjoro, viajn dokumentojn, se vi permesas. – Kirios etendas siajn paperojn.

– Ankaŭ la pasporton bonvolu, s-ro Kirios.

– Mi estas greko, mi ne kunhavas la pasporton, nur la legitimilon mi kunportis.

– Dankon, ankaŭ ĝi sufiĉas – diras la knabino.

– Kiom mi pagos, fraŭlino?

– Dek kvar mil sepcent dolarojn.

– Jen ili.

– Dankon. Bonvolu doni la polison de vivasekuro kaj vian deklaron.

– Kian deklaron?

– Laŭ kiu, kaze de akcidento dum ĉasado, neniun trafos respondeco.

– Ho jes, jen ĝi. Mi pensis pri alia deklaro. Bonvolu informiĝi ĉe la direktorino, mi kredas, ke mi devos subskribi ankaŭ alian deklaron.

– Mi demandos, sinjoro, sed nun mi finis la registradon. La direktorino telefonis al mi, ke ŝi rekomendas vin, kaj tio por mi komplete sufiĉas. Bonvolu transiri en la vitran koridoron. Ĝis revido, sinjoro.

Ankaŭ ĉe la aliaj giĉetoj la formalaĵoj jam finiĝis, kaj la viroj, virinoj ekiras direkte al la koridoro, malaperas post metalframa klappordo.

Tra la vitra koridoro la gastoj venas en la korton.

Aperas ankaŭ la sinjorino, pasas al la ariĝintaj gastoj:

– Sinjorinoj kaj sinjoroj, mi petas vin, bonvolu enviciĝi!

La gastoj aranĝas sin iom post iom en vicojn, ili opas precize tridek, ok virinoj, dudek du viroj. La sinjorino elpoŝigas tajpitan liston, komencas legi la nomojn:

– S-ro Bondy, s-ro filo Bondy, f-ino Bunyin, s-ro Charnton, f-ino Colin, s-ro Dobrovsky, s-ro Haecker, s-ro Hayan, s-ino Hidkay, s-ro Huysmann, s-ro Katharson, s-ro Kirios, s-ro Lewin, s-ino Litvak, f-ino Meghallan, f-ino Neudorf, s-ro Olivieri, s-ro Pekkinen, s-ino Perlinger, s-ro Rava, s-ro Samuelson, s-ro Schmidt, s-ro Serantoni, s-ro Soltersky, s-ro Sorensen, s-ro Steinbuch, s-ro Steko, s-ino Tabor, s-ro Tunnel, s-ro Van Delft.

Atinginte la finon, ŝi demandas:

– Kiun mi ne legis?

Neniu anoncas sin.

Ŝi daŭrigas:

– Sinjorinoj kaj sinjoroj, permesu al mi saluti vin oficiale kaj transdoni al vi la varmajn bondezirojn de la Societo. Ni esperas, ke vi amuzos vin tre bone kaj disportos la famon de la simpla homa iniciato de nia institucio al viaj amikoj kaj konatoj. Ni estas konvinkitaj, ke la Societo plenumas noblan servon, entreprenante ĉi tiun ŝajne neordinaran taskon. Enkonduke ankaŭ parole mi volus informi vin pri kelkaj aferoj, kiujn vi trovos ankaŭ skribitaj en la Regularo de nia Societo. La ludo komenciĝos post unu semajno, la 24an de aŭgusto, marde, je la dek-

kvara horo post sirenado, kaj finiĝos post kvardek ok horoj, la 26an de aŭgusto je la dek-kvara horo, same per sirenado. En la Regularo vi trovos ĉiujn rilatajn instrukciojn kaj regulojn. Ĝis la komenco de la ludo ĉiuj niaj instalaĵoj, de la hotelo ĝis la pafejo kaj maneĝo, staras je via dispono. Post la ludo ni aranĝos grandskalan ĉasadon en niaj arbaroj. La komandantojn, oficirojn vi mem nomumos, respektive elektos el inter vi. La metodojn kaj formojn de la unusemajna prepariĝo ni ne volas kundecidi, sed se vi tamen petos la helpon de niaj fakuloj, ni disponigos ilin al vi, kompreneble kun pleja komplezo. Mi kredas, tiom nun sufiĉas. Tamen se vi sentas, ke legonte la Regularon gravas por vi klarigi certajn problemojn, bonvolu demandi, disponi min!

Alta viro kun rufa hararo levas la manon en la unua vico:

La sinjorino manvokas lin:

– Disponu pri mi! Sed antaŭe, mi petas vin, diri vian nomon.

– Mi estas Edveno Sorensen. Mi ne scias, kion la Regularo skribas, eble ĝi solvas mian problemon, tamen mi demandas vin. Kiel ŝajnas al mi, ni agos sur tute nekonata tereno, samtempe viaj dungitoj havas neatingeblajn avantaĝojn kompare al ni. Ili restadas konstante ĉi tie, havas eblon ekzerci sin, unuvorte ili estas profesiuloj sur hejma kampo.

La sinjorino respondas kun rideto:

– Sinjoro, ĉi tiu demando multe okupis la Societon. Se vi atente trastudos la Regularon, vi trovos en ĝi rilatajn instrukciojn kaj kalkulojn. La nombro de la kunludantaj dungitoj sumas nur kvardek sep procentojn de via opo, kio, en la konkreta kazo, signifas dek kvar personojn. Samo direblas ankaŭ pri la pafpovo. La fiksadon de tia proporcio antaŭis ĝisfundaj esploroj de polemologiaj fakuloj, malgraŭ tio vi tamen havas rajton kontroli, revizii la ĝustecon de la ciferoj.

– Mi komprenas vin. Kaj la virinoj? Ankaŭ virinoj troviĝas inter ni. Kiel vi pesas ilin en la kalkulo? – demandas Sorensen.

– Nia Regularo lasas tion sen konsidero. Unuflanke ĉar ni partias por la virina egalrajteco, kaj aliflanke la ĝisnunaj taktikaj spertoj evidentigis, ke virinaj partoprenantoj estas ofte pli decidemaj, sukcesaj ol viraj. Mi kredas, tio ne pruvendas aparte, sufiĉe da klasikaj kaj mo-

dernaj ekzemploj troveblas en la historio. Kompreneble, kiu volas, ankoraŭ povas retreti, sed la pagitan sumon bedaŭrinde ni ne povas redoni.

– Ne pro tio mi demandis, mi ja volas partopreni, mi diskutas nur pro principaj kialoj.

– Ĉu mi sukcesis vin konvinki?

– Jes. Dankon. Pluaj demandoj?

– Mi estas s-ino Litvak. Ĉu vi ne opinias, ke kvardek ok horoj da tempo tre mallongas?

– Ĉi tiu daŭro estas elkalkulita same de fakuloj. Per internaj agadoj realigeblas preskaŭ ĉiuj karakterizaj trajtoj, faktoroj de la milito. Mi esperas, ke vi same spertos tion, sinjorino.

– Ĉu disponeblos sanitara taĉmento por la flegado de vunditoj?

– Ne disponeblos. En la daŭro de la dutaga batalo vunditoj povos ricevi nur unuan helpon. Post la fino de la ludo ni certigos, kompreneble, la plej modernan kuracan prizorgon. La partoprenantoj ricevos kompletan sanitaran pakon por la daŭro de la ludo, kaj dum la unusemajna prepariĝo ili povos ricevi ankaŭ prikuracan instruadon, se dezirote.

– Dankon, mi komprenas – respondas s-ino Litvak.

– Plu, gesinjoroj, kiu ankoraŭ demandos?

– Mi estas Viktoro Katharson. Ĉu ni povos ekzameni la terenon?

– Kompreneble. Vi ricevos precizajn, detalajn mapojn, kaj vi povos ekzerci vin ekstere, sur la tereno mem. Se vi tiel decidos, la tutan semajnon vi povos pasigi ekstere.

– Mi ne scias, ĉu entute necesas la fortreso? Se oni devas kontraŭbatali tiel dikmurajn betonajn fuortojn, kiaj ĉi tiuj, kaj la sieĝantoj posedas nur manarmilojn el la dua mondmilito, ĉia entrepreno ja destiniĝas al certa fiasko.

– Mi kredas, unue vi devus legi la Regularon. Vi trovos en ĝi la rilatajn instrukciojn, konceptojn, eĉ kalkulojn. La sieĝenda fortreso situos ekstere, sur la batalkampo, havos nenion komunan kun la ĉefkonstruo, kun la renovigitaj restaĵoj de la Metaksas-linio. Ĝi estos kunmuntita sur la tereno mem, ĝiaj plastaj muroj estos alportitaj surloken

antaŭ la komenco de la ludo. Sur ĉiu kvadrata metro de la muroj troviĝas dek kuglotralasaj tavoloj de difinita mezuro en tute hazarda disaranĝo, kaj la sturmantoj havas ŝirmveŝtojn, do la ŝancoj estas egaligitaj. Ĉu mi trankviligis vin, sinjoro?

– Jes, mi kredas, la afero tiel enordas.

– Pluaj demandoj?

– Mi estas s-ino Tabor. Mi volus demandi, ĉu ne malhelpas, ke eĉ unu militservinto ne troviĝas inter la gastoj, do ke la tuta societo estas sensperta?

– Pri ĉi tiu demando okupiĝis speciala grupo de ekspertoj. Ili kolektis indikojn pri anoj de ĉiuj potencialaj familioj. Ĉe la elekto plej pezis la enspezaro, kiu ebligas elspezon de dek kvin mil dolaroj por tia kaj tiom daŭra amuzo, kiel la nia. La enketo rezultis, ke kvardek tri procentoj de la konsidereblaj viraj familianoj partoprenis militon, kvindek kvin procentoj kutime ĉasas aŭ celpafas.

– Ĉu ankaŭ la infanoj enestas en ĉi tiu nombro?

– Jes. Ekde la dek-sepa jaro.

– Kaj la virinoj?

– Kvardek procentoj de la virinoj ĉasadas, okupiĝas per celpafado.

– Kaj kio sekvas el tio? – demandas s-ino Tabor.

– El tio sekvas, ke laŭ la leĝoj de probableco preskaŭ maleblas, ke la hazardo kunigos grupon de gastoj, en kiu almenaŭ tridek procentoj de la tuto ne sperte manipulas armilojn.

– Min interesas ĉi tiu kalkulo. Ĉu ankaŭ liston vi havas pri ĝi?

– Aparta volumego estas aldonita al la kalkuloj, kun preciza nomlisto en ĝi.

– Ĉu ankaŭ mi enestas?

– Vi povas enrigardi, sinjorino, tutcerte vi enestas. Demandu trankvile, gesinjoroj, ĝis vespermanĝo ni havas ankoraŭ duonhoron.

– Mi estas Bondy, la patro. Mi aŭdis, el la unuaklasaj apartamentoj oni povas rekte telefoni kien ajn. Mia edzino troviĝas en Kortena…

– Kompreneble, kiam ajn vi povas teleparoli kun ŝi, escepte la bataltempon.

– Mi pensis same, sinjorino. Dankon!

– Mi nomiĝas Konstantin Lewin. Kian uniformon ni surhavos?

– Kian niaj karaj gastoj deziras. Memkompreneble, vi devas atendi la rezulton de la lotado, ĉar se vi iĝos defendantoj, vi ricevos uniformojn el simpla ŝtofo, sed se atakantoj, tiam ŝirmitan. Iun ajn el la uzitaj dum la dua mondmilito vi povas elekti. Se vi volas, vi povas ĉiuj porti la saman, se vi volas, ĉiu alian: usonan, anglan, germanan, rusan, italan, norvegan, polan – laŭ propraj gusto kaj plaĉo. Elektos vi. Sed mi kredas, baldaŭ tempos reiri la hotelon, vi povos komenci la vespermanĝon. Antaŭ ol vi foriros, mi tamen volus prezenti al vi la kontraŭulojn. Mi vokos ĉi tien niajn dek kvar dungitojn, kiuj por kvardek ok horoj iĝos por vi plej sovaĝaj malamikoj. Interkonatiĝu, akceptu ilin kun bona volo. Plue vi renkontos ilin nur ludkomence.

El la koridoro aperas solduloj, dek-kvarope, gvidataj de Narviks.

Ili viciĝas antaŭ la gastoj, honorsalutas. Portas grize bluan, duoncivilecan uniformon, kampokoloran mantelon surŝultre.

El kaŝitaj megafonoj aŭdiĝas gaja, viglatakta muziko.

La du societoj intermiksiĝas, gastoj kaj solduloj reciproke manprenas, la solduloj galante mankisas al la virinoj, poste ambaŭ grupoj iom post iom reariĝas.

Sorensen antaŭenpaŝas el inter la gastoj:

– Kiom da dungitoj vi sume havas, sinjorino? – li demandas.

– Ĉu vi pensas pri batalantaj, s-ro Sorensen?

– Jes.

– Portempe nur kvardek sep.

– Laŭ tio, dumlude vi povas ilin interŝanĝi?

– Mi esperas, s-ro Sorensen, vi ne intencis nin ofendi. Tamen por ke vi ne havu dubojn: dumlude la ludejo estos plej hermetike forfermita de la ekstera mondo kaj la centraj konstruoj. Krome la portretoj de la dek kvar dungitoj starantaj ĉi tie, disponeblos al vi, kiam ajn vi povos ilin identigi. La pureco de la ludo gravas por ni samtiel kiel por vi. Nia plej granda intereso estas, ke vi ĉien disportu nian bonan famon.

– Mi komprenas, sinjorino. Sed mi vere havas suspekteman naturon. Se nun mi povus ricevi la fotojn, mi tre dankus vin – diras Sorensen.

– S-ro Narviks, bonvolu postporti al ni la fotojn de vi ĉiuj dek kvar

en la manĝejon de la hotelo kaj transdoni ilin al s-ro Sorensen! – turnas sin la sinjorino al la majoro.

– Laŭ via ordono, sinjorino – respondas Narviks, kaj ekiras rapidpaŝe, malaperas post la klappordo de la vitra koridoro.

La sinjorino ekiras al la tendoforma, kvinetaĝa hotelo en la kortofundo, la gastoj disariĝe sekvas ŝin, babilante kaj ridante.

La solduloj staras senmove kortomeze.

4

En la salono de la hotelo la gastoj sidas en profundaj, remburitaj foteloj. Nur Sorensen staras antaŭ ili sur podieto. Larĝe gestante per la brakoj, li parolas:

– Mi kredas, gekamaradoj, fine de la unusemajna prepariĝo ne malutilis ankoraŭ- kaj lastafoje priparoli niajn spertojn kaj la taktikojn kaj strategion de la morgaŭa agado. Vi elektis min komandanto, kaj ni kune elektis el ni la oficirojn. Ĉi-vespere mi ne volas plu paroli pri ciferoj, mapomarkoj, armiltipoj, batalgvidado. Pli precize dirante: ne seke, oficialeme. Ni aranĝas la ĉi-vesperan LSD-ludon, por elfundigi el via konscio ĉion ĝis nun ne liberigitan, kaj atentante la kaŝitajn motivojn, eventuale transformi nian strategian koncepton, fortigi tiujn, en kiuj mankas aŭ malforte manifestiĝas la grupkoheraj streboj. Do, gekamaradoj, nun vi devas paroli. Multe, kiom eblas. Ne gravas, pri kio, nur parolu, komencu la vojaĝon, mi rolos kiel pridemandanto, aranĝanto, naviganto, kiu ne ofendas, nur puŝas al la vero, de kiu ne necesas forkuri, kiu nur disĵetas la obstaklojn. Komencu do! Mi vokas vin, Bondy, parolu!

La gastoj rigardas Sorensen ebriaj, el langvoraj okuloj. Bondy stariĝas, okulfiksas senmove, insiste la krucon sur la muro, poste langostumble, sed klaravorte komencas paroli:

– La komandanto estas vi, Sorensen. Ĉu vi scias, kio estas la tri ĉefaj ecoj devigaj? Vi ne scias. Mi diros al vi: inteligento, vivenergio, memrego. La inteligento. Ĉu vi povas mezuri la forton de inteligento sur koloj de ĉevaloj? Mi devus paroli ankaŭ pri atentemo, mi transportas ĝin ĉi tien, sur ĉi tiun krucon, sur ĉi sen-Jesuan krucon. Rigardu, tio estas seĝoj. Ankaŭ la bildoj gratvundas min, mi sangas pro ili. Mi klinas la kapon al ili, ŝteliras tra ili al la tegmentoj…

Sorensen levas la manon:

– Kial vi ne parolas pri vi mem?

– Pri kio?

– Pri vi mem.

– Vi devus kompreni, ke mi stariĝos aliloke, ke el tia angulo nur plu-

vo povas provadi kontraŭ mi.

– Mi ne komprenas vin, Bondy. Diru, kial vi estas kun ni en ĉi tiu sepa nokto? Ne recitu poemojn, poemojn povas reciti nur knabinoj.

– Kial vi amas knabinojn, Sorensen? Vi havas rufan hararon, ĉu pro tio vi frenezas por virinoj?

– Mi amas ilin, ĉar ili pluiras.

– Kial, ĉu vi ne pluiras?

– Nur se oni lasas min.

– Bone, Sorensen, vi same kapablas reciti poemojn. Nun mi diros, kial mi estas kun vi en ĉi tiu sepa nokto. Sobre, tre mallaŭte, ke en la subaŭskultiloj ĝi levu nur la kolon, kiel ĝirafo, kaj neniu aŭdu ĝiajn piedojn. Mi diros al vi. Vidu, jen antaŭ mi sidas mia filo, ankaŭ lin oni devus ellevi.

– Kial vi kunprenis vian filon?

– La edzino sidas enhotele en Kortena kaj atendas min.

– Kial vi ne kunprenis ŝin?

– Ĉar ŝi kontraktis pri atendado. Ŝi atendas, ĉiuhore trinkas du litrojn da akvo. Ĉu mi povas diri, kial mi estas kun vi en la sepa nokto?

– Diru, Bondy, ni tre scivolas.

– Mi volas for de la triangulo.

– De kiu triangulo?

– Ĉu vi ne konas la triangulon? Ĝiaj pintoj estas Bermudoj, Bahamoj kaj Jamaiko. Tie ŝipoj alfundiĝas, aviadiloj kraŝadas. Fermitaj lokoj, vi ne povas alveturi.

– Jes, mi jam aŭdis pri tiuj regionoj; onidire vulkanaj, magnetaj.

– Mi alveturis, Sorensen. Veturis per jaĥto, donis monon, oni enlasis min. Kaj en ĝia centro mi vidis virinon dronontan. Mi eltiris, kunprenis ŝin en mian hejmon. Ŝi ne scipovis paroli. Forgesis ĉion, ne sciis, kiel ŝi trafis en la maron. Kurba, mola, ŝi vivis en la kastelo kiel silko agitata. Poste ŝi iom post iom ellernis la anglan, sed rememoris nenion. Oni devis reinstrui ŝin pri ĉio. Ŝi lernemis, volis scii ĉion. Mi enamiĝis al ŝi, edzinigis ŝin. Vespere ŝi eliradis en la parkon kaj dancis nuda. Ĉiam same. Mi desegnis la figurojn, kiujn ŝi dancis, mi montros ilin. Ŝi dancis nur en sennubaj noktoj. Mi igis ekzameni ŝin, oni diris,

nenio eksterorda estas pri ŝi, ŝi sanas. Ŝi afablis al mi, tre amis min, estis belege kune. Poste iun nokton mi postiris, kaŝobservis ŝin, ŝi mortigis nian ĝardeniston. Trapikis al li la koron, poste trenis lin en la kelon, dissekcis lin, ĉefe lian cerbon ŝi ekzamenis atente, faris notojn pri ĝi. Plorante mi demandis, kial ŝi faras tion. Ŝi respondis, ke ŝi ne povis kontraŭstari la tenton. Longe ni babilis; la du ĉambristojn ni jam kune mortigis. Neniu serĉis ilin, ili estis soleculinoj. Alico dancadis vespere sur la gazono. Kaj iun tagon ŝi malaperis. Mi serĉis ŝin ĉie, kuradis kiel frenezulo. Mi ne trovis ŝin. Fine terura konjekto kaptis min, mi iris al la triangulo. Kapitano de milita ŝipo rakontis, ke mia edzino proprariske eniris la triangulon; kaj neniam plu ŝi elvenis. Ankaŭ la jaĥto malaperis. Poste mi edzinigis Irenon, kaj jen mia filo…

– Kiu estis tiu virino?

– Mi ne scias, de kie ŝi venis. Ŝin interesis cerboj kaj historio. Eble ankaŭ kristaloj estis en ŝi, kvazaŭ ĉiam neĝo kovrus ŝiajn manojn.

– Ĉu neĝo?

– Jes, neniam degelanta. Varma, tamen daŭra.

– Kaj via filo?

– Jen li, ĉi tie. Ankaŭ vi komprenas, ĉu, kion mi diras.

La filo stariĝas, iras al sia patro, senvorte ĉirkaŭbrakas kaj sidigas lin, poste turnas sin al Sorensen:

– Laca, tro multe li laboras. Ni havas dek mil dungitojn. Vi ne povas imagi, kiel lacige estas.

– Mi povas imagi, knabo. Ĉu via patrino ne zorgas pro vi?

– Certe ŝi zorgas, sed ŝi bezonas tion. Se ŝi sentas, nenio malbona okazos al ni, ŝi volas mortigi sin. Mi ĉiujare konkursas ĉe la Salaj Lagoj, sed ne por ke la patrino trankviliĝu. Patro same, ŝatas fari ion kaj tion. Ĉu ni povas iri dormi? Morgaŭ estos grandaj fortostreĉoj, mi opinias, ni devus enlitiĝi. Ankaŭ ĉi tiu historio originas el laceco kaj la acido. Oni ne perfortu, li misfartiĝos.

– Bone, supreniru!

La filo levas sian patron en la sinon, forportas lin el la ĉambro.

Sorensen ridetas kontente:

– Bone, tre bone. Do ni daŭrigu. F-ino Bunyin, kiel vi fartas?

– Mi freneziĝos pro vi, viroj. Neniu volas geumi kun mi.

– Ne diru, karulinjo. Ĉiunokte vi kuŝas kun aliulo.

– Mi ne memoras.

– Vi havas kurtan memoron.

– Tamen mi ĉion memoras. La plej malgranda knabino alvenis taksie, oni ĉiujn senvestigis. Mi staris sur la ŝtona planko, malvarmis al miaj plandoj, poste oni sendis min lavi vazojn. Mi ne vidis tie virojn.

– Kvankam da ili svarmis tie.

– Iu enbruligis maizgrajnojn al mi en la dorson, poste mi sonĝis, ke bestoj kliniĝas super mi. Mi devis tuŝi ŝiritajn kablojn.

– Kiom vi aĝas?

– Dudek naŭ.

– Ĉu vi havas gefilojn?

– Ne.

– Kial ne?

– Mi ne scias. Nun mi jam devus havi. Mi faros unu al mi.

– Prefere faru aliulo.

– Bone, faru aliulo.

– Parolu pri vi!

– Ĉio parolas pri mi. Ĉiu minaco eldiriĝas kontraŭ mi. Mi scias nenion alian.

– Ĉu vi timas?

– Jes.

– Kion?

– Ĉi tiujn plenkreskulajn grupojn. Ĉu vi scias, ke personoj, kiuj dum sia vivo relative frue enekzerciĝis roli kiel gvidantoj, poste plej ofte superecas en la konkursado por gvidaj roloj. Kaj ke tio direblas ankaŭ pri la idoj de familioj, starantaj relative alte en la hierarĥio de la respektivaj socioj? Direblas ankaŭ pri junuloj, kiuj rikoltis sukcesojn en lernejo, elstaris en sportoj aŭ havis konfidencajn oficojn.

– Bone vi ellernis tion. Kion vi celas per tio?

– Mi volas iĝi komandanto.

– Kial?

– Ĉar mia patro situas tre alte.

– Ni scias.

– Ankaŭ mi havis konfidencan oficon. Permesu al mi, plenumi konfidencan oficon!

– Morgaŭ ni decidos pri tio.

– Ne morgaŭ. Nun, tuj!

– Nun ne eblas.

– Kial ne?

– Ĉar vi ankoraŭ devas rakonti.

– Mi ne havas rakonton.

– Jes ja. Antaŭhieraŭ vi rakontis unu al mi.

– Do, kion alian vi volas?

– Rakontu ĝin ankaŭ al la aliaj!

– Ĉu rakontinte mi povos iĝi komandanto?

– Eble.

– Tiam mi ne rakontos. Rakontos nur, se mi certe iĝos komandanto.

– Ne tre gravas, ne rakontu, se vi ne volas.

– Mi ne volas.

– Tiam diru, kion vi vidas.

– Bovinojn, ili trenas sin, piedlevas polvon, kvazaŭ volus fuĝi el magazenoj. Kaj mi ĉiam staras antaŭ amuzpafejo, vi scias, antaŭ tiu ruĝa budo, kie du magraj viroj krias, ke mi alproksimiĝu. Jam ne eblas plua prokrasto, mi aliros kaj celpafos. Al ladaj hundoj, cervoj, fadene movataj ursoj. Sed tiom ne sufiĉas, mi parolas kun la du viroj, ili alportu vivajn bestojn. Kaj ili alportas. Ruĝokulan, blankan kuniklon, kapreolon, cervon, urson. Alportas ankaŭ elefanton. Ĉiujn mi trafas, ili kuŝas vice antaŭ la budo, la elefanto ne lokeblas sur la placo, ĝia ombro etendiĝas trans la vojon. Poste ankaŭ tio ne sufiĉas, mi bezonas vivan homon. Ankaŭ tion ili alportas. Belan junan viron. Li havas bluajn okulojn, lace li palpebrumas, mi celas al lia frunto. Li milde sidiĝas, ne movas sin plu, truo ruĝas sur lia frunto. Poste ankaŭ tio jam ne sufiĉas, mi bezonas homon, kiu havas fusilon. Samtempe ni ekpafas, kaj mi sentas, ke li trafis min. Nenio doloras, nur ĉio blankas tiel, ke oni povas legi ĵurnalon en la blankaĵo, kaj mi povas nur komenci la legadon.

– Perfekta, kion vi diris, pli bona ol via rakonto.

– Ĉu ankaŭ per tio ĉi mi povas iĝi komandanto?

– Kial vi volas iĝi komandanto?

– Por tio mi venis ĉi tien.

– Morgaŭ denove anoncu vin, vidu, la aliaj rigardas ĉiuj aliflanken.

– Se tiuj ebrias, ne eblas batali kune kun ili. Morgaŭ mi iros aparte, vin mi ne bezonas. Sola mi iros al la amuzpafejo.

– Bone, sed nun vi iros dormi.

– Mi ne volas dormi.

– Tiam vi ne povos iĝi komandanto.

– Bone, mi foriros. Saluton, ebriaj porkoj! Nun mi dormos kaj morgaŭ komandos vin ĉiujn. Ĉiurilate. Ankaŭ rilate al tio, kiu restu viva. Mi tion ordonos.

Ŝanceliĝe, kun singardaj paŝoj la knabino iras al la pordo, malsuprenlasas sin kvarpiede, elrampas en la koridoron. Sorensen staras muta, atenta kaj post ol la knabino forlasas la ejon, li returnas sin al la gastoj.

– K-do Pekkinen, kiel vi fartas?

– Kiel dio, oldulo. Bonege. Sur ĉi tiu ŝipo mi transiros.

– Kien?

– Ĉu ne indiferente?

– Vi pravas, tute indiferente.

– Kiom da ĉekblokoj vi havas, Sorensen?

– Tre multe.

– Mi nur unusolan.

– Kial?

– Ĉar en ĉi tiu transoceana ŝipo da lampoj multas.

– Mi ne komprenas vin.

– Ne gravas. Faktas, ke da lampoj multas. Kaj se mi surverŝos vin, vi fumos, kvazaŭ estus tre malvarme. Kiel sen vestoj dum frosto.

– Mi malĝojos, se vi surverŝos min.

– Ne gravas, vi dilatos, ni metos du panojn al vi sub la akselojn, kaj vi ekiros. Vi estos la komandanto. Vi malfermos la tirkestojn, enrigardos la poŝojn, pridemandos ĉiujn, kiel nun, do vi estos la komandanto.

– Kial vi ofendas min, Pekkinen?

– Vi ne sentas eĉ, ke mi amas vin, vi estas fakte komandanto, Sorensen. La ĉefa komandanto. Pli ĉefa komandanto vi povus esti nur inter fiŝoj. Tiuj pasas unuj preter aliaj, kaj gestas gravaĵojn al si reciproke per la naĝiloj. Vi estas nun, kiel buŝo malfermita. Se vi apudmetos multajn apertajn buŝojn, elformiĝos ĉefkomandanto.

– Ĉu vi ŝercas pri mi?

– Surŝipe oni povas nur ŝerci. Se ie ni surteriĝos, mi ankaŭ ploros. Anstataŭ ĉiuj, ankaŭ anstataŭ ĉi tiuj mutuloj. Niaj okuloj ruĝos kiel tiuj de kunikloj, kaj oni kondukos min al amuzpafejo. Sorensen, ĉu vi ŝatas celpafi?

– Mi ŝatas.

– Tiam rigardu miajn okulojn. Nun ili ankoraŭ verdas, sed tie, surborde, kie mi ploros, ili ruĝos. Alrigardu bone. Oni devas celi al la mezo de la suba duoncirklo. Bele vi desegnis ĝin ĉiutage sur la tabulo.

– Vi estas mia amiko.

– Ne gravas, celi tamen necesas. Nun mi komencas timi, Sorensen.

– Kion?

– Mi ne scias. Ĝi kurbigas kaj senatente trapasas min. Por kio mi bezonis enpreni ĉi tiun acidon?

– Por la vojaĝo.

– Samloke mi staras ekde tiam. Oni devus munti radojn sub la ŝipon. La akvo konsumiĝis, vi povas vidi, kvankam virino en Kortena sencĉese trinkas kaj pisas.

– Kiaj radoj necesus?

– Gravas, ke ili havu multajn spokojn.

– Por kio?

– Por ke bestoj povu balanciĝi sur ili. Helikoj, fiŝoj, marsupiaj insektoj, ĉiuspecaj animaloj.

– Marsupiaj insektoj ne ekzistas.

– Tiam pantoflobestetoj. Helflavaj pantoflobestetoj.

– Pantoflobestetoj ekzistas. Nun enkapiĝas al mi: vi bezonos viajn energiojn.

– Mi iros, sed mi ne povos dormi, mi timas.

– Ĉu mi venigu kuraciston?

– Ne necese, mi klopodos. Bonan nokton!

– Bonan nokton!

Pekkinen elŝanceliĝas tra la pordo, Sorensen turnas sin al Steinbuch.

– Kioman tablojdon vi glutas?

– La sesan.

– Ĉu ne troas tiom?

– La afero tire funkcias.

– Ĉu ĝi ekfunkciis?

– Jes, sed mi sentas nenion kromkutiman. Mi vidas iom pli bunte.

– Vi komandas la duan unuon.

– Jes.

– Ĉu viaj konceptoj ŝanĝigis?

– Neniom.

– Do en ordo. Ĉu vi kutimas drinki?

– Mi kutimas, tre malmulte.

– Kiel vi opinias pri niaj metodoj de gvidado?

– Mi kredas, vi estas ideala gvidanto, Sorensen. Kion vi faras hejme?

– Mi havas ŝipfarejojn.

– Mi komprenas. Vi estas karisma gvidanto.

– Dankon. Afable de vi.

– Mi kredis, vi ofendiĝos.

– Vi miskonas min.

– Mi esperas. Konfesinte al vi, mi kredas, mi nun jam povas iri dormi.

– Ne moku, iru, morgaŭ mi bezonos vin.

Steinbuch foriras, Sorensen vokas van Delft:

– Kiel vi toleras la acidon?

– Konstante mi kontrolas min, ĝi kuntiras min, ĉio samformiĝas.

– Ĉirkaŭpalpu la piedojn.

– Vane, mi perceptas ĉiam nur ebenojn. Ofte sinsekve, sed nur ebenojn.

– De kiuj koloroj?

– Ombroruĝajn kun oro. Kial la aliaj ne aliĝas al la interparolo?

– La acido izolas.

– Tiam kial ni sidas ĉi tie tridekope?

– Mi scivolis, ĉu io trabatos la muron ĉe kelkaj.

– Kaj?

– Propradire apenaŭ troviĝas iuj, ĉe kiuj io transaŭdiĝas. Tial morgaŭ mi ne aplikos ĝin.

– Ĉu vi volis apliki ĝin?

– Jes, sed mi ne faros tion. Iom da viskio ĉiuj ricevos al la matenmanĝo.

– Viskio tre taŭgas.

– Por kio?

– Por ĉio.

– Jes, mi komprenas. Kion vi faras hejme, van Delft?

– Mi havas esplorinstitutojn.

– Kion vi esploras?

– Ĉion. Ĉu vi scivolas, kiel ni eksciis, ke Alasko kaŝas en si nafton? Iu esploristo diris: kato. Se incititaj, katoj kurbigas la dorson; en la premo de la tertavoloj la nafto same kondutas, kiel sin kurbiganta kato. En Alasko fakte oni trovis nafton.

– Sprite. Kial vi venis ĉi tien?

– Ĉar mi trovas la aferon sprita.

– Ĉu vi konsentas pri miaj ideoj?

– Ne pri ĉiuj.

– Pri kiuj ne, ekzemple?

– Pri la uzo de uniformo. Miaopinie oni devus validigi unuecajn preskribojn pri uniformado, mi trovas ridinda, ke ĉiuj paradas en arbitre elektitaj vestoj. Sekve ĉi tiu ne konsidereblas milita formacio.

– Vi forgesas pri io, van Delft. Ni ja funkcias kiel milita formacio, sed abismas diferenco inter ni kaj ĉiuj ceteraj militformacioj de la mondo. Ni venis ĉi tien propraeme, trabatalos kvardek-okhoran militon, kaj ĉi tiu milito nuras por ni kiel amuzo, mi povus diri, kiel strečа aventuro. En ĉi tiun aventuron ni povas integri ĉiujn amuzerojn, kiuj ne kontraŭefikas la sukceson de niaj agoj. Se la uniformoj de la solduloj estas unuecaj, la niaj ja povas esti buntaj. La uniformo prop-

rigas al la afero naciistan, poezian koloron. K-do Rava estis militkaptita ekzemple de germanoj, ili mistraktis lin malmilde, nun li volas batali en usona uniformo, por pli efike superlukti, en la signoj de la venkinto, siajn ne malmultajn malbonajn memorojn. Hayan volas bataliri en kilto, li mem ne scias diri ties kaŭzon, eble ĉar feminaj, alivestiĝemaj altiriĝoj laboras en li subkonscie.

– Mi kredas, ĉi tiu varieco ankaŭ dampas la sukceson de niaj agoj. La krikoloraj italaj kaj francaj vestoj igas siajn portantojn elstaraj celpunktoj, ne eblas bone kamufli sin en ili, ili malfaciligas la surterenajn operacojn.

– Pri tio vi pravas, sed unu aferon vi ne prenas en kalkulon. Kiom ni perdas en la fizika efikeco de la rampado, tiom ni gajnas en entuziasmo. La soldato rampas pli pene, sed pli entuziasme, kaj ĉi tiuj faktoroj egaligas sin reciproke, eĉ: akumuliĝinte, la psikaj avantaĝoj transformiĝos en superforton.

– Eble, pri tio mi ne kompetentas, ni vidos. Mi scias nur, ke al tiaj artefaritaj sistemoj, kia la nia estas, oni devas serĉi naturajn analogiojn, por ke ili rezultiĝu bonaj.

– Mi ne komprenas vin.

– Ne gravas. Kiam taskis al ni inventi kunmeteblajn alt-antenojn, ni prenis por modelo la vertebraron de lacertoj.

– Kion komunan tio havas kun la uniformoj?

– Pripensu, Sorensen, io certe komunas. Mi ne povas dikiĝi, mi manĝis tro da ĉi tiu sterkaĵo.

– Kiom vi englutis?

– Tri.

– Ne troas.

– Al mi troas. Ankaŭ hejme mi kutimas gluti, sed malpli.

– Nun kial vi englutis tri?

– Eble, ĉar morgaŭ…

– Ĉu vi havas angoron?

– Ankaŭ tiel oni povas diri.

– Ĉu vi ne fidas min?

– Vidu, Sorensen, sufiĉe malmulte vi rakontis pri via vivo. Malgraŭe

mi fidas vin.

– Se mi bone memoras, sesfoje mi rakontis mian biografion antaŭsemajne, sed se vi volas, mi rakontos ĝin ankaŭ sepafoje.

– Ne necese, mi jam diris, mi fidas vin.

– Ne fidu min, submetu min al provo!

– Ĉu nun, Ĉi tie?

– Jes, tuj.

– Mi ne scias, kiel elprovi vin.

– Cerbumu, elpensu ion!

– Mi lacas, volus dormi.

– Mi ne foriros, dum vi ne elmetos min al provo.

– Komprenu min, mi fidas vin.

– Eĉ tiam. Elpensu ion!

– Bone. Abdiku la komandantecon!

– Ĉu vi freneziĝis? Ĉu nun, antaŭnokte de la agado?

– Jes, nun.

– Ne eblas.

– Kial?

– Por abdiki, mi devas havi la kontraŭvoĉon de la plimulto. La LSD-stato ekskludas la eblon de objektiva prijuĝo, do nun ne eblas voĉdonigi la grupon. Kaj frumorgaŭ jam estus mistempe, ĉar se oni eĉ akceptus mian abdikon, fizike maleblus transdoni la aferojn al mia posteulo. Malgraŭ ĉio, morgaŭ ĉe la matenmanĝo mi lanĉos la demandon kaj mi abdikos.

– Ne faru tion, Sorensen, mi nur ŝercis.

– Vi ŝercas malbone, van Delft. Vi aspektas lace, iru dormi!

– Mi iras. Ĝis revido, kaj ne koleru min, mi ebriis. Nun, ke mi sobriĝas, klariĝas plene al mi, ni ne povus trovi pli taŭgan komandanton ol vi.

– Kial vi pensas, ke mi bone komandas?

– Ĉar mi senpovas kontraŭ via strategio. Vi kreis originalan strategion por ni, kaj mi kredas, armeestro ne kapablas pli. Mi konvinkiĝis, ke ni venkos.

– Dankon, van Delft. La tria unuo ankoraŭ ne havas vicestron.

Morgaŭ antaŭtagmeze anoncu vin ĉe mi, mi transdonos vian nomuman dokumenton.

– Kredu min, mi ne celis tian esceptigan traktadon.

– Tio ne estas esceptiga traktado, mi nur ŝatas klarmensulojn. Cetere mi malkaŝas al vi, mi preparas surprizon por la grupo. Mi estas homo de subitaj ŝanĝoj. Vi miros, van Delft.

– Kion ajn vi decidos, vi povos ĉiam kalkuli je mi, Sorensen.

– Vi povas supreniri; dormu, van Delft, dankon! Antaŭtagmeze mi atendos vin.

Van Delft eliras el la ĉambro, singarde fermas post si la pordon.

Sorensen turnas sin al malalta dikulo:

– K-do Steko, kion vi povas diri? – li demandas.

Steko levas sin el la fotelo, komencas paroli haste-nervoze, stumpigante la vortojn:

– Necesus trarigardi la paseon kaj nunon de nia kulturo, por trovi atingojn, kiuj kontribuas al la malfermo de la pordegoj. La Biblio kaj kristanismo gravas, sed se konsideri la sociajn formojn kaj konfliktojn de la teĥnika civilizacio, ili donas tro ĝeneralan fonon, kaj krome la eŭropa koloniiga politiko tro misuzis ilin dum la lastaj jarcentoj. Por la kolorhaŭtaj popoloj la „Biblio kaj la etkosta teksaĵo” konsideriĝas ankoraŭ longe kiel ŝarĝoj, altruditaj de kristanismo. La rifuza sinteno de la katolika eklezio rilate al la reguligo de naskoj grave endanĝerigas ĝiajn poziciojn en Azio, Afriko kaj ceteraj evolulandoj. Oni bezonas trovi konceptojn kaj ekzemplojn, kiuj ja kreskas el la grundo de kristanismo, tamen vive tuŝas la problemojn de la aktualeco.

– Dankon, Steko, mi pensis ne pri filozofiado.

– Pri kio do?

– Rakontu ion!

– Kion?

– Kion ajn.

– Kial vi bezonas tion?

– Je la fino mi diros.

– Vidu, Sorensen, la paco estas blinda fenestro, ne malfermeblas.

– Kial vi diras tion?

– Mi ŝatas diri aforismojn.

– Afable deflanke de vi, sed ŝajnas al mi, antaŭe ni parolis pri tio, ke vi rakontos ion.

– Bone, tamen mi demandu: ĉu vi scias, kio estas timo?

– Diru!

– Finiteco, rigardata el-ene.

– Trafege.

– Ĉu vi scias ankaŭ, ke kiu sin malestimas, tiu estimas en si tamen tiun, kiu lin malestimas.

– Sprite – diras Sorensen.

– Jes, sprite. Iuj homoj serĉas akuŝiston por siaj pensoj, aliaj iun tian, kiun ili povas helpi, tiel estiĝas bonaj dialogoj.

– Vi estas klera homo, Steko.

– Mia edzino metis hazarde volumon de Nietzsche inter miajn vestojn, hieraŭ vespere mi legis el ĝi.

– Nietzsche estas bona filozofo.

– Mi ne ŝatas lin.

– En ordo, tamen nun ni ne diskutu pri filozofoj. Kio pri la rakonto?

– Mi diros nur la skizon.

– Bona ankaŭ ĝi, nur rakontu ion.

– Ĝi havas la titolon Masklo-roko.

– Frape.

– Ĉu vi scias, kiu estas Masklo-roko?

– Ne.

– Savinto de kurioza nanpopolo.

– De kiaj nanoj?

– Okulvitraj.

– Ne plu ekscitu min, rakontu!

– Sorensen, ĉu vi estas dano?

– Jes.

– Pro tio vi volas ĉiam aŭskulti fabelojn. Nenion mi rakontos.

– Pri kiaj okulvitraj nanoj temas?

– Beb-aĝe ĉiuj ricevis okulvitrojn, kiujn neniam ili rajtis demeti. Se oni eksciis tion pri iu, oni mortigis lin.

– Pro kia bezono?

– Por ke ili vidu sin kaj la aliulojn grandaj.

– Tra la okulvitroj ankaŭ la ĉirkaŭaĵo vidiĝis pli granda, ĉu ne? La domoj, arboj, kaj montoj.

– Ne. Nur la homoj vidiĝis pli grandaj.

– Malbona rakonto. Kaj kiu estis Masklo-roko?

– Tiu, kiu demetis siajn okulvitrojn.

– Ĉu oni mortigis lin?

– Kompreneble.

– Kaj nun, kio pri ili.

– Ili mortigis sin. La tuta nanaro.

– Kial?

– Fungo atakis la vitrojn. Ili estis tre specialaj, organikaj vitroj, oni devis demeti ilin. Kaj la nanoj ne eltenis la suferon, esti malgrandaj.

– Tiel la rakonto pli plaĉas. Kie vi aŭdis ĝin?

– Nun mi elpensis ĝin.

– Tamen diru, kie la nanoj vivis!

– Ĉi tie, arbarrande, sur eta maldensejo.

– Kion ili manĝis?

– Ĉevalojn. Multas ĉevalbredistoj ĉi-regione.

– Mi komprenas. Kaj kion ili trinkis?

– Marakvon.

– Marakvo ne trinkeblas.

– Ili havis apartajn okulvitretojn, per ili purigis la akvon.

– Vi mensogas, Steko.

– Nu, ĉu vi eble nervozas, Sorensen? Kio okazos morgaŭ al vi, se vi jam nun nervozas?

– Se min trafos malfeliĉo, ĝi trafos ankaŭ vin.

– Ne tiom certe.

– Certege, filo mia.

– Ni vidos.

– Pri kio vi esperas? – demandas Sorensen.

– Pri tio, ke iu demetos la okulvitrojn.

– De kiuj?

– Ĉu ne indiferente?

– Ne. Diru, de kiuj?

– Eble de vi, eble de mi, eble de ĉiuj.

– Vi estas idioto.

– Eble, sed vi saĝas, Sorensen, kaj mi ŝatas klarmensulojn.

– Ni ne kverelu, Steko. Se vi volas, mi faros vin mia anstataŭanto.

– Mi ne volas.

– Kial?

– Esti dua similas al la kazo, kiam trajno detranĉas al iu la lignan kruron. Verdire, oni devus ĝoji, sed pri kio?

– Vi malsaĝas, Steko. Ne ligna kruro vi estos.

– Ligna kruro saltis al mi en la menson, sed mi povus diri ankaŭ ion alian. Mi ne volas esti dua post vi.

– Estru do almenaŭ subunuon!

– Same ne.

– Tiam iru en la inferon dormi!

– Mi iras, bonan nokton!

Ŝancelpaŝe Steko eliras el la ĉambro, Sorensen sekvas lin rigarde, poste turnas sin al s-ino Hidkay:

– S-ino Hidkay, mi vidas, vi estas tro serioza.

– Mi volus min senvestigi – respondas la virino.

– Ĉu ĉi tie?

– Jes. Malrapide mi malvestos min, la aliaj eĉ ne rimarkos. Ankaŭ mia amikino, f-ino Neudorf volas malvesti sin.

– Kiam ŝi diris tion?

– Antaŭ ol gluti la tablojdojn.

– Vidu, ŝi dormas.

– Ĉar ŝi laciĝis, ne povis ĝisatendi.

– Nun ne malvestu vin!

– Kial?

– Diru prefere, kion vi faros, se vi kaptos kaj malarmos soldulon?

– Ĉu unu?

– Jes, unu.

– Kial vi ekzamenas min?

– Tio ne estas ekzamenado, min interesas nur la drogo.

– Ne interesu vin la drogo. Cetere mi faros nenion al tiu soldulo, mi lasos lin libera.

– En milito ne estas kutime, liberigi kaptiton.

– En mia milito: jes.

– Ĉi tiu estas ne via milito, sed de ni ĉiuj. Mi esperas, sobriĝinte vi ŝanĝos vian opinion.

– Laŭ mi ĝi plifirmiĝos.

– Ĉi-vespere ni venis al interkonsento, ankaŭ vi donis vian jeson.

– Mi kredas je la homa fleksebleco.

– Tio ne estas fleksebleco.

– Eĉ tiam, nun mi malvestos min, stariĝos antaŭ la tabulo, unue mi desegnos, poste demetos la robon.

– Nenien vi iros. Kie troviĝas la malsatigaj insulinaj vakcinoj?

– Ie en apoteko. En tirkestoj de panikiĝintaj farmaciistetoj, en la suda loĝkvartalo.

– Kial vi parolas konfuze?

– Ĉu mi parolas konfuze? Mi demandos ion al vi.

– Bonvolu.

– Kiom da mortintoj vi antaŭvidas?

– Ne ŝercu!

– Mi demandis serioze.

– Mi ne antaŭvidas mortintojn.

– Kie oni pafas multe, tie oni ankaŭ mortas.

– Se lerte, efike ni laboros, okazos nenio malbona. Ĉu vi timas?

– Mi ne timas. Mi volus nur scii, kial vi mensogas.

– Mi ne mensogas.

– Mi aŭdis, vi diris al van Delft: vi preparas surprizon al ni. Kion precize?

– Se mi malkaŝos, ĝi ne plu estos surprizo.

– Bone, tiam mi malvestos min.

– Kial vi volas malvesti vin?

– Ĉar la robo ne estas surprizo. Vi vidos, kiom diferencan strategion mi havas nuda.

– Iru dormi, vi lacas.
– Ĉu vi suprenvenos al mi?
– En kiu apartamento vi loĝas?
– En cent ses.
– Mi supreniros.

5

Ĉirkaŭ altaĵeto, markita per blanka flageto, staras arbustoj kun dentumitaj folioj, plue, ĉe la rando de altaĵoj laboristoj en bluaj kombineoj malŝarĝas, helpe de gruo, antaŭfabrikitajn elementojn de la kunmuntebla fortreso de sur ŝarĝaŭtoj.

Sorensen kaj Narviks venas al la flageto, manpremas reciproke. Sorensen surhavas aŭstralian kolonelan uniformon.

– Bonan tagon! – li salutas kun rideto.

– Mi gratulas vin – reciprokas Narviks.

– Permesu loti per suprenĵeto de monero. Mi ĵetos la moneron.

– En ordo – konsentas Narviks.

Sorensen suprenĵetas arĝentan moneron. Dum ĝi turniĝas en la aero, Narviks laŭte elektas:

– Dorso!

Sorensen klinas sin, rigardas la moneron, falintan sur la herbon, kaj levas sin, seke komunikante:

– Elektos vi.

Narviks respondas sen pensi:

– La fortreso.

– Vi ne tro komplezemas, sinjoro.

– Mi kredis, mi sukcesis konvinki vin, ke la ŝancoj estas egaligitaj.

– Kial do vi elektis tamen la fortreson?

– Eble la muroj influas…

– Vidu, pro tio mi diris: vi ne tro komplezemas.

Narviks disetendas la brakojn:

– En mia profesio komplezemo ne utilas. Mi kredas, vi povas transiri, gesinjoroj, por rigardi la fortreson, nun ĝi estas instalata. Kaj vi devas krome transvesti vin. Kiel vi scias, al kampaj batalantoj donendas ŝirmoveŝtoj.

– Mi scias, ni povas iri. Neniun mi kunprenos, sola mi inspektos ĝin.

– Sinjoro, la komandanto estas vi. Venu! – diras Narviks.

Ili ekiras al la konstruata fortreso.

La laboristoj kunŝraŭbas ampleksajn, altajn murelementojn, kuŝ-

igas grandegajn betonkolonojn sur la herbon, dratŝnuras al ili plastajn murojn.

Sorensen paŝas al la kamiono, alparolas laboriston, starantan sur la ŝarĝoplato:

– Bonvolu demeti por mi murelementon!

– Kiel grandan?

– Tiel malgrandan – montras Sorensen al tri-kvadratmetra panelo.

La laboristo malsuprensaltas de la veturilo, delevas la panelon, apogas ĝin al sia kruro. Interesite Narviks rigardas la scenon.

– Kompreneble, vi intencas kontroli la kuglo-tralasajn surfacojn, ĉu? – li demandas kun rideto.

– Vi trafis – respondas Sorensen.

Li prenas mezurbendon, kreton el la poŝo de sia uniformo, komencas elmezuri la supozatan lokon de la kuglo-tralasaj tavoloj. Per kreto li markas la kvadratetojn, poste levas la panelon kaj apogas ĝin al arbusto. Je dudek kvin metroj li foriĝas disde la celo, turnas sin, elprenas sian pistolon kaj komencas pafadi al la panelo. Malplenigas la tutan ŝargujon, poste reiras, zorge ekzamenas la pafospurojn. Klinas sin, detale trarigardas la panelon, kaj rektiĝinte turnas sin al Narviks:

– En ordo – li aprobas.

– Propradire mi povus ĉiumomente ofendiĝi, se mi estus sentema – diras Narviks.

– Kial?

– Vi tre malfidas.

– Kial fidi malamikon?

– Ekzistas reguloj.

– En milito oni forpuŝas regulojn.

– Nia milito idealas ĝuste pro tio, ke ni neniam forpuŝas la regulojn. Ĉu vi havas la fotojn?

– Ĉi tie, en la poŝo.

– Ĉu vi volas, ke mi kunvoku miajn homojn?

– Dankon, mi jam rigardis ilin al mi.

– Kie?

– Tio restu sekreto. Ĉu vi ne timas, Narviks?

– Pri tio mi ankoraŭ ne pensis. Cetere timo apartenas al mia profesio.

– Ĉu vi jam estis vundita?

– Jes, plurfoje.

– Kaj se foje vi vundiĝos ĝis nekapablo batali, kaj ne povos daŭrigi la laboron?

– Tiam mi komencos cerbumi pri aliaj solvoj. Ĉi-momente mi tre bone fartas.

– Ĉu ĉiuj paragrafoj de la Regularo validas?

– Mi pensas, por tio ja oni faris ĝin.

– Mi volus diri ion al vi, Narviks.

– Bonvolu.

– Se vi cedus en io aŭ alio...

– S-ro Sorensen, mi kredas, vi taksas false la situacion. Mi estis ĉiam fidinda dungito kaj nun mi estas dungito de ĉi tiu Societo.

– Laŭ mia scio dungoŝanĝo estas por vi, solduloj vivbezono.

– Jes. Sed nur post finitaj farendoj.

– Kial, ĉu Kongo estis por vi finita afero?

– Tie ni malvenkis. Tshombe ne sekvis niajn konsilojn. Tio estis finita afero. Mi ne komprenas vin, s-ro Sorensen, vi venis ĉi tien por ludi.

– Ni venis por venki, s-ro Narviks.

– Vi havas ĉiujn eblojn por tio.

– Vi mem scias plej bone, kiel tio malfacilas.

– Sen risko la ludo ne havas sencon.

– En ordo, do ni ne povas paroli prie.

– Nun ne, sinjoro. Nur post la ludo, se ni restos vivaj.

– Mi ne volus veni en viajn manojn, Narviks.

– Vi havas bonajn armilojn, entuziasmajn homojn, ŝirmveŝton, s-ro Sorensen.

– Dankon, Narviks, ĝis la revido.

– Kaj la kostumoj?

– Mi petas vin disponi, ke oni elportu ilin kamione trans la arbaron.

– Ĉu ene oni scias, kiajn vi elektis?

– En la pordistejo mi lasis precizan liston pri la mezuroj kaj specoj

de uniformoj.

– En ordo. Vi havas ankoraŭ sepdek tri minutojn, s-ro Sorensen. La sireno eksonos precize post sepdek tri minutoj. Bonvolu prepari vin! Ĝis la revido!

– Ĝis la revido – reciprokas Sorensen. Li turnas sin, ekiras al la arbaro.

La laboristoj finis la muntadon de la fortreso, grimpas sur la kamionojn, forveturas.

La realigita konstruaĵo konformas al la desegno en la Regularo. Ĝia areo ampleksas cent dudek kvadratajn metrojn, en ĝiaj muroj varias kuglo-tralasaj maldikigitaj tavoloj kun malmolaj, blenditaj surfacoj. Ĝi altas kvar metrojn, en la kvar anguloj leviĝas kvar sesmetraj ĝiroturoj, en la embrazuroj de la turoj estas instalitaj malpezaj mitraloj.

Ankaŭ Narviks ekiras al la centraj konstruoj.

Sorensen venas trans la maldensan arbaron. La ludontoj staras, sidas, kuŝas surherbe en buntaj uniformoj kun diversaj insignoj.

La voĉo de Sorensen sonas energie:

– Gekamaradoj, malvestu vin! La fortreso lotiĝis al la solduloj, ni restos sur la kampo. Tuj alvenos kamiono, alportos la ŝirmoveŝtojn. Mi inspektis la fortreson, ĉio enordas.

– Kaj se ili trompludos? – demandas van Delft.

– Ili ne trompludos. Ili ne povis antaŭscii, ke la fortreson ricevos ili.

– Nun ili ankoraŭ povas ŝanĝi la murojn.

– Ili ne ŝanĝos ilin. Ili ne pensas pri tio, ke ni ne observas ilin. Eĉ se ili observus nin per dek binokloj, ili kredus: ni faras la samon. Kompreneble, ne malutilas okulteni ilin. K-do Tunnel, bonvolu eliri arbarranden kaj observi la fortreson! La konstrulaboristoj jam foriris, rajtas veni nur dek kvar solduloj, neniu kroma. Jen la fotoj, identigu ilin! Ĉu via binoklo taŭgas?

– Mi mem elektis ĝin, do ĝi taŭgas – respondas Tunnel.

– Do la tasko fareblas?

– Jes ja, fareblas.

– Mi petas la estrojn de la subunuoj, kamaradojn Katharson, Steinbuch kaj s-inon Hidkay, bonvolu veni al mi!

La tri subunuestroj paŝas antaŭ lin.

– K-do Katharson, ĉu la armiloj pafpretas? – li demandas per klaka soldatvoĉo.

– Jes ja! – respondas Katharson.

– Ĉu elprovitaj?

– Jes ja!

– La flagoj?

– Envolvitaj.

– Malvolvu ilin!

– Jes ja!

– Kiujn kolorojn vi elektis finfine?

– La nia estas tuta blua – respondas s-ino Hidkay.

– La nia nigra, kun blanka cirklo meze – respondas Katharson.

– Ni elektis verdan, kun du leonoj ambaŭflanke – respondas Steinbuch.

– Dankon. Mi petas vin rapidi, ordonu al viaj homoj malvesti sin, por ke post alveno de la vestoj ili povu tuj transvesti sin. Ni ankoraŭ havas duonhoron.

Alvenas la kamiono, returniĝas en la maldensejo, du laboristoj singarde demetas la vestopakojn sur la herbon, kaj suprensaltinte la ŝarĝoplaton, ili reveturas.

La ludontoj rapide malvestas sin, kunfaldas siajn vestojn, elektas el la pakoj la menditajn, laŭnome preparitajn pecojn. Tre rapide ili transvestas sin, nur la ok virinoj kombas, ŝmiras sin pli longe malantaŭ arbustoj.

Sorensen rigardas ilin maltrankvile, senpacience, poste iras al la rando de la arbaro, paŝas al Tunnel:

– Kion vi spertis?

– La dek kvar solduloj alvenis la arbaron.

– Ĉu vi identigis ilin?

– Jes, estas tiuj, la elektitaj.

– Ni vidos. Iru, ankaŭ vi transvestu vin!

– Jes ja!

Sorensen rigardas al sia horloĝo, reiras al la ludontoj. Ĉiuj tri sub-

unuoj jam viciĝis. Katharson staras antaŭ la unua grupo, poste lia viculo Tunnel. La duan grupon estras Steinbuch, lin postas Charnton, la trian grupon antaŭstaras s-ino Hidkay sekvata de van Delft.

La diversaj buntaj uniformoj brilas, tra la ŝtofo ekglimadas la maldikaj kontraŭkuglaj platoj.

Aŭdiĝas zumado de helikoptero, poste aperas ankaŭ la flugveturilo mem. Ĝi flugas super la maldensejon inter la fortreso kaj la arbaro, haltas, ŝvebas kvazaŭ senbrue. Ĝia pordo malfermiĝas, la piloto elĵetas bluan flagon. La flago terenfalas.

Akra, intermita sirenado signalas la komencon de la ludo. La kampo iĝas komplete silenta, aŭdeblas nur la konataj bruetoj de la maldensa arbaro. En la enkaviĝo malantaŭ la arboj staras vice la ludantoj. Sorensen, vestita en aŭstralia kolonela uniformo, promenas antaŭ la vicoj, lia voĉo nekutime akras:

– Nun estas la dek-kvara. Bonvolu alĝustigi viajn horloĝojn. Post precize tridek minutoj, je la dek-kvara kaj tridek ni atakos. La subunuoj, gvidataj de siaj estroj, disvolvos sin, ŝargos la armilojn, penetros antaŭen sub kamuflo ĝis la arbustoj antaŭ la fortreso, poste levos sin ĉirkaŭ cent metrojn for de la fortreso, malvolvos la flagojn, atakos kun impeta forto inter laŭtaj krioj.

Lewin, vestita en uniformo de germana infanteria kapitano, demandas mirigita:

– Kial tiel? Hieraŭ vespere ni priparolis la strategion, laŭ kiu ni atendos ĝis la nokto kaj tiam ĉirkaŭprenos la fortreson. Kio necesigis al vi ŝanĝi niajn komunajn kaj akceptitajn plankonceptojn? Se leviĝinte ni atakos, ni havos enormajn perdojn. Ĉu ne pli simplas atendi ĉi tie, kaj sturmi sub la ŝirmo de la nokto?

Kun pala vizaĝo Sorensen finaŭskultas Lewin kaj krie respondas:

– Vin mi ne demandis, k-do Lewin. Vi ĉiuj elektis min komandanto, mia estas la tuta respondeco. Mi ne ŝuldas klarigojn, mi ŝanĝos en niaj strategiaj konceptoj tion, kion mi konsideras bona. Vi povas supozi, mi havas sufiĉan kialon por tio. Sed nun lastafoje mi klarigos, kial mi tiel agos. Ni povas celi al nenio alia, ol okupi la fortreson. Je tio ankaŭ la malamiko kalkulas. Nur je unu afero ne. Nome ke tiel rapide, surprize,

mi povus diri, heroe ni atakos. Cetere ankaŭ miaj multjaraj spertoj pruvas, ke subitaj, surprizaj atakoj plej efikas. Dankon, finite! Bonvolu plenumi la ordonon!

S-ino Hidkay paŝas al Sorensen:

– Gekamaradoj, mi kredas, por komandanto Sorensen ne necesas pledi. Tamen mi opinias, mi devus diri kelkajn vortojn pri la ŝanĝita strategio. Pripensu bone, ni ĉiuj preparis nin por nokta atako, kaj nun la samajn fortojn, rimedojn de prepariĝo neatendite ni starigos en la servon de radike nova koncepto. La surprizo, la neatenditeco, la struktura ŝanĝo liberigos enorman energion. Mi kredas, la formo de atako, proponita de Sorensen, optimumas kiel varianto. Cetere ni venkos, la solduloj ne kalkulas je tiel heroa konduto, ili kapitulacos, kaj tiam ve al la venkitoj!

Sorensen aŭskultas ŝin kun rideto, la ceteraj staras konfuzitaj, surprizitaj.

Sorensen ripetas la ordonon:

– Do refoje, gekamaradoj. Nun ni deplojos nin, kaj precize je la dek-kvara kaj tridek ni ekatakos. Bonvolu plenumi la ordonon. Finite!

La subunuoj ekmarŝas, distiras sin, zorge eluzante la donitaĵojn de la tereno, alproksimiĝas je cent metroj al la fortreso. Senmove ili kuŝas sur la herbo, atendas la indikitan tempon.

La anoj de la unua subunuo kuŝas unuj apud la aliaj rande de la maldensejo. Katharson kaj Tunnel genuas malantaŭ la branĉoj de malalta arbusto, observas la fortreson, la aliaj: ambaŭ Bondy, f-ino Bunyin, f-ino Colin, Dobrovsky, Haecker, Hayan, Huysmann kuŝas malantaŭ ili. Mantenante la mitraletojn, senmove ili observas la maldensejon, la mutan fortreson.

Hayan turnas sin al Haecker, flustre demandas lin:

– Kioma horo ĉe vi?

– La dek-kvara kaj dek – respondas Haecker.

– Ni havas ankoraŭ dudek minutojn.

– Ne multajn.

– Mi volus jam esti poste.

– Ni agos stulte – diras Haecker.

– Kial? Eble li pravas.

– Li ne pravas, tiel ni ne povos okupi ĝin.

– Ili opas nur dek kvar.

– Ĉu vi kredas, ili ne kalkulas je ĉio? Cetere, defendi sin ĉiuokaze estas pli facile. Vi, kial vi venis ĉi tien? – demandas Haecker.

– Mi ne scias. Estas ekscite.

– Ĉu vi jam soldatis?

– Ne.

– Kiel vi elsavis vin?

– Patro sendevigis min. Ĉu vi servis?

– Jes.

– Kie?

– En Afriko – respondas Haecker.

– Do kial vi venis ĉi tien?

– Ĉar ion tian mi ankoraŭ ne faris.

– Ĉu mi povas vin apudi? – demandas Hayan.

– Kial ne? Ĉu vi timas?

– Jes.

– Restu kuŝanta, kiam ni saltleviĝos!

– Mi ne volas malkuraĝi.

– Estu tute trankvila! Restu kuŝanta tri sekundojn, premu la vizaĝon en la herbon, poste saltleviĝu, kaj kuru flanken!

– Kie vi estos?

– Mi antaŭeniros.

– Kaj se vi trafiĝos?

– Nun vidiĝos, kian fortunon mi havas. Hejme ĉiam oni diradas, eĉ merdon mi povas monigi. La risko ne pli grandas, ol veturi kun ducent-kilometra rapideco sur landvojo.

– Vi ne pravas. Ĉi tiu ludo aspektas, kvazaŭ sur landvojoj regus la regulo, ke aŭtoj kontraŭkuru sin reciproke – diras Hayan.

– Mi volis diri ne rektan komparon. Ni vidos. Mia manoplato antaŭsignas bonon, la sortolinio tiriĝas tute ĝis la montrofingro.

– Ĉu vi kompetentas pri tio?

– Ne tre, mi nur legis ion prie.

– Rigardu la mian. Jen ĉi tiu estas la vivolinio, ĉu ne?

– Jes, tiu. Sufiĉe longa, kvankam sube vidiĝas kruciĝeto. Ne tro timfeku, se vi vundiĝos, laŭ la manoplato vi ankoraŭ ne povos morti. Kiom vi aĝas efektive?

– Kvardek tri – respondas Hayan.

– Per kiu diablo via patro povis vin liberigi el la militservo.

– Li transsendis min en Svedion, kaj oni diris, ke mi malaperis.

– Via patro fabrikis, kompreneble, la Hayan-motorojn, ĉu?

– Jes, li. Kiom da minutoj restis laŭ via horloĝo?

– Ĉe mi estas la dek-kvara kaj dudek kvin.

– Ĝuste. Do se mi saltleviĝos, vi restos kuŝanta, nombros ĝis tri, poste stariĝos, kaj elkuros ĝis tiu cipresarbeto. Ĉu komprenite?

– Jes.

– Se mi trafiĝus, vi rampos al mi kaj retiros min malantaŭ la arbustojn. Ĉu vi kunhavas la sanitaran pakon?

– Mi kunhavas ĝin.

– Ĉu vi kompetentas pri ĝi?

– Mi kompetentas – respondas Hayan.

– Bone. Tiam ni preparu nin – diras Haecker, elprenas sian ladbotelon, trinkas.

Precize je la dek-kvara kaj tridek, sammomente saltleviĝas la ludantoj, ĉiuj tri subunuoj. Levinte la flagojn, inter krioj kaj intensa pafado ili proksimiĝas al la fortreso.

La fortreso senmovas, mutas, kaj kiam la sturmantoj sufiĉe proksimas, la defendantoj ekŝutas murdan pafsalvon sur ilin.

Olivieri el la dua subunuo, Rava kaj Samuelson el la tria terenfalas, la ceteraj kapoperde ekfuĝas, kuregas returne.

Blekante Sorensen provas reteni, returni ilin. Raŭke li stentoras:

– Returne! Atako! Returniĝi, antaŭen! Returniĝi, antaŭen! Steinbuch, s-ino Hidkay kaj van Delft ree ekiras al la fortreso, sed la fermopafado de la solduloj tro intensas; ili deviĝas returni sin.

– Haltu! Ĉiuj enviciĝi! – blekas Sorensen. Hayan paŝas al li:

– Komandanto, ni reiros por la vunditoj.

– Mi diris: ĉiuj enviciĝi!

La fuĝantaj subunuoj iom post iom reordigas sin malantaŭ la altaĵeto. Sorensen turnas sin al Steinbuch:

– Raporton! Kiom forrestis falintaj?

– Tri. Ne scieblas, ĉu vunditaj aŭ mortintaj – respondas Steinbuch.

– Kiu subunuo retiris sin unua?

Katharson levas la manon!

– La mia. Tro intensan salvon ni ricevis, miaj homoj ne estas sufiĉe trejnitaj.

– Tio min ne interesas. Kiu vin anstataŭas?

– K-do Tunnel.

– Elpaŝu, k-do Tunnel!

Tunnel antaŭenpaŝas apud Katharson.

– Mi, kiel komandanto de la batalunuo, pro nekamaradeca konduto kondamnas vin ambaŭ al morto.

Pala, kun tremantaj lipoj Tunnel aŭskultas Sorensen, faras du paŝojn direkte al li:

– Vi ŝercas, kion vi imagas, mi pagis ne por tio! Vi freneziĝis, Sorensen!

Sorensen elpoŝigas pistolon, direktas ĝin al ili:

– Starigu vin ambaŭ al la arbusto! La kondamnon plenumos mi! Tunnel ekploras:

– Vi vere freneziĝis! Bone, mi kalkulis je tio, ke mi povos morti, sed ne tiel; stulte, de kamarado. En Ateno atendas min la familio, edzino, infanoj. Kion vi diros al ili?

La voĉo de Katharson pli trankvilas!

– Sorensen, vi estas faronta maljustaĵon. Memvole vi ŝanĝis la atakplanon, konfuzis la kapon al la homoj, vi havas nenian rajton prirespondecigi kiun ajn. Prefere ni priparolu la spertojn, kaj antaŭ ĉio, ni rigardu, kio okazis al niaj tri vunditaj aŭ mortintaj kamaradoj. Remetu la pistolon, Sorensen, rekonu, vi ne pravas.

Sorensen ekhurlas:

– Vi ambaŭ estas malkuraĝaj hundoj!

– Ĉu vi scias efektive, kion signifas „kuraĝa” kaj „malkuraĝa”? Ni estis grandaj idiotoj, elekti vin komandanto. Remetu la pistolon, alie mi

forprenos ĝin, kaj estos nebone al vi! – krias Katharson.

Sorensen levas la armilon.

– Preĝu antaŭ ol morti!

Teruritaj, la du viroj retropaŝas; senmovaj, konsternitaj la aliaj rigardas la scenon. Tunnel terenĵetas sin, ploras:

– Indulgon! Helpu! Indulgon!

Sorensen mortpafas unue la alsaltantan Katharson, poste la surtere tordiĝantan Tunnel. Katharson falas dorsen, tuj mortas, la korpo de Tunnel ankoraŭ tikas du-tri fojojn, poste same kvietiĝas, senmoviĝas.

En la falinta silento de konsterno Sorensen retropaŝas kun la fumanta pistolo en la mano, donas instrukciojn:

– Fronte al la fortreso! Flagojn supren! Atako! Ĉi tiun malkuraĝan subunuon gvidos mi mem! Antaŭen!

Li levas la nigran flagon kun blanka cirklo, antaŭenpaŝas. La grupo de ludantoj mutas, senmovas.

Sorensen paŝas sur la altaĵon, levas la flagon, eksvingas ĝin, vokas krie:

– Antaŭen!

Dekstre, malantaŭ la altaĵo staras la tria subunuo. La vizaĝo de s-ino Hidkay, senmovas, malrapide ŝi deŝultrigas la mitraleton, malsekurigas ĝin, kaj enlasas la tutan ŝargaĵon en Sorensen. La komandanto turnas sin, kun miro en la okuloj rigardas al la virino, poste malrapide sinkas, deglitas de sur la altaĵo.

S-ino Hidkay levas la fumantan mitraleton, lasas ĝin elfali el la mano, kaj plorsingulte ĵetas sin sur la teron.

Steko suprenkuras la altaĵon, demetas sian kamizolon de franca kapitano, deŝiras sian blankan ĉemizon, kaj signe de kapitulaco svingas ĝin super la kapo. Helikoptero aperas super la altaĵo, haltas, descendas, sen alteriĝi.

Pekkinen prenas la malgrandan radioricevilon de la unuo, enŝaltas ĝin. Aŭdiĝas la voĉo de la dungito, sidanta en la helikoptero:

– Bonvolu komuniki, niaj gastoj, kion vi deziras.

Steko kuras al la ricevilo, transŝaltas ĝin, diras sufokavoĉe:

– Ni volas ĝin fini! Lasu, ke ni finu ĝin! La respondo ekknaras el la

aparato:

– Bedaŭrinde ni ne povas fari tion. Vi devigis vin por difinita ludodaŭro..

– Ni ne volas plu ludi!

– Vi povas kapitulaci, sed per tio vi riskos vian vivon. Ni ne povas, ni ne rajtas konsili al vi. Ataku aŭ defendu vin!

Steko terenĵetas la aparaton, ĝi rompiĝas. La helikoptero leviĝas, malaperas direkte al la centraj konstruoj.

S-ino Hidkay ankoraŭ kuŝas surtere, ploras.

Dobrovsky paŝas al ŝi en sia majora uniformo de la Pola Legio, levas ŝin:

– Venu, ni klopodu pensi, kio fareblas.

Ŝi ne respondas, ekiras inter la arbustojn, kuŝiĝas, premas la vizaĝon en la herbon.

Dobrovsky turnas sin al la senkonsile starantaj, palaj ludantoj:

– Gekamaradoj, unue mi petas du volontulojn, kiuj rigardos la viktimojn. Se eblas helpo, ili bandaĝu kaj alportu ilin, se mortintaj, lasu ilin surloke. Ĉi tri kadavrojn ni portu malantaŭ la altaĵon. Kiuj memvolas?

Hayan kaj Pekkinen elpaŝas, prenas al si du sanitarajn pakojn kaj ekrampas direkte al la fortreso.

Dobrovsky prenas la kadavron de Sorensen, tiras ĝin malantaŭ la altaĵon, singarde metas lian kapon sur la herbon. Serantoni kaj Soltersky kuŝigas Katharson kaj Tunnel apud Sorensen.

Dobrovsky revenas, demandas per trankvila voĉo:

– Gekamaradoj, ĉu neniu vundiĝis inter vi?

– Neniu – respondas f-ino Neudorf.

– Ega bonŝanco. Ĉi tiu frenezulo estis kondukanta nin en memmortigon.

– Kial vi lasis tion? – demandas la knabino.

– Mi ne scias, estis nura paneo. Ankaŭ vi ne oponis.

– Mi ankoraŭ ne militis.

– Vi pravas, estis senpripense. Vi aŭdis, kion la dungito de la Societo diris, ne eblas fini la batalon, ni devas ĝin daŭrigi. Ni devas trovi

efikan, saĝan solvon, alie ili mortigos nin.

– Ĉu vi ne opinias, ke tion ne nur vi scias, ke krom vi svarmas tiaj saĝuloj? – demandas moke f-ino Neudorf.

– Ne koleru, mi volis ne nur filozofii, mi havas ankaŭ konkretan proponon.

– Ni aŭdu ĝin – diras Schmidt.

– Mi konigos ĝin, sed nepre mi petas ion al vi: se plaĉos mia plano, elektu min komandanto!

Pluraj ekparolas:

– Konigu ĝin!

– Ĉu ne necesus starigi gvatantojn? – demandas Kirios.

– Vi ne konas la psikon de solduloj, ili entreprenas ĉiam nur certaĵojn. Cetere mi ne intencas superflue filozofii, sed tio enestas en mia plano. Ĉiu situacio havas sian strategion. Ni do analizu nian situacion. Ankaŭ vi venis ĉi tien, por kio la homoj militas ekde jarmiloj. Heroeco, gloro estas arĥaikiĝintaj nocioj, gravas nur unu afero, kiun cetere oni jam delonge eltrovis, kiun jam ankaŭ la spartanoj zorge ellernis: la utilo de strebado.

– Ĉesu pri tio! Se vi scias nur tiom, tuj ĉesu! – krias s-ino Tabor.

– Bone, do mi konigas la konkretan planon, mian strategion. Decidu pri ĝi! Post portempa malvenko mi promesas venkon. Ankaŭ Churchill faris la samon.

– Ĉu vi povas nur aludi? – demandas Haecker moke.

– Mi ne volis tuŝi viajn sentojn. Mi prezentos la planon, venu pli proksimen!

La anoj de la trupo ariĝas ĉirkaŭ li, tute strikte. Alvenas Hayan kaj Pekkinen. Hayan paŝas al Dobrovsky:

– Ĉiuj tri mortis.

Dobrovsky levas la manon al sia kepo, honorsalutas.

– Dankon, kamaradoj por la servo, ni venĝos ilin. Ankaŭ la ceteraj ludantoj levas la manon, honorsalutas, staras mute, senmove.

Dobrovsky daŭrigas:

– Kontraŭ pliforto aŭ tre instruita armeo efikas unusola metodo, la gerilo. Kaj ĝi justas almenaŭ tiom, kiom aliaj formoj. Ĝi estas la milit-

formo de subprematoj.

– Ni ne politiku! – interrompas Haecker.

– Mi volis ne politiki, nun ĝi jam estas tre reala kategorio de militado. Do ni rigardu nian kazon. Ok volontuloj demetos la uniformon, malaperos sur la tereno. La ceteraj sturmos, kompreneble, el post ŝirmaĵo, ili plurfoje sturmos, retretos, ellogos la malamikon el la fortreso, kaŭzos al ĝi perdojn, poste kapitulacos. Eble, ankaŭ parton de la gerilanoj ili kaptos, sed la ceteraj certe trovos rimedon, por solvi sian taskon, enfiltriĝi en la centrajn konstruojn kaj senpovigi la malamikon. Jen mia plano. Ĉu vi elektos min komandanto?

La ludantoj longe silentas, poste f-ino Neudorf ekparolas:

– Kaj se ni restus ĉi tie silentaj, ĝis la tempo forpasos?

– Post iom da tempo ili certe elvenos. Divenos, ke ni perdis niajn psikajn resursojn. Kaj tiam lude ili venkos nin, ni estos komplete subigitaj al ili.

– Kaj se ni kaŝfuĝus? La tereno estas sufiĉe vasta. Se ni forkurus de ili?

– Ni ne povas forkuri, ili pli bone konas la terenon.

– Tiam kiel niaj gerilanoj kaŝos sin?

– Ili eluzos, ke la solduloj estos okupataj pri ni. Konsideru, dek kvar homoj ne tro multas, por lukti kontraŭ ni kaj samtempe serĉadi nin.

Steinbuch levas la manon:

– Mi anoncas min por gerili.

Post Steinbuch anoncas sin ankaŭ Charnton, Kirios, Steko, van Delft, Schmidt, Serantoni kaj Soltersky. Ili viciĝas flank-al-flanke antaŭ Dobrovsky.

– Laŭ tio vi konsidereblas elektita komandanto – diras Bondy, la pli aĝa.

– Ĉu vi havas ion kontraŭ mia plano? – demandas Dobrovsky. La ludantoj silentas.

– En ordo, do ek!

Charnton ekkantas, iompostiome ankaŭ la ceteraj aliĝas: *„It's a*

long way to Tiparery, It's a long way to go.”[2] Dobrovsky manordonas silenton!

– Mi kredas, la frumatenaj horoj plej taŭgas. Ni postenigos gvatantojn, ĉiu staru preta, kunhavu la armilon, je la kvina matene ni komencos la atakon. La gerilanoj disiros, mi opinias, plej laŭcele por ili estas retiriĝi. Portempe en la regionon „Ruĝa pingveno”, tiu parto plej malproksimas, de tie ili havos tempon kaj eblon plej facile enfiltriĝi. Mi petas la kamaradojn filo kaj patro Bondy, gvati maldekstre de la altaĵo, kaj por dekstre f-inon Meghallan kaj k-don Lewin. Noktomeze ŝanĝos vin respektive mi kaj Haecker, f-ino Neudorf kaj k-do Huysmann. La ceteraj povos dormi trankvile, ĉi-nokte la solduloj verŝajne ne riskos. Mi petas vin nur, ne tro disiri, restu laŭeble kune! Ni agordu la tempon. Ĉe mi nunas la dek-oka kaj kvardek tri minutoj. Dankon. Frumatene mi vekos vin. La gerilanoj bonvolu veni al mi, ni priparolos la detalojn.

La ludantoj malpuraj, lacaj, elpakas siajn plejdojn, envolvas sin, kuŝiĝas sur la herbo.

La kvar gvatantoj paŝadas tirtakte ĉirkaŭ la altaĵo.

La gerilanoj sidiĝas ĉirkaŭ Dobrovsky.

– Kiu inter vi batalis en Vjetnamio? – li interesiĝas.

– Mi – respondas Soltersky.

– Ĉu vi ricevis instruon kontraŭ gerilanoj?

– Mi estis verdakaskulo.

– Bonege, do vi ĉion scias.

– Pliparte. Mi kredas, la afero ĉi tie pli simplos. Atentu nur, ke se vi kapitulacos kaj estos enkete torturataj, oni ne eltiru el vi, kie ni troviĝas.

– Faru tiel, ke ne eblu diveni – konsilas Dobrovsky.

– Narviks kaj liaj homoj bonege konas la terenon, kaj se vi estos kapitulacintaj, ili povos uzi ĉiajn rimedojn.

– Tial ni devas neniigi ĉiujn teĥnikaĵojn sur la tereno. Ĉiujn radarojn kaj industriajn televidilojn ni devas detrui.

[2] Longas vojo al Tiparery, longa vojo irendas ĝis Tiparery (soldata kanto el la unua mondmilito).

– Frumatene, kiam vi estos foririntaj, ni komencos – diras Soltersky.

– Eble, ne estis ĝuste konigi la planon al ĉiuj? Se ili ne konas, ili ne povas elbabili ĝin.

– Ne estas malbone, ke ili konas ĝin, almenaŭ ili povos iĝi herooj, se ili estos torture demandataj.

– Kaj se ili pepos?

– Ni iel enkalkulos ankaŭ ĉi tiun eblon.

– Laŭ mia opinio ni povas konsenti, ke Soltersky komandu, ĉu? – demandas Dobrovsky.

La gerilanoj kapjesas konsente. Dobrovsky turnas sin al Soltersky:

– Ĉu vi havas ian ideon?

– Ne. Plej gravas misorienti ilin kaj neniigi la aparatojn. Poste ni devos nur lerte enŝteliĝi en la centron de la fortresa sistemo. Mi esperas, ni ne trovos tie rezervajn soldulojn.

– Laŭ la Regularo ili devas restadi ekstere, en la hotelo, ili rajtas enveni nek sur la terenon, nek en la centran operacan zonon.

– Kaj se ili rompos la instrukciojn de la Regularo?

– Ne verŝajne. La sinjorino tenas rigoran disciplinon, kaj la Societo estas vere interesita pri tio, ke ni faru por ĝi propagandon.

– Ĉi tiu Sorensen estis frenezulo – diras Soltersky.

– Li meritis sian sorton. Kurioza virino estas ĉi tiu Hidkay. Mi kredis ŝin amatino de Sorensen – komentas Dobrovsky.

– Estis tio – diras Steinbuch.

– Kiel vi scias?

– Mi vidis Sorensen elveni nokte el ŝia ĉambro.

– Kurioze. Mi kredas, plej bone estus malarmi ŝin.

– Ne necese, ŝi neniam fariĝos perfidulo – diras Kirios.

– Ĉu vi opinias?

– Mi certas.

– Kial vi certas?

– Ĉar mi konas ŝin.

– De kie?

– En kvardek kvar ŝi servis kiel angla ruĝkruculino ĉi tie, en la montoj. Ŝi estis bonintenca.

– Se ŝi laboris kiel ruĝkruculino, kial ŝi nun estas ĉi tie?

– Ŝi diris al mi, ŝi volas sin mortigi, sed ne kuraĝas fari tion.

– Mi diras, ŝi estas frenezulo.

– Ĉu ni ne estas tio? – demandas Kirios.

– Ni ludas – diras Dobrovsky.

– Tamen, mi tre malgajas pro Rava. Estis afabla azenego – diras Kirios.

– Eble morgaŭ venos via vico.

– Mi ne kredas, ke refoje mi pagos por ĉi tio.

– Jes ja, vi pagos. Se vi transvivos, vi iĝos plej verva rekomendanto.

– Eblas. Propradire ĝuindus venki.

– Troviĝas inter ili kelkaj lertaj friponoj. Kiel Kreisbach aŭ la grizhara Rother, aŭ tiu usonano Michelson. Ne parolante pri Narviks.

– Ankaŭ ni ne estas nuraj novuloj – diras Steinbuch ridetante.

– Bone, mi scias, vi servis ĉe SS[6]. Propradire ni estas malamikoj.

– Ankaŭ Kirios nervozigas min ade-ree per tio. Vere mi ne kulpas pri tio.

– Pri kio?

– Ke ni perdis la militon.

– Ni ne politiku, tuj ni ekpafos unu kontraŭ la alia. Van Delft, kion vi faris en la milito? – demandas Dobrovsky.

– Hejme mi sidis en psikiatria hospitalo. Mia onklo estas psikiatro, li direktoris la instituton.

– Do bona gerilano iĝos el vi.

– Vi miros, mi iĝos ja bona gerilano.

– De kie ĉi tiu granda memcerteco?

– Mi servas kiel instruktoro ĉe la trupoj de la nederlanda Flugilkruco.

– Ĉu pri teroragoj?

– Ĝuste.

– En ordo, ni kredas, ke vi iĝos bona gerilano. Steinbuch turnas sin al Dobrovsky:

– Kaj vi? – li demandas.

– Pola Legio, poste Usono, naftonegocoj, grundnegocoj, kaj nun ĉi tie. Ĉu vi rigardas la uniformon? Nostalgio. Stulta nostalgio. Sed ni iru dormi, morgaŭ ni havos sufiĉe malfacilan tagon, mi kredas.

– Vi devos ankaŭ gvati ekde noktomezo – diras Soltersky.

– Vere, ĝis, ni dormu.

Dobrovsky kaj la gerilanoj foriĝas randen de la maldensejo, envolvas sin en siajn plejdojn, kuŝiĝas.

La du Bondy paŝadas ĉirkaŭ la altaĵo de maldekstre, f-ino Meghallan kaj Lewin de la alia flanko. Renkontiĝinte ili ĝentile salutas sin reciproke. Post tri rondiroj f-ino Meghallan kaj Lewin flankeniĝas al la randaj arbustoj, deŝultrigas siajn mitraletojn, sidiĝas sur la herbo.

– Tiahore kutime ni sidas sur la verando, babiladas – ekparolas la knabino.

– Mi ankoraŭ ne estis en Braziljo – diras Lewin.

– Tre bela, sed ankoraŭ ne finita.

– Onidire svarmas serpentoj en tiu regiono.

– Ili estas mildaj. Ĉu ĉi tie ne ekzistas? – demandas la knabino.

– Ĉi tie ne.

– Mi jam volus esti hejme.

– Kial vi venis ĉi tien?

– Miaj amikoj diris, ĉi tie oni eksperfortos nin.

– Vi ankoraŭ ne preterlasis la eblon.

– La pafado min nervozigas.

– Kion vi faris dum la sturmo?

– Mi kuŝis malantaŭ arbo kaj tremis. Sorensen estis frenezulo.

– Ankaŭ ĉi tiu Dobrovsky ne multe diferencas. Ĉiuj volas montri, kiel geniaj strategoj ili estas. Neniu el ili zorgas pri siaj homoj.

– La ideo de Dobrovsky plaĉas al mi.

– Kial? – demandas Lewin.

– Ĉar surpriza, nekutima.

– Ĉu ne pli simplus pace ripozi, dormi kaj ĝisatendi la postmorgaŭan posttagmezon? Ĉu vi scias, kiom da torturebloj havas en si unu kaj duontago?

– Se ni venkos, ĉu ankaŭ ni torturos ilin?

– Kompreneble. S–ino Perlinger jam tranĉis vergojn, ŝi volas travergi la soldulojn nudigitajn.

– Ĉu vi havas esperon, Lewin?

– Eble.

– Se ni venkos, ĉu ankaŭ tiam mi povos igi perforti min?

– Mi ankoraŭ ne troviĝis en tia situacio, sed mi opinias, jes. Per armilo ĉio atingeblas.

– Dio mia, se nur tio sukcesus. Tamen refoje mi ne venos. Sed la amikinojn mi sendos, ankaŭ ili gustumu. Ili sidas hejme, enuas, ĉi tie ili ellernos ion. Diru, Lewin, kiomjara vi estas?

– Kvardek ses.

– Kial vi venis ĉi tien?

– Ĉar mi havas multan monon, kaj vere mi ne scias, kion fari per ĝi. Ne sentante danĝeron, mi havas tielan streĉon, kvazaŭ mi ne estus tuŝinta virinon tra longaj jaroj.

– Pri kio vi okupiĝas?

– De patro mi ricevas ĉiumonate cent mil dolarojn. Malfeliĉa, li ne povas morti.

– Kion li faras?

– Li havas aviadilfarejojn en la Ŝtatoj[7]. Se li mortos, mi havos ĉirkaŭ du miliardojn.

– Kion vi faros per ili?

– Mi aĉetos ĉevalojn.

– Ĉu por ĉiuj du miliardoj?

– Por ĉiuj. Mi havos ĉirkaŭ ducent mil ĉevalojn.

– Vi malsaĝas, Lewin.

– Kial, kion vi aĉetus por ili?

– Mi ne scias.

– Nu vidu, vi pli malsaĝas.

– Venu, ni iru en la arbaron, perfortu min!

– Ne ŝercu, estas malpermesite forlasi la postenon.

– Venu, Lewin!

– Dobrovsky kondamnos nin al morto, se li ekscios tion.

– Ne gravas, la afero valoras tion.

– Kiel mi perfortu vin?

– Batu min, deŝiru mian veston.

– Kio estas via antaŭnomo?

– Maria.

– Trankviliĝu, Maria, vi ne bezonas longe atendi; nun estas la naŭa kaj duono, matene ni kapitulacos.

– Ĉu certas, ke oni perfortos min?

– Tio enestas en la Regularo.

– Kaj se oni malobservos ĝin?

– Mi promesas al vi, se la solduloj ne plenumos sian devon, postmorgaŭ posttagmeze, fine de la ludo mi elvenos ĉi tien kun vi, kaj ni faros la aferon.

– Ĉu vi promesas?

– Mi promesas.

– Dankon – respondas la knabino kaj kisas Lewin.

– Ni reiru gvati – li diras.

Ili stariĝas, surŝultrigas la mitraleton, reiras al la altaĵo. La du Bondy singarde proksimiĝas, ili renkontiĝas, ĝentile salutas sin reciproke.

F-ino Colin kuŝas rande de la maldensejo, malantaŭ arbo. Ŝi stariĝas, iras al s-ino Hidkay, volvas la plejdon ĉirkaŭ si, kuŝiĝas apud la virino:

– Johanino, ĉu vi trankviliĝis?

– Jes.

– Neniu kulpigos vin pri tio.

– Mi amis lin.

– Ĉu ĉi tie vi ekkonis lin?

– Nokte li vizitis min supre; li majstregis.

– Li estis frenezulo, Johanino, ni maltrafis elekti lin komandanto.

– Mi kredis atingi, kion mi volas, agonte laŭ lia propono.

– Rezignu pri la memmorto, Johanino, vidu, ankaŭ la sorto ne volas ĝin.

– Mi kuris antaŭe, kriegis, mia uniformo taŭgegas kiel celpunkto, mi devus esti trafita.

– Vi ne pensis pri la aliaj.

– La aliaj ne interesas min.

– Do kial vi tamen mortpafis lin?

– Mi ne scias. Subite mi devis deŝultrigi la mitraleton. Eble iu en mi

ankoraŭ memoras…

– Vi servis ĉi tie dum la milito, ĉu ne?

– Ĉi tie, en kvardek kvar, en Kortena.

– Kio malbona estas al vi propradire, Johanino?

– Miaj du filinoj mortis.

– Kiam?

– Antaŭ tri jaroj. Unu aĝis dek, la alia ok jarojn. La kuracistoj ne sciis diagnozi ilian malsanon; ili ekfartis malbone, mortis en du tagoj.

– Via edzo?

– Ekde jaroj mi scias nenion pri li. Li ambasadoris en Ankaro; antaŭ dek jaroj li forlasis ĉion, forveturis en Hindion kaj malaperis.

– Ĉu vi ne serĉigis lin?

– Li ne interesis min, por mi ekzistis nur la filinoj.

– Ĉu ne fareblas rea provo?

– Mi ne kuraĝas.

– Vi ankoraŭ junas.

– Mi ne povas digesti la aferon. Mi veturadis longe-larĝe, aĉetadis virojn, nenia ŝanco. En Sorensen enestis io, kio altiris min.

– Li estis frenezulo.

– Ĝuste pro tio. Kun li eble mi estus farinta provon.

– Li ne taŭgis por tio.

– De kie vi scias?

– Mi vivis kun li du jarojn.

– Kiam? – demandas la virino konsternita.

– De sesdek du ĝis sesdek kvar.

– Kial vi ne rakontis tion?

– Mi kredis, konata al vi.

– Mi ne sciis. Ĉu ankaŭ nun vi vivis kun li?

– Ne. Ekde ke li forlasis min, ni renkontiĝis ĉi tie la unuan fojon.

– Rakontu pri li!

– Kion vi volas aŭdi?

– Ĉion. Rakontu ĉion!

– Demandu!

– Mi scias nur, ke li havas ŝipfarejon en Kopenhago.

– Li fabrikis la plej grandajn luksojaĥtojn. Ne edziĝis, li diradis, la edzinoj egalas murdistojn. Foje ni ekskursis al Stokholmo, eniris cirkon, dum la prezentado okazis akcidento, knabino falis de la trapezo, rompiĝis al ŝi la spino. Edveno elspezis duonmilionon da kronoj por ŝi, ĉiutage vizitadis ŝin en la kliniko. Kiam ŝi resaniĝis, li edzinigis ŝin al sadisto, kiu ĉiutage batis ŝin. Fine la knabino mortigis sin. Li faris ĉiam la samon, kiel ankaŭ ĉi tie: lastmomente li elpensis ion tute diversan, ol oni atendis de li.

– Kial li forlasis vin?

– Mi ne scias. Eble ĉar li tre ekamis min. Multe li vizitadis cirkojn, kiam li flegis la knabinon; li ellernis ĵeti tranĉilojn. En la kastelo li instalis ĉambron por tranĉilĵetado. Komence li ĵetadis al pupoj, poste mi iĝis lia celtabulo. Tre bone li ellernis la ĵetarton, sed foje li trafis al mi la femuron. Ekde tiam li komencis min tre ami. Li ne foriĝis de mia flanko, ĉien mi devis lin akompani, li frenezumis, se li ne vidis min unu tagon. Poste somere en sesdek kvar ni feriis ĉi tie, en Grekio, kaj vekiĝinte iun matenon, mi trovis leteron sur mia noktoŝranko; li skribis, ke rigardante min, la kapo doloras lin, li reveturos, ne plu volas vidi min.

– Kial nun vi venis tamen kune?

– Mi jam diris, ni venis ne kune, hazarde ni renkontiĝis ĉi tie. Verdire mi volis reveturi, sed mi jam pagis la dek kvin mil dolarojn, domaĝis lasi ilin ĉi tie, mi pensis finfari la aferon. Mi volis alparoli, kiam li igis sin elekti komandanto, sed mi timis. Mi sciis, kiel vanta li estas, kiel li adoras potencon, sed mi ne kredis, ke li tiom frenezas.

– Al mi plaĉis, ke li kuraĝas ŝanĝi subite, li klarigis, kiel elementan forton havas tia atako, mi kredis, ĝi helpos ankaŭ al mi, ĉio finiĝos simple kaj facile.

– Kaj se vi trafiĝos, restante invalido por la tuta vivo? Vi ne povos vin plu movi, muŝoj en- kaj elflugados al vi tra la buŝo?

– Pri tio mi ne pensis.

– Mi havas amikon, li volis sin mortigi, pafis al si en la kapon, sed ne mortis, kaj nun li nek vidas, nek aŭdas, nek povas paroli, krome li paraliziĝis. Li ja vivas, la kuracistoj diras, ke li kapablas pensi, tamen estas kompleta mortinto. Imagu, kion li sentas.

– Tio similas al tio, ke iu vivas en tre severa monaĥejo. Kaj ĉu vi ne pensis pri tio, ke ankaŭ al vi povos okazi, pri kio vi rakontis? Ke ankaŭ vi povus vundiĝi?

– Mi kalkulas je bona fortuno. Por mi ĉio ĉi servas medikamente kontraŭ spleno. Ĉu vi scias, kion mi nune faradis? Mi dungiĝis konstrui vojon, por ne enui. Printempe du monatojn mi laboris en Ĉilio, konstruis aŭtovojon. Dume, kompreneble, klariĝis al mi, ke kontraŭ spleno eĉ laboro neniom valoras. Necesas trovi ion alian. Tiam oni diris, kia afero estas farata ĉi tie, tuj mi anoncis min. Ankaŭ ĉi tio ne vere taŭgas, tamen pli, ol sidaĉi hejme aŭ plori.

– Komprenu, mi volus esti trans ĉio, sed mi ne kuraĝas fari tion. Kio eblus krome?

– Mi trovas tion stultaĵo, iam ja ĉio finiĝos. Sed se ĉiupreze vi volas realigi tion, vi bezonas certan rimedon. Mi legis pri milionulo, kiu volis mortigi sin; li publikigis anonceton, ke li serĉas senlaborulojn por speciala tasko, kontraŭ bona pago. Anoncis sin du vaguloj, li donis al ili dek mil dolarojn, por ke ili pendumu lin. Ili pendumis lin.

– Ne malbona ideo.

– Ne ja, kaj certa. Tamen mi kredas, ĉi tie vi resaniĝos. Kiel vi mortpafis Edvenon, estis belege! Vi neniam mortigos vin, Johanino. Matene ni kapitulacos, freneze mi scivolas, kion ili faros al ni.

– Vi legis la Regularon, ĉu ne?

– Eble, ankaŭ ili rezervas surprizon por ni.

– Mi ne kredas, ĉi tiuj estas grizaj oficistoj, faras nur, kion la kontrakto devige preskribas.

– Ne gravas, ni faros al ili ion kaj tion, se la kubo transturniĝos.

– Mi ne scias, sed eble ni havas ŝancojn.

– Rakontu ankoraŭ pri Edveno.

– Ĉu vi vere enamigis al li?

– Probable.

– Kun mi li povis viri, nur se mi rakontis dume pri negroj.

– Por mi estis belege.

– Verdire ankaŭ mi ŝatis lin.

– Venu, ni metu lin sur katafalkon.

– Por kio?

– Por ke li ne kuŝaĉu tie, malantaŭ la altaĵo kiel hundo.

– Ne eblas, Johanino, estas milito, Dobrovsky ne permesas tion, apudas malamiko.

– Ni ŝtelu lin.

– Kaj kie vi volas?...

– Ene, en la arbaro. Ni bruligos lin.

– Ne naivu, Johanino. Unue, ĉiuj rimarkos la fajron, kaj cetere: ne licas neniigi kadavron, vi bone scias, al la rilata aŭtoritato oni devas pruvi, ke okazis akcidento.

La surkatafalkigon kaj sepultadon ni konfidu al la Societo; ili prizorgos ĉion. Ili diros, dum la ĉasado li misvojis, hazarde trafiĝis de kuglo.

– Mi volas lin rigardi.

– Matene, antaŭ ol ni ekiros.

– Nun mi volas.

– Ne obstinu, englutu sedativon!

– Tiam ankoraŭ rakontu!

– Edveno ĉiam mem elprovis la jaĥtojn, kelkfoje veturis sur ili ĝis Sud-Afriko, Aŭstralio. Vi povas imagi, kiel okulkarese estis vidi dek, dek kvin samformajn sinsekvajn.

– Por kiu li fabrikis ilin?

– Mi ne memoras, sed mi kredas, ankaŭ la ĉefduko de Luksemburgo farigis la sian ĉe li.

– Ĉu vi havas jaĥton, Heleno?

– Jes, mi ricevis ĝin de li.

– Ankaŭ mi havas unu. Ĉu vi promenŝipos iam kun mi?

– Mi promenŝipos kun vi.

– Ni veturos al Nov-Zelando. Ĉu vi jam pasis tie?

– Ankoraŭ ne.

– Mi volus reveturi tien. Ĉio bluas, kvazaŭ ĉie troviĝus ĉielo. En domoj, sur kampoj, eĉ en arbaroj.

– Kia bluo?

– Hela. Ĉio hele bluas.

– Ni alvojaĝos. Poste vi venos ankaŭ kun mi.

– Kien vi kondukos min?

– Al Bikini-atolo.

– Mi ankoraŭ ne estis tie. Ĉu bela?

– Antaŭpasintjare la homoj reloĝiĝis tie, oni konstruis du hotelojn sur la bordo. Estas fantazie! Kie la bomboj eksplodis, la tero glatiĝis kaj duras kiel vitro. La insektoj pligrandiĝis, plibuntiĝis. La krateroj aĉeteblas, oni povas konstrui somerdomojn sur ili. Belege.

– Mi kuniros.

– Ne turmentu la cerbon, ĉio bonordiĝos.

– Ne, Heleno, ni ne povas rekomenci, mi lacegas.

– Ni dormu, Johanino. Ĉu vi volas sedativon?

– Donu unu, dankon – diras s-ino Hidkay.

– Kiel vi opinias pri tio, ke matene ni tamen restu surloke? – demandas f-ino Colin singarde.

– Kial?

– Ni devus tamen sepulti Sorensen,

– Vi mem diris pli frue, ne eblas.

– Ni devus provi.

– Kaj la rilata aŭtoritato?

– La Societo ankaŭ sen tio subaĉetas ĝin.

– Kaj Dobrovsky?

– Ĉu vi volas heroiĝi?

– Mi volas morti.

– Mi kredis, nun ne plu.

– Mi mem ne scias certe.

– Atentu, Dobrovsky ne egalas al Sorensen, ni pafos el post ŝirmaĵo, neniu endanĝeriĝos.

– Tiam kial vi volas resti ĉi tie?

– Vidu, la Regularo interesas kiel legaĵo. Sed se mi pripensas, ke dek kvar solduloj pasos tra mi…

– Da virinoj ni opas ok, ne pasos tra ni ĉiuj dek kvar.

– Eĉ tiam, ne mi elektos, kun kiu kuŝiĝi.

– Ĝuste tio ekscitas min en la afero, Ĉu ne? Se la gerilanoj sukcesos transturni la situacion, vi mem povos elekti.

– Viro ne altrudeblas per armilo.

– Ni vidos.

– Unuvorte, ĉu vi volas kuniri matene, Johanino?

– Jes.

– Bone, ni iru. Ĝis tiam ni ripozu iom.

La du virinoj brakumas unu la alian, spiras ĉiam pli regule, endormiĝas.

6

Mateniĝas. Dobrovsky laŭiras ĉiujn, vekas unue la ok gerilanojn.

Soltersky vicigas siajn homojn, paŝas al Steinbuch:

– Vi ĉiuj iros al la rando de la kvadrato „Caro”, sed atentu ne esti malkaŝitaj, elturnu la kamizolojn, kaj antaŭtagmeze, se iĝos varme, kaŝu ilin. En la kvadrato estas instalitaj tri tv-kameraoj, jen la mapo, iliaj pozicioj estas sur ĝi precize markitaj. Detruu ilin! Urĝu vin, vi scias, vi devos fari tion antaŭ ol la ĉefforto kapitulacos, alie ĉio malkaŝiĝos.

– Kaj poste?

– Poste atendu min, ni aliros. Vi povas ekvoji.

Steinbuch salutlevas la manon, ekrampas singarde, uzante kamufle la arbustojn.

Soltersky daŭrigas:

– Charnton, Kirios, Steko.

– Jes, sinjoro – respondas preskaŭ samtempe la tri gerilanoj.

– Vi penetros la cirklon „Rostro”, komandos Kirios, vi detruos la instalaĵon tie. Tre atentu la radaron, ĝi estas kaŝita.

– Ĉu ĝi estas observata?

– Nur el la ĉeffortreso; el la operaca halo ĝi ne videblas. Sed dum la niaj ne venkos, do dum nia ĉefforto ne kapitulacos senkondiĉe, tiuj ne rajtas uzi la ejojn kaj instalaĵojn de la interna fortreso.

– Kaj kio, se ni ne sukcesos okupi ĝin?

– Ĉu vi jam estis militkaptito?

– Ne.

– Tiam vi spertos, kiel aspektas sange vera kaptiteco. Mi ne rekomendas ĝin. Propradire nun ĉio dependas de ni. Precipe de tio, kiel ni rapidos. Se ni atingos tien nur morgaŭ tagmeze, ve al la aliaj.

– Ni klopodos. Kio taskos post la operaco?

– Vi transvenos en la „Ĉaron”, al Steinbuch. Espereble, tiam ankaŭ mi estos tiuloke. Vi povas eki. Ne forgesu la uniformojn.

– Jes ja.

La tri gerilanoj ekmarŝas, kamuflitaj de arbustoj.

– Van Delft – vokas Soltersky la nederlandanon.

– Ordonu al mi!

– Vi venos kun mi. Mi kunprenis de la verdakaskuloj porteblan detektilon. Ĝi trovas ĉian metalon. Certe vi konas ĝin.

– Jes ja. Matsuoka II, ĉu?

– Ĝuste. Ni iru, por vidi ĝin. Eble antaŭ la ludkomenco oni ŝtelinstalis ion.

– En ordo.

– Ni ekiros la lastaj. Estas domaĝe, ke ĉirkaŭ la fortreso ni ne povas esplori. Ni ne forgesu diri al Dobrovsky, ke kapitulacinte ili eniru malrapide, kaj se ili rimarkos ion gravan, ili tuj diskiku tion.

– Ili estos tre severe punataj pro tio.

– Fareblas nenio alia.

– Bone, do tio enordas. Schmidt kaj Serantoni, vi elserĉos la aparatojn aliflanke. Ĉu vi markis ĉiujn sur la mapo?

– Ĉiujn – respondas Serantoni.

– Mi volus demandi nur, por kiam vi planas la ĉefoperacon? – demandas Schmidt.

– Tio dependas tute de la cirkonstancoj. Mi klopodas organizi ĝin tiel, ke jam hodiaŭ ni povu okupi la fortreson. Mi esperas, ĉio akordos. Kompreneble, multo dependas de tio, kiel la alia flanko paŝos. Mi ellernis ŝakludi, evidente ankaŭ ili.

Dobrovsky paŝas al ili, trinkas vaporantan teon:

– Kiam vi ekiros?

– Se konvene al vi, post dek minutoj. Mi iros kun van Delft, la ceteraj estas jam for. Ĉu vi havas apartan instrukcion por ni? – demandas Soltersky.

– Neniun. Vi agos propradecide, ni estas en via mano.

– Mi scias, estas prema respondeco.

– Mi kredas, la afero tamen solveblas.

– Mi antaŭtimas nur unu aferon, oni kondukos vin en la centran konstruon, ŝlosos la blenditajn pordojn, ni ne povos enpenetri.

– Mi esperas, ke ili elvenos.

– Kial ili elvenus?

– Mi miskonus ilin, se ne. Ili certegos pri sia faro, elvenigos la virin-

ojn sur la terenon.

– Ĉu vi kredas?

– Mi estas konvinkita. Ili simple preteratentos la regulon, ke la virinaj kaptitoj devas esti perfortataj antaŭokule de la viroj. Multe pli agrable estas en la mola sino de la naturo. Ili elvenos. Mi vetus pri tio.

– Ĉu ĉiuj?

– Ne, nur kelkaj. Ili opas dek kvar.

– Diru, ĉu ne eblus instrui la virinojn, ke ili kondutu laŭ tio?

– Ideo ne malbona, ni alvoku ilin.

Soltersky foriras, arigas la virinojn. Ĉiuj ok staras antaŭ la komandanto, atende rigardas la vizaĝon de Dobrovsky.

– Sinjorinoj, ne koleru, ke ni venigis vin, mi volus peti vian helpon en grava taktika afero.

– Ni aŭdu vin – diras f-ino Neudorf.

– La gerilanoj povos postveni nin en la ĉefkonstruon nur, se la blenditaj pordoj ne estos ŝlositaj. Oni do devas atingi, ke la seksperforto al vi okazu ne en la ejoj de la fortreso, sed sur la tereno.

– Kial? Ĉu vi opinias, ke tiuokaze ili lasos la pordojn neŝlositaj? – demandas f-ino Colin.

– Ĉiuokaze kelkaj soldulo j elvenos el la konstruaĵo. La ceteron vi povas konfidi al viaj gekamaradoj.

– Kion ni devos fari?

– Eble iom lamenti pri honto.

– Des pli ili emos fari tion antaŭ viaj okuloj – diras f-ino Neudorf.

– Tiam necesas io alia, pripensu!

– Mi havas ideon – diras s-ino Hidkay.

– Bonvolu!

– Mi restos ekstere ĉe la termofonto, kaj Heleno komencos lamenti ene, ke ŝi perdis min, ne scias, kio okazis al mi, iu elvenu por mi, enkonduku min.

– Brilege. La gerilanoj kaptos la soldulon, la cetero jam taskos al ili. Kompreneble, ĉio dependas de la situacio, cirkonstancoj. Ĉiuokaze mi petas vin, estu tre singardaj. Ni realigos la ideon de s-ino Hidkay. Se obstaklo intervenus, mi konfidos al vi, kion fari, kiel superi ĝin. Dan-

kon!

– Ĉu ili ankaŭ batos nin? – demandas f-ino Meghallan kun terurita, sed pro ekscitiĝo brilanta vizaĝo.

– Probable, kvankam ĉi tiu speco kondutas neniel antaŭkalkuleble. Mi esperas, vi ne forgesis tiujn teĥnikojn, per kiuj dum batado oni povas defendi la noblajn organojn. Se mi bone memoras, ni studis tion pasintsemajne sur anatomia karto.

– Ni memoras. Kvankam mi supozas, ili ne aŭdacos nin tro bati.

– Mi ne tiom optimismus. Estas instrukciite al ili, uzi la plej malhumanajn metodojn kontraŭ ni.

– Narviks mi konas persone, simpatia, ĝentila junulo – opinias s-ino Tabor.

– Tio signifas nenion, sinjorino.

– Cetere, kial ni devas kapitulaci? Ĉu ne pli laŭcelus enfosi kaj defendi nin sur la tereno? – demandas f-ino Litvak.

Dobrovsky respondas trankvile, akompanante siajn vortojn per malrapidaj gestoj:

– Vidu, sinjorino, mi ne volas ripeti la superemajn frazojn de Sorensen, sed kredu min, mi pli spertas pri tio. Gajninte la ludon, la solduloj ricevos apartan premion, faros ĉion eblan por venki. Ĝis hodiaŭ tagmeze ili certe divenus, ke ni retretis en defensivon, ili komencus apliki siajn elprovitajn teĥnikojn, ĉirkaŭus kaj dum minutoj venkus nin, kaj tiam restus al ni vere nenio por esperi.

– Kial ni devos nepre venki?

– Ĉar naŭdek procentoj de la ĉeestantoj venis por tio ĉi tien, esceptas vi sola.

– Ĉu vi certas pri tio?

– Tute mi certas. Se vi volas, ni povas demandi.

– Ne necese. Mi akceptas la plimultan decidon. Mi esperas, ke vi pravas.

– Dankon, sinjorino, via fido tuŝas al mi la koron.

– Kaj nun, kion fari?

– Kiel priparolite. Nun estas la kvara kaj kvindek. Soltersky, bonvolu ekiri, ni komencos la operacon precize je la kvina. S–ino Hidkay, ankaŭ

vi povas ekvoji al la fonto.

Soltersky levas salute la manon kaj ekiras kun van Delft, s-ino Hidkay inter la arbustojn.

Dobrovsky arigas ĉirkaŭ si la ludantojn, da ili restis dek kvin. Li rigardas la horloĝon, donas signon, levas sian poŝtukon.

Stelpaŝe ili penetras inter la arbustoj direkte al la fortreso. Je ducent metroj disde la plastaj muroj elsekiĝinta fosaĵo pasas rande de maldensejo, ili enkuŝiĝas kaj je mansigno de Dobrovsky komencas pafi al la konstruaĵo.

Dobrovsky observas okulstreĉe la ĉirkaŭaĵon, vidas, kiel la klappordoj de la fortreso apertiĝas, solduloj en kampokoloraj manteloj elglitas tra la aperturoj. Li nombras ilin, ili opas dek kvar. Laŭ mansigno de Narviks, la grupo disduiĝas, la subgrupoj ekrampas el du direktoj al la ludantoj.

La ludantoj ne movas sin, atendas. Narviks atingas la arbarrandon, levas porteblan megafonon al la buŝo:

– Kapitulacu, la ringo fermiĝis ĉirkaŭ vi, vi estas enfermitaj, kontraŭstari havas nenian sencon! Por eviti sangoverŝon, ni alvokas vin kapitulaci!

Dobrovsky gestas al Haecker. Tiu demetas sian blankan ĉemizon, kaj levinte ĝin super la kapon, eksvingas ĝin. Denove aŭdiĝas la voĉo de Narviks:

– Forĵetu la armilojn, ekiru kun levitaj manoj direkte al la arbaro!

S-ino Tabor elpaŝas unua el la ŝirmanta fosaĵo, post ŝi viciĝas la aliaj.

La solduloj ĉirkaŭas, traserĉas ilin.

– Nun ni eniros la centrajn operacajn ejojn. Kiu ne obeos, tiun mi mortpafos – diras Narviks krude.

– Se mi bone scias, ni estas militkaptitoj, kaj ankaŭ pri ni validas la Ĝeneva. Konvencio – indignas Haecker.

– Ĝi validas pri cia patrino putinaĉo, ne pri ci! – ekblekas Servet, kaj kikas la piedon de Haecker.

Haecker falas pro doloro, sed Servet starigas lin per refoja kiko, puŝas lin post la aliajn.

Ili atingas la apartigitan parton de la centra konstruaĵo. Ili estas pelataj en grandegan ejon. La betonmuroj krudas, malplenas kaj senpordas; neregulaj aperturoj komunikas kun la najbaraj ĉambroj. Meze de la kontraŭa ejo akvo de naĝbaseno verdas.

La solduloj starigas la kaptitojn rande de la baseno. Narviks elpoŝigas fotojn, komencas identigi la ludantojn.

– Interese, ĉiuj virinoj restis. Kiel vi nomiĝas?

– Mi estas Erveno Bondy.

– Ĉu tiu ĉi estas via filo?

– Jes.

– Ĉu vi estas Maria Meghallan?

– Jes – respondas la knabino.

– Staru kviete, alie vi ricevos vangofrapon.

– Jes, sinjoro.

– Dek kvar mankas. Ĉi tiu nombro ŝajnas tro granda. Kio okazis al ili? Knabineto, kiom da vunditoj, mortintoj vi havas, laŭ via takso?

– Mi ne scias, sinjoro – ŝi respondas timigite. En ĉi tiu momento f–ino Colin ekŝrikas:

– Johanino restis ekstere ĉe la fonto!

– Kio vin trafis? – demandas Narviks.

– Johanino Hidkay restis ekstere ĉe la termofonto. Ŝi laciĝis, sidiĝis, ni ne rimarkis, ke ŝi ne plu kunestas. Di-Sinjoro, nun kio okazos al ŝi?!

– Fermu la bekon, ni enkondukos ŝin. Do kiom vi fakte opas? F-ino Meghallan nombras la kaptitojn:

– Ni estas dek kvin.

– Kaj kiom vi opis?

– Tridek.

– Ĉu precize tridek?

– Jes.

– Kie restadas tiuj dek kvar ĝentilhomoj?

– Mi ne scias.

– Kie la komandanto? Sorensen!

– Mortis.

– Mi komprenas. Kaj la ceteraj? Ĉu same mortintaj?

Abrupte Narviks donas potencan vangofrapon al la knabino, kiu terenfalas, malrapide levas sin kvarpiede, prenas la brakon de Haecker, suprentiras sin, rigardas al Narviks

– Do kie ili troviĝas? – demandas la viro.

– Mi ne scias.

– Bone, ni daŭrigos poste. Kreisbach, vi eliros kun ok homoj kaj kvin virinoj, esploros, kio novas ekstere. Kvarope ni restos kun ĉi tiuj, la pordojn ni ŝlosos. Katenu ilin por dume, por ke ili faru nenian malsaĝaĵon. Ili detruis la televidilon, feliĉe la radioaparato restis. Kunportu la pli grandan!

La solduloj katenas la kaptitojn.

– Kiu restos kun vi? – demandas Kreisbach.

– Michelson, Hordings, Murketos kaj Rother.

– En ordo, mi iros. Mi elektas la virinojn. Kreisbach paŝas antaŭ la vicon de kaptitoj, komandas:

– Kamizolojn demeti!

La kaptitoj demetas la kamizolojn, helas la nudaj brustoj virinaj. Kreisbach pasas preter la vico, montras fingre f-inon Bunyin, f-inon Colin, s-inon Litvak, f-inon Neudorf, f-inon Meghallan:

– Veni!

S-ino Perlinger mallaŭte petas:

– Ankaŭ mi volus kuniri.

– Fermu la bekon!

– Pardonu min!

– Tenu la pepilon! – diras Kreisbach preskaŭ amikeme kaj ekiras kun siaj sep elektitaj kamaradoj post la virinoj al la blendita pordo.

Oportuneme, promene la solduloj iras post la virinoj sur la tereno. Atinginte la arbaron, ili deplojas, singarde avancas.

Soltersky kaj Steinbuch kuŝas sub arbusto, streĉe observas la marŝantojn.

Kreisbach apartiĝas disde la aliaj, postrestas, apogas sin al arbo, klinas sin antaŭen kaj raportas en mikrofonon, kamuflitan al plaĉa militinsigno, fiksita sur la brustopoŝo:

– Ĉi tie n-ro 11, ĉi tie n-ro 11, portempe mi spertas nenion ekster-

ordinaran. Vunditojn ni ne trovis. Laŭ la virinoj du mortintoj kuŝas en la maldensejo kaj tri ĉe la altaĵo „Neniu”. Ni pluiros por la virino, dume trakombos la terenon. Fino.

Li ripetas la raporton:

– Ĉi tie n-ro 11, ĉi tie n-ro 11, portempe mi spertas nenion eksterordinaran.

Dume la aliaj solduloj portigas per la virinoj la kvin mortintojn al la eta triangulada markilo ĉe la arbarrando. Kreisbach klinas sin denove super la mikrofonon:

– Ĉi tie n-ro 11, ĉi tie n-ro 11. Ni trovis la kvin mortintojn. Ankaŭ Sorensen troviĝas inter ili. Mi ne povas imagi, kie kaŝas sin la aliaj. Mi provos elpensi ion. Mi faros la necesajn aranĝojn. Fino.

Li ekiras, aliĝas al la solduloj, kiuj gardas la virinojn kaj serĉesploras pri la mankantaj ludantoj inter la arbustoj. La virinoj estas lacaj, taŭzitaj, iras pene.

– Sidiĝu, ripozu! – diras al ili Kreisbach kun afablema tono. Li manvokas al si Kolter.

– Ĉu vi kunhavas la injektan pistolon?

– Jes.

– Injektu ilin!

Kolter elsakigas la aparaton kaj injektas insulinon en la brakojn de la duonnudaj virinoj, kuŝantaj sur la herbo.

– Ĉu vi malsatas? – turnas sin Kreisbach al la virinoj.

– Jes – ili respondas mallaŭte. Kreisbach vokas Hordings.

– Malfermu ladmanĝaĵojn.

La solduloj elprenas viandajn konservujojn, malfermas kaj donas ilin al la virinoj, kiuj ĵetas sin sur la manĝaĵojn, ekvorante ilin.

Kreisbach interesite rigardas ilin, diras kun rideto:

– Sinjorinoj, mi pensas, vi ne havis sufiĉan tempon por la studado de la tereno. Nun ni iros al la termofonto kaj serĉos vian amikinon. Tie vi povos ankaŭ bani, iom refreŝigi vin. Ĉu vi konsentas?

Li ne atendas respondon:

– Pelu vin, ek, knabinoj, ni ankoraŭ havas multajn farendojn.

La virinoj ne ĉesas manĝi, kvazaŭ gluiĝas al la konservujoj.

– Venu, alie vi ree ricevos medikamenton.

Ektiminte ili forĵetas la skatolojn, obeeme stariĝas, ekmarŝas.

Trans la arbaro kaj arbustoj, post griza altaĵo aperas la surfaco de vaporanta lageto. Alveninte ĝian bordon, Kreisbach esplore ĉirkaŭrigardas. S-ino Hidkay kuŝas sub arbusteto en la alta herbo, dormas kun apudmetita mitraleto.

Kreisbach paŝas per unu piedo sur la armilon, per la alia tuŝas la virinon.

– Ha lo, sinjorino, ni alvenis!

S-ino Hidkay eksidas, frotas al si la okulojn, kaptas por sia mitraleto, sed Kreisbach flankenkikas la armilon:

– Ne maltrankvilu, infaneto mia – li diras moke.

– Kiu vi estas?

– Jesuo.

– Ne impertinentu!

– Tuj ci ricevos kelkajn el miaj frapetoj, fratineto!

– Mi rifuzas tiun titolon!

– Sufiĉas! Ĉu ci stariĝos, aŭ mi suprenkikos cin?!

Ŝajne kompreninte fine, kio okazas ĉirkaŭ ŝi, ŝi saltleviĝas, ekstaras senmove antaŭ Kreisbach. Tiu vokas malantaŭen, al la aliaj:

– Malvestu vin!

La virinoj ne movas sin.

– Ĉu mi eble flankeniru?

F-ino Colin respondas ridetante:

– Ne, ne necesas, ni ne hontemas.

– Malvestu vin! – ripetas Kreisbach la ordonon.

La virinoj rapide malvestas sin, zorge kunfaldas la vestaĵojn, malrapide envadas la vaporantan akvon. Kreisbach turnas sin al s-ino Hidkay:

– Ankaŭ vi malvestu vin!

– Jes – respondas la virino, malvestas sin, ankaŭ ŝi eniras la lagon post la aliaj.

La solduloj elprenas viŝtukojn, plejdojn el siaj mapujoj. Kreisbach montras al la herbo!

– Tie demetu ilin! Vi povas iri, traserĉu la terenon!

La solduloj demetas la aĵojn, foriras.

F-ino Colin venas bordoproksimen, haltas en la akvo kontraŭ Kreisbach, komencas ŝpruci lin. Kreisbach demandas kun rideto!

– Ĉu mi eniru, aŭ vi elvenos?

Ŝi ridas.

– Verdire vi ne meritas, ke mi eliru, vi estas tro bela knabo.

– Ĉu ankaŭ vi mistifikas per tio? Kredu, al mi venas ĝis la gorĝo aŭdi ĉiufoje, ke mi estas bela knabo. Se nur foje iu dirus, ke mi estas saĝa knabo. Malgraŭ ĉio kredu, mi ne estas idioto, mi gajnas la panon per mia kapo.

– Mi ne volis ofendi vin, viaj okuloj aspektas inteligentaj. – Denove ŝi komencas priŝpruci lin, sed baldaŭ ŝi abrupte ĉesas, elkuras sur la bordon, ĵetas sin sur la viron. Tiu brakumas ŝin al si.

– Malsekiĝos ĉi tiu bela uniformo via – ŝi diras kaj malbutonas lian kamizolon.

Dume ankaŭ la aliaj virinoj elakviĝas, viŝas sin, rigardas la du brakumantojn, kiuj, ne atentante la mondon, kisas, ŝiras unu la alian. Post iom da tempo la knabino sidleviĝas, karesas la vizaĝon de la viro kaj montras al s–ino Hidkay:

– Ŝi estas Johanino, mia plej bona amikino. Venu ĉi tien, Johanino!

S-ino Hidkay aliras, kuŝiĝas apud ili.

– Amu ankaŭ ŝin – diras f-ino Colin, premas lian vizaĝon al tiu de la virino, poste stariĝas, paŝas al siaj vestaĵoj, komencas vesti sin.

Kreisbach prenas ŝian brakon:

– Revenu!

F-ino Colin reiras apud ilin, Kreisbach brakumas ŝiajn genuojn, sidigas ŝin ĉe si:

– Vi ankoraŭ ne diris vian nomon.

– Mi estas Heleno.

Kreisbach nun turnas sin al la vestiĝantaj virinoj:

– Knabinoj, ne koleru, sed vi devas helpi al mi. La etato ne plenas. Kelkaj sinjoroj mankas el inter vi. Ĉu ili mortis? Vundiĝis? Ĉu ni ne devus retrovi ilin? Ĉu vi scias ion pri ili?

– Nenion ni scias.

– Neeble, cerbumu iom!

La virinoj silentas. Kreisbach daŭrigas:

– Kiel tio okazis, knabinoj? Estis sturmo, ĉu ili eble postrestis? Ĉu ni ne devus ree traserĉi la terenon? Denove f–ino Colin respondas:

– Ni ne scias.

Kreisbach paŝas al s-ino Hidkay, komencas karesi ŝian manon. Tiu montras al f-ino Colin.

– Se vi forsendos ŝin, mi diros ĉion al vi.

– Mi petas vin, bonvolu iri al la aliaj – diras Kreisbach al f-ino Colin.

Tiu ekiras al la grupo, staranta iom flanke, poste abrupte returnas sin, paŝas al s-ino Hidkay, batas al ŝi en la vizaĝon:

– Fia porkino! – ŝi siblas.

– Iru al la aliaj! – ordonas krude la viro.

La knabino haltas antaŭ la virinoj, plorsingultas. Kreisbach ridetas, prenas la manon de s-ino Hidkay, kisas ĝin.

– Ne zorgu pro ŝi, Johanino, ŝi ricevos la sian pro tio. Do, kiel tio okazis?

– Kiam ni volis kapitulaci, kaj oni respondis el la helikoptero, ke ne eblas, ni ĉiuj senesperiĝis. Kelkaj proponis monon, por povi foriri.

Kreisbach interrompas ŝin:

– Atendu, mi ne komprenas vin precize, ripetu, kio okazis? Brakumante la kapon de la virino, li tiras ŝin pli proksimen al la mikrofono. Li daŭrigas la interparolon.

– Ĉu vi scias, kiel oni nomas min?

– Ne.

– Mi ne havas nomon. Mi estas n-ro 11. Li eksilentas, poste ripetas silabante:

– Mi es-tas nu-me-ro dek-unu.

En la teĥnika kajuto de la operaca ĉambro, antaŭ amplifiloj, lampoj, megafonoj, muntitaj sur la muroj, sidas Narviks kaj Murketos, turnadas ekscitite la ŝaltobutonojn. Subite la voĉo de Kreisbach aŭdiĝas el la megafono:

– Mi estas n-ro 11. Kiel tio okazis? Ripetu... – S-ino Hidkay respon-

das mallaŭte:

– Kiam ni volis kapitulaci, kaj oni respondis el la helikoptero, ke ne eblas, ni ĉiuj komencis timi, malesperiĝi. Pluraj proponis monon, por povi foriri.

– Ni transsendu la voĉon al la kaptitoj – flustras Narviks.

– En ordo, mi sendas ĝin – respondas Murketos. Ili forturnas la ŝaltilojn, stariĝas, malfermas la pordojn de la kajuto, transiras en la halon. La kaptitoj apogsidas katenitaj ĉe la muro, Michelson kaj Hordings marŝadas preter ili kun mitraleto en la mano.

De la plafono de la ejo, el grandaj megafonoj aŭdiĝas la voĉo de s-ino Hidkay, konfesanta al Kreisbach. La viro interrompas ŝin:

– Ne eblas, vi mensogas.

– Kial mi mensogus?

– Mi ne scias, sed vi mensogas. Kiel vi interkomkomunikiĝis kun la helikoptero?

– Per radioaparato. Poste ĝi alteriĝis.

– Ni ne vidis alteriĝi helikopteron.

– Ĝi alteriĝis ĉe la alia flanko de la tereno, ĉe la barilo.

– Kiuj proponis monon?

– Mi ne memoras, ili opis ok, foriris solaj al la helikoptero.

– Mi ne komprenas. Ĉu la helikoptero forportis ilin?

– Ne. Ĝi forflugis, poste revenis, kaj ili descendis…

– Kiuj?

– Mi ne konas ilin.

– Ĉu viroj.

– Jes, du viroj.

– Kaj?

– Unu reiris al la helikoptero, ĝi leviĝis, giradis super ni, tenis nin en ŝako.

– Vi mensogas.

– Se vi ne kredas, kial vi demandas min?

– Daŭrigu!

– La alia, kiu restis surtere, ligis tukon antaŭ la okulojn de la ok viroj kaj forkondukis ilin direkte al la fortreso. Mi ne scias, kien, sed mi opi-

nias, el la fortreso eksteren.

– Kial ne virinojn ili forkondukis?

– La viroj estis pli perfortaj.

– Ĉu vi rekonus la du virojn?

– Malfacile, ili surhavis kapŝirmilon kaj okulvitrojn.

– De kie vi scias, ke tiuj ok viaj proponis monon al ili?

– Ili mem rakontis tion. Kaj ankaŭ, ke ambaŭ dungitoj foriris, por informiĝi ĉe la gvidantoj de la Societo, ĉu ili permesas tion.

– Kion?

– Ke ili rajtas akcepti la proponon.

– Kaj kiam ili revenis?

– Ili sciigis, ke la Societo akceptas la elaĉeton.

– Kial nur ok foriris?

– La gvidantoj de la Societo donis permeson nur al ok.

– Vi mensogas, Johanino. Senhonte vi mensogas. Ĉi tie n-ro 11, ĉi tie n-ro 11. Mi provos ĉe alia. Ĉi tiu senutilas. Mi finis.

Komence la kaptitoj aŭskultas teruritaj la voĉon de la virino, sed kompreninte la miskondukan intencon, ili malstreĉiĝas, turnas sin ridetante unu al alia, komencas interparoli.

Narviks rimarkas la ŝanĝiĝon sur la vizaĝoj, alkrias ilin:

– Stariĝi! Manojn super la kapon!

Kun miro la kaptitoj rigardas al Narviks, sed timigitaj obeas, stariĝas, levas pene siajn ĉenitajn manojn. Narviks preterpaŝas la vicon:

– Kiu estis la komandanto? – li demandas.

Neniu respondas.

– Ĉu vi ne komprenis la demandon? Kiu estis la komandanto post Sorensen, kiu mortis? La kaptitoj staras mutaj.

– Ĉu eblas, ke li ne troviĝas inter vi? Ĉu eblas, ke li ankoraŭ estas ekstere? Ĉu vi ne respondas?

Narviks ridetas:

– Bone, do vi ne malkaŝos lin. Tiam ni provu alimaniere. Murketos, demetu la katenojn! Kiu provos eskapi, aŭ faros alion, ol dirite, tiu mortos! Kuru ĝis la kontraŭa muro kaj reen!

La kaptitoj kuras ĝis la kontraŭmuro kaj revenas anhelante.

– Sidiĝu! Manojn sur la nukon!

Ili sidiĝas, metas la manojn surnuken. Narviks daŭrigas:

– Elviciĝu ambaŭ virinoj! Starigu vin al la muro! S-ino Perlinger kaj s-ino Tabor stariĝas, turnas sin vizaĝe al la muro.

– Frunton al la muro!

Ambaŭ virinoj klinas sin singarde antaŭen, metas la frunton al la muro.

– Elviciĝu ĉiuj sub tridek jaroj!

Filo Bondy stariĝas, turnas sin al la muro.

– Levu la manojn ĉiuj inter kvardek kaj kvindek! Ĉiuj sep sidantoj levas la manojn.

– Do vi estas ĉiuj inter kvardek kaj kvindek?

La kaptitoj ne respondas.

Narviks elprenas la pakon de fotoj, elprenas tiujn de la sidantoj, kontrolas la indikojn sur la dorsflankoj.

– En ordo. Stariĝu, denove kuru ĝis la muro kaj returnen!

La sep viroj kuras ĝis la kontraŭa muro, tuŝas la malglatan, krudan surfacon, rekuras al la du virinoj, haltas.

– Viciĝu!

Narviks preterpaŝas ilin:

– Kiu aĝas kvardek inter vi?

Huysmann levas la manon.

– Stariĝu flanken!

Huysmann flankeniras al la virinoj.

– Kiu aĝas kvardek kvin?

Patro Bondy kaj Dobrovsky anoncas sin.

– Stariĝu al li! – diras Narviks, montrante al Huysmann.

Bondy kaj Dobrovsky iras al Huysmann. Narviks paŝas antaŭ ilin, klinas sin al ilia vizaĝo:

– Ĉu vi ĉiuj tri servis soldate?

Huysmann ekparolas:

– Mi ne soldatis.

– Kion vi faris dum la milito?

– Mi estis hejme.

– Kia lando estas, kie dudek–kelkjara junulo povis resti hejme?

– Svislando.

– Mi jam komprenas. Kion vi faris hejme?

– Mi studis.

– Kion?

– Sociologion.

Kaj nun, kion vi faras?

– Nenion. Mi vojaĝadas.

– Kial venas ĉi tien sociologo?

– Preterlasu tiajn demandojn! Mi venis ĉi tien, pagis, ne malmulte, volas amuziĝi!

– En ordo, vi amuziĝos. Stariĝu do flanken, ĉi tien!

Narviks returnas sin, kaj kvazaŭ subita ideo venus al li, li direktas sin al la alia grupo, staranta antaŭmure:

– Kiu batalis inter vi en Vjetnamio? Lewin kaj Pekkinen levas la manon.

– Venu ĉi tien!

Li starigas ilin apud Bondy kaj Dobrovsky. Li elprenas sian pistolon, donas ĝin al Huysmann:

– Prenu ĝin! Du el ĉi kvar mortpafu!

La sviso tenas la pistolon, ne movas sin.

– Kiujn vi mortpafos? – demandas Narviks.

– Neniujn.

Narviks elprenas alian pistolon, premas ĝin al la nuko de Huysmann:

– Kaj nun, kiun vi mortpafos?

– Min mem.

– Vi ne povas. Antaŭ ol vi direktos ĝin kontraŭ vi, mi elbatos ĝin el via mano. Kiujn vi mortpafos el ĉi tiuj?

– Neniujn.

– Nu, redonu la pistolon!

Huysmann etendas ĝin al li.

– Diru almenaŭ, kiujn du vi mortpafus, teorie?

Huysmann montras al Pekkinen kaj Lewin.

– Ilin.

– Kial? Ĉu pro tio, ke ili batalis en Vjetnamio? Mi malkaŝos al vi, ankaŭ mi batalis tie.

Li turnas sin al Pekkinen kaj Lewin:

– Dan Tungh, Bien-Ta, Sen-Hu, Ho-Fhen-Ta? Ĉu vi estis tie, konas ilin?

– Ne – ili respondas preskaŭ samtempe.

– Kaj norde? Ton-Lyu, Dien-Bien-Phu?

– Ne.

– Tiam stariĝu flanken! Iru al la virinoj, vi ne konas la gerilon. Do restis vi du. Unu el vi estas la komandanto. Kiu?

Dobrovsky kaj Bondy silentas.

Narviks elportas Colt-pistolon el la teĥnika kajuto, elsaltigas la kartoĉojn, restigas nur unu en la ŝargujo. Li transdonas ĝin al Bondy, montrante al Dobrovsky:

– Alpafu lin!

Ŝtonigita Bondy rigardas la soldulestron.

– Mi diris, alpafu lin! – ripetas Narviks la ordonon.

– Ne eblas! – diras Bondy preskaŭ flustre.

– Michelson, se en kvin minutoj li ne pafos, vi mortpafos lin. Unu... du... tri...

Bondy direktas malrapide la pistolon al Dobrovsky kaj tiras la ellasilon. La armilo klakas malplene. Narviks forprenas, transdonas ĝin al Dobrovsky:

– Nun pafu vi!

Dobrovsky levas ĝin abrupte super la kapon kaj pafas per ĝi. Dufoje ĝi klakas malplene, triafoje knalas kun surdiga tondro. Dobrovsky mallevas la brakon, forĵetas la armilon.

Narviks atente rigardas la vizaĝon de Dobrovsky:

– Se veras, ke Sorensen mortis, kio tre verŝajnas, tiam la komandanto estas vi. Diru, ĉu tiuj ok vere ĉesis ludi?

– Ankaŭ vi aŭdis, ĉu ne?

– Kial vi permesis tion?

– Ili tre ektimis, kaj tio ĉi estas en fina konsidero nur ludo.

– Nu, venu, mi volus, ke vi malkaŝu la veron.

Li manosignas al Hordings kaj Michelson elsakigas vastmaŝan reton, ili pasas al Dobrovsky, katenas al li la manojn kaj piedojn, fermigas la reton, la ŝnuron transdonas al Bondy.

– Sinkigu lin ĝisfunde! – ordonas Narviks.

Bondy prenas Dobrovsky, ŝovas lin randen de la baseno, enlasas lin per la ŝnuro en la akvon, ĝis la basenfundo.

– Eltiru lin! Elretigu lin!

Bondy eltiras, malfermas la reton. De Dobrovsky fluas akvo, li kaptadas per la buŝo por aero.

Michelson deprenas lian katenon, transpaŝas al Bondy, katenas kaj enretigas nun lin.

– Interŝanĝu! – ordonas Narviks al Dobrovsky. Dobrovsky ne movas sin.

Michelson kaj Hordings prenas Bondy, levas lin randen de la baseno. Ĉi tiu hurlas kiel besto.

Lia filo rigardas lian turmentiĝon kun tordita vizaĝo, elsaltas el la vico, kuras al li, skuas la reton:

– Lasu mian patron! – li krias raŭke.

Narviks volas lin levi, tiu piedbatas al li la kruron. La soldulestro elŝiras sian pistolon, sed la junulo elbatas ĝin el lia mano, fulmomove klinas sin, por levi ĝin. Michelson paŝas sur la armilon, forpuŝas la junulon, kiu ĵetiĝas al la muro, staras momenton senmove, poste saltĵetas sin sur la soldulon. Murketos staras malantaŭ Michelson, nun li antaŭenpaŝas, levas la mitraleton, enlasas la kompletan ŝargaĵon en la junulon. La pafaro kvazaŭ dissegas la junulon, li falsterniĝas, tra lia buŝo torentas sango, li kuŝas senmove.

Narviks malligas la reton, Bondy pene elvolvas sin, ŝanceliras al sia mortinta filo, klinas sin super lin:

– Filo mia! – li plorsingultas.

Narviks manosignas kun senmova vizaĝo al Murketos.

– Foririgu ilin!

Murketos kaj Hordings levas la viron, puŝadas lin al la apuda ejo. Subite ili ŝoniĝas: en la pordo aperas Soltersky. Li enpaŝas la halon: lia

mitraleto celas antaŭen.

– Kapitulacu, hundoj! – li krias al Narviks.

La solduloj forĵetas siajn armilojn, Soltersky kaj Steko alsaltas, traserĉas kaj starigas ilin al la muro.

Bondy karesas freneze la vizaĝon de sia mortinta filo:

– Dio mia, kion mi faris! Dio mia, kion mi faris! – li ripetas plorskuate.

Alvenas ankaŭ la ceteraj gerilanoj, eskortas la kaptitajn soldulojn. Ankaŭ en la manoj de la virinoj vidiĝas mitraleto, firmapaŝe ili marŝas post siaj kaptitoj. Kreisbach ŝanceliĝas taŭzita, en ĉifita uniformo en la halon.

Soltersky paŝas al Dobrovsky, levas salute la manon:

– Komandanto, sukcese ni plenumis la operacon. Ni havas du negrave vunditojn, Charnton kaj van Delft, du solduloj mortis.

– Kiuj?

– Lundquist kaj Shadow.

– Dankon, kamaradoj, heroe vi plenumis vian taskon. Mi petas mallongan raporton.

Soldatece, kun klaka tono raportas Soltersky:

– Kreisbach estis okupata de s–ino Hidkay. La aliaj sentis sin plene sekuraj, foriris kun la virinoj en la arbaron. Po unu ni malarmis ilin. Lundquist kaj Shadow kontraŭstaris, ni deviĝis neniigi ilin.

– Alkonduku Narviks!

Steinbuch direktas la soldulestron al Dobrovsky.

– Kiel vi opinias pri la afero, Narviks?

– Ne fanfaronu, Dobrovsky, estas aranĝo mia, mi volis, ke vi venku.

– Nu, ne ŝercu!

– Kion vi pensas, kial mi lasis la pordojn apertaj?

– Alkonduku Kreisbach!

Kreisbach staras laca, kun ombra vizaĝo apud Narviks.

– Diru al mi, Kreisbach, kial la ŝtalpordoj restis apertaj?

– Mi ne scias.

– Nu, pripensu! Al kiu taskis zorgi pri la pordoj?

– Mi ne scias.

– Ĉu tiel malbone vi estas informita, Kreisbach? Eble la komandanto scias. Narviks, al kiu vi konfidis gardi la pordojn?

– Al Murketos.

– Do mankas nur Murketos.

Schmidt puŝadas Murketos antaŭ Dobrovsky.

– Diru al mi, kial vi lasis apertaj la ŝtalpordojn de la interna fortreso?

– Laŭ la ordono de Kreisbach.

– Ĉu? Kaj per kio Kreisbach klarigis, ke la pordoj restu apertaj, se la komandanto severe malpermesis, lasi ilin malŝlositaj?

– Li diris, ke li priparolis tion kun Narviks, ricevis permeson por tio.

– Kial vi faris tion, Kreisbach? Ĉu vi eble timis?

– Mi volis certigi la revenvojon.

– Vidu, se la pordoj estus restintaj ŝlositaj, vi ankoraŭ havus ŝancojn. Kiel vi scias, ekzistas ankaŭ interŝanĝo de kaptitoj, kaj ni opis dek unu ĉi-ene, en viaj manoj. Kreisbach, mi kredas, se vi ĝisvivos, vi ricevos punon pro la rompo de la disciplino, vi ja fuŝis ĉion. Nun sekvas vi, sinjoroj. Antaŭ ĉio, Soltersky, ekzamenu la murdaferon! La farinto estas Murketos. Poste ni vidos. Kioma horo estas?

– La dek–dua kaj tridek tri.

– Ni ankoraŭ havegas tempon. Oni malalarmos morgaŭ je la dua posttagmeze. Ni devas armi la kamaradojn. Kaj katenu la soldulojn por plena sekureco!

– Jes ja!

– Kie vi lasis la mortintojn?

– La niajn la solduloj arigis arbarrande, ni lasis ilin samloke, portis tien ankaŭ iliajn.

– Sume, kiom da mortintoj?

– Kune kun Bondy naŭ. Sep el ni kaj du solduloj.

– Trista bilanco. Se Sorensen ne estus fuŝinta la aferon, apenaŭ ni havus perdojn. Eble nur ĉi tiun malfeliĉan knabon, kvankam ankaŭ li vivus nun, se li estus havinta pli da prudento. Mi kredas, mi devas diri kelkajn vortojn al la gekamaradoj.

Dobrovsky levas sian voĉon:

– Gekamaradoj, mi petas atenton, mi volus direkti al vi kelkajn

vortojn!

Kun feliĉa vizaĝo la ludantoj iradas tra la ejoj, babiladas, singarde preterpaŝadas la soldulojn, sidantajn basenborde.

Je la voĉo de Dobrovsky ili haltas, ariĝas ĉirkaŭ li, komencas vivui. Dobrovsky parolas per solena voĉo:

– Gekamaradoj! Ni elbatalis neniigan, decidan venkon super la malamiko, multe pli instruita, multe pli sperta. Mi dankas vin por la kuraĝa, heroa konduto, sindona partopreno en la batalo. Sincere, nekaŝeme ni devas paroli ankaŭ pri tio, ke ĉi tiu venko postulis ankaŭ gravajn viktimojn, sep kamaradoj niaj pagis per sia vivo por la monomanio de la ekskomandanto Sorensen. Ni faros ĉion eblan, por venĝi niajn heroajn mortintojn dum la restinta tempo. Unue mi pensis pri tio, ke ni ekzekutos ĉiujn soldulojn. Ili ne meritas pardonon, ankaŭ ili ne traktis nin per mildaj manoj. Tamen poste mi decidis instali por ili severan koncentrejon ene de la fortreso, ja ankaŭ tio estos sufiĉa puno por ili. Ĉi-apude, apud la operacaj ejoj troviĝas teĥnikaj kajutoj, en ili troviĝas ĉiuj instrumentoj, necesaj por diversaj procedoj de la Regularo. Nia unua grava tasko estas nun venĝi nin pro tiu fiago, sekve de kiu, kiel vi scias, soldulo Murketos, ĉi tiu senskrupula fripono mortigis la senkulpan filon de nia kompatinda k-do Bondy. Plue ni informos vin pri ĉiuj disponoj kaj programoj. Dankon!

Inter jubiloj la ludantoj pelas la soldulojn for de la basenbordo al la muro, poste sidiĝas sur la betona rando. Streĉe ili rigardas al Bondy, kiu ligas la manojn kaj piedojn de Murketos per maldika ŝnuro, kaj puŝas lin en la akvon. Tiu sinkas drone, poste helpe de siaj ligitaj manoj, piedoj, per rigidaj movoj pene levas sin sur la surfacon, provas puŝadi sin alborde, sed Bondy denove premas lin subakven.

Kun rigida vizaĝo, la ludantoj spektas la scenon. Soltersky iras al Bondy, tuŝas lian ŝultron:

– Lasu tion, kamarado!

Li prenas, elakvigas la sputantan soldulon, eltiras lin sur la bordon, fortranĉas la ŝnuron, kondukas lin al la basena ŝtuparo:

– Eniru! Sidiĝu sur la ŝtupo!

Murketos ekiras, sputas la glutitan akvon.

– Pli malsupren! Sidiĝu! – ordonas Soltersky. Murketos sidiĝas, la akvo kovras lin ĝissŝultre. Soltersky vokas al Lewin:

– Alportu paperon, skribilon!

Lewin transiras en iun teĥnikan kajuton, rekuras kun dika bloko kaj krajonoj en la manoj. Soltersky transprenas la skribilojn, metas ilin sur la basenbordon, antaŭ Murketos:

– Faru striojn sur la papero!

Pene la soldulo ellevas sin el la akvo, etendas sian brakon, prenas krajonon, desegnas per tremanta mano kurbajn liniojn sur la papero.

– Faru rektajn!

Ektiminte, Murketos klopodas disciplini siajn fingrojn, la linioj fluas nun pli rekte.

– En ordo. Unue pripensu, poste skribu ciferon. Kiom da homoj vi mortigis dum via vivo?

La soldulo ne movas sin, Soltersky daŭrigas:

– Ne necesas tute precize. Sufiĉas la amplekso. Ĝis dek, ĝis cent, ĝis mil?...

Murketos enpensiĝas por kelkaj sekundoj, poste skribas la ciferojn sesdek du sur la papero. Li suprenmontras ĝin. Soltersky rigardas la ciferojn:

– Mi ne certas, ke ĉi tiu nombro precizas. Nun skribu, ĉu via mitraleto estis streĉita aŭ ne, antaŭ ol vi mortpafis la knabon.

Murketos skribas „jes” sur la papero.

– Ĉu la knabo diris ion, antaŭ ol li mortis?

Murketos surpaperigas ree „jes”.

– Kion li diris?

La soldulo desegnas du literojn: „Ne!”.

– Ne hazarde, profesio estas profesio. Jen kiaj estas profesiuloj. Profesiuloj ĉiam devas havi bonan memoron.

– Tio venas ne de tie. Ĝi estas ĉiam streĉita, krome ĉiuj diras ĉiufoje la samon – li ekparolas mallaŭte.

– Kaj se vi renkontus escepton, ĉu ankaŭ ĝin vi rememorus?

– Jes.

– Nu, bone, elvenu!

Murketos elbaseniĝas, haltas antaŭ Soltersky.

– Mi kredas, vi ne dubas pri la kondamno. Je kio ni kondamnis vin, laŭ via opinio?

– Vi torturos min.

– Vi eraras, ni ekzekutos vin.

Murketos paliĝas.

– Ĉu vi ne petas indulgon?

– Jes ja.

– Petu ĝin ĉe la patro de la knabo!

La soldulo klinas sin al Bondy, ploranta super sia filo:

– Mi petas vin, bonvolu ne koleri min…

Bondy ne rimarkas, esti alparolita, li ĝemploras plu. Murketos ripetas:

– Mi petas vin, bonvolu ne koleri min!

Bondy suprenrigardas:

– Forkonduku lin! Forkonduku lin! – li ekblekas raŭke.

– Mi ne kulpas, li volis alsalti min, mi povis fari nenion alian.

Soltersky fortiras Murketos de Bondy, kondukas lin al la muro.

Dobrovsky paŝas al ili:

– Ni starigos esceptjuĝan tribunalon. Ĝin membras: Soltersky, Haecker, s-ino Hidkay, Huysmann kaj mi. La indikitaj personoj bonvolu veni ĉi tien!

Li sidiĝas basenborde sur la betono, Soltersky apude. Ankaŭ s–ino Hidkay, Haecker kaj Huysmann aliras, prenas lokon ĉe ili sur la betono.

– Do ni tuj komencu. Mi kredas, la fakto, ke ĉi tie okazis murdo, ne pruvendas – diras Dobrovsky.

– Mi ne ĉeestis – diras s-ino Hidkay.

– Mi same – diras Soltersky.

– Ĉu vi kredas tion al ni? Al mi, al Haecker kaj Huysmann? Krom ni ĉeestis ankaŭ s-ino Tabor, s-ino Perlinger, Pekkinen, Lewin, Hayan. Bondy ne konsidereblas, estas interesata.

Aŭdinte sian nomon, Bondy ekblekas:

– Mortigu la friponon! Mortigu lin! Donu lin al mi, mi finos kun li!

– Trankviliĝu, k-do Bondy, fidu al ni, kredu, li ricevos indan punon.

Certe vi kredas nin, ke ĉi tie ni devas juĝi pri fridsanga murdisto?

– Mi kredas – respondas s-ino Hidkay.

– Ankaŭ mi – diras Soltersky.

– En ordo. Do nun mi pridemandos la akuzaton.

– Nur mallonge – alkrias Steko el inter la spektantoj.

– Bone, mallonge. Murketos, diru, kial vi mortigis la filon de Erveno Bondy?

– Memdefende mi mortpafis lin.

– Ĉu li volis vin ataki?

– Jes.

– Ĉu ne soldulon Michelson li volis ataki? Ni nome tiel vidis.

– Ne.

– Vi mensogas.

– Gesinjoroj, ĉie en la mondo oni mortpafas militkaptitojn, kiuj atencas siajn gardistojn.

– Kaj kion oni faras al gardisto, kiu mortpafas militkaptiton, kaj poste mem iĝas kaptito?

– Mi ne scias.

– Mi diros al vi, oni ekzekutas lin. Cetere min interesus, kial la viktimo volis atenci vin ambaŭ?

– Ni pridemandis lian patron.

– Kion vi volis ekscii de li, post ol vi certiĝis, ke la komandanto estas mi?

– Sinjoro, ne mi konfesigis lin. Ankaŭ vi ĉeestis, vi mem povis vidi tion.

– Mi fakte ĉeestis.

– Ne mi, majoro Narviks konfesigis vin.

– Narviks, starigu vin, venu ĉi tien!

Narviks ekstaras, etendas siajn katenitajn manojn, paŝas apud Murketos.

– Kion vi volis ekscii de la patro de la viktimo? – demandas Dobrovsky.

– Mi vidis, ke inter vi ambaŭ pli feblas Bondy, mi pensis, pli aŭ malpli frue li malkaŝos, kion li scias. Mi sciis, estas tute neeble, ke dek kvar el vi malaperis, ni tuj vidis ankaŭ, ke la komandanto estas vi kaj organi-

zis gerilon kontraŭ ni. Sed bedaŭrinde mi fidis al Kreisbach, mi kredis, sufiĉas ok horoj por la tereno, precipe se ankaŭ inaj ostaĝoj estas kun ili. Estis erarego, ke mi ne kontrolis la pordojn. Kreisbach lasis min en peĉo.

– Pri tio ni ne scivolas. Do vi torturis Bondy, ĉar vi esperis ekscii ion de li pri la gerila operaco. Kial vi forlasis la radioaparaton? Se vi ne interrompus la kontakton kun Kreisbach, tuj vi divenus, ke io misas.

– Estis ja eraro. Sed vi mem scias, ke oni fidas al subunuestro, oni ne povas kontroli ĉiujn detaletojn.

– Kiel vi opinias pri la tenado de militkaptitoj?

– Mi ne komprenas vin, sinjoro.

– Mi volas scii, kion vi faras kutime al militkaptitoj.

– Mi liberigas ilin.

– Ne ŝercu, Narviks! Vi estis unu el la plej sangavidaj en blanka Afriko. Malgraŭ tio mi ne pafmortigos vin. Kuŝigos vin sur punbenkon. S-ino Perlinger plenumos cent batojn sur vi. Ĉu vi komprenis la verdikton?

– Jes.

– Ĉu vi ne apelacias?

– Ne. Kaj Dio indulgu vin, se refoje vi trafos en miajn manojn.

– Mi ne trafos, Narviks. Eble mi ankoraŭfoje revenos ludi, sed neniam mi trafos en viajn manojn. Nun evidentiĝis, vi ne estas tiel bonaj soldatoj. Ĉu vi scias, ke tia, kia vi, eĉ kaporaliĝi ne povus en la Pola Legio?

Narviks ne respondas, rigardas la plafonon.

– Forkonduku lin! – ordonas Dobrovsky al Hayan. Narviks ne atendas esti puŝata, mem ekiras al la muro kun rapidaj paŝoj kaj sidiĝas. Dobrovsky daŭrigas la proceson:

– Ni povas daŭrigi. Laŭ mia opinio, la verdikto, eldirebla super la akuzato, povas esti nur: morto. Li plenumis la krimon en cirkonstancoj, kiam ĝi neniel necesis, la kaptitoj estis nearmitaj, tute sendefendaj.

S-ino Hidkay anoncas sin:

– Ĉu vi havas familion? – li demandas la akuzaton.

– Tri infanojn.

– Kiomjarajn?

– Knabinoj. La granda aĝas naŭ, la meza sep, la eta kvin.
– Via edzino?
– Estas kun ili.
– Kie ili vivas?
– En Marsejlo.
– Kial vi faras ĉi tion?
– Oni devas iel perlabori al si la panon.
– Dankon.
– Mi ne opinias ĝusta, ke vi, s-ino Hidkay aliras la aferon el la flanko de sentoj. Se Hitler estus havinta hazarde dek kvin gefilojn, ĉu vi ne voĉdonus por lia morto? – demandas Dobrovsky kun indigno.
– Ĉu vi ne opinias, Dobrovsky, ke malgraŭ ĉio Murketos ne kompareblas al Hitler?
– Min ne interesas Hitler, mi nur asertas, la puno de tiel fia murdo devas esti morto, sendepende de tio, kiom da gefiloj kaj kiajn okulojn la murdinto havas.
– Ni voĉdonu – proponas s-ino Hidkay.
– Ĝuste, ni voĉdonu. Mi proponas la eldiron de morto. Kiu konsentas prie, levu la manon – diras Dobrovsky, levante alten sian dekstran manon.
Haecker kaj Soltersky voĉdonas jese, s-ino Hidkay kaj Huysmann ne levas la manon.
– Do mi konstatas, ke tri voĉdonis por la morto, du kontraŭ. La verdikto validiĝis per tio kaj plenumendos en kvin minutoj. La ekzekutan subdividon membras: k-doj Haecker, Steinbuch, Soltersky. La ekzekuto okazos en la apuda ejo, pere de mitraletoj. Mi finis. kamaradoj, bonvolu plenumi vian devon!
– Mi protestas, mi estas militkaptito, la Ĝeneva Konvencio rilatas ankaŭ al mi! – krias Murketos.
– Se mi bone memoras, estis ĝuste vi, kiuj deklaris antaŭ kelkaj horoj havi nenion komunan kun la Ĝeneva Konvencio. Ne ja, la Ĝeneva Konvencio ne rilatas al ordinaraj murdistoj. Vi murdas tute superflue, kun plezuro. Vin oni devas ekstermi! Forkonduku lin! – krias Dobrovsky.

Soltersky, Haecker kaj Steinbuch kaptas la soldulon. Tiu baraktas per ĉiuj fortoj, ne volas ekiri, ĝis oni levas lin, transportas en la alian ejon. Li blekas, veas.

Aŭdiĝas knaloj de tri mitraletaj pafserioj, poste en la silento de konsterno aperas la tri ludantoj kun vizaĝoj komplete trankvilaj, ili sinkigas planken siajn mitraletojn, sidiĝas basenborden, interesite rigardas, kiel oni rimenfiksas la nudan Narviks sur benko apudmura.

S-ino Perlinger paŝas kun ĝu-radianta vizago al la benko, tenas longan vergon en la mano, komencas plenumi la cent batojn.

Senvorte Narviks toleras la ĉiam pliakriĝantan doloron, ĉe la kvardeka bato li svenas. Oni rekonsciigas lin, la virino daŭrigas la vergadon kun sovaĝa pasio. La korpo de la viro jam plene bluas-verdas, ĝis s-ino Perlinger atingas la centan baton. Post la lasta nerapideme ŝi malligas la ŝnurojn de Narviks, sidiĝas laca sur la betono apud la benko, elsakigas ungventon, komencas froti ĝin en la sangoplenan korpon de la majoro.

Narviks movas sin, suprenapogas sin malrapide, levas sian vestaron de sur la planko, prenas ĝin subakselen, ŝanceliĝe transiras en la apudan ejon.

Dobrovsky levas la brakon, la ludantoj haltas, turnas sin al li.

– Gekamaradoj! La preciza tempo estas la dek-oka. Mi kredas, antaŭ krepuskiĝo ne valoras eliri sur la terenon. Morgaŭ matene ni eliros, enterigos la mortintojn, kaj iom gimnastikigos la kaptitojn. Mi pensis pri tio, ke antaŭ enlitiĝo mi permesas al vi du- ĝis trihoran liberan okupiĝon. En la teĥnika kajuto vi trovos instrumentojn, per kiuj vi povas havigi al la kaptitoj la plej kruelajn travivaĵojn de koncentrejo. Troviĝas insulina vakcino, katenoj en diversaj mezuroj, vipoj, mensogdetekta aparato, missensigaj drogoj. Mi proponas elekti laŭplaĉe kaptitojn, traludu je ili tiun programon, kiun ili ludus je ni, se ili estus la venkintoj. Kiu ne emas al tio, tiu povas trankvile kuŝiĝi por dormi, mi pensas, vi ĉiuj estas sufiĉe lacaj, elĉerpitaj. Se iu deziras fari rimarkojn ĉi-koncerne, bonvolu levi la manon.

Lewin, unua levas sian manon:

– Bonvolu, k-do Lewin – invitas Dobrovsky ĝentile.

– Por mi ĉio ĉi jam komplete malhavas intereson. La batalo ekscitis kaj ekscitus eble ankaŭ, se la solduloj estus venkintaj...

– Kial?

– Ĉar tiam ni travivus militkaptitecon.

– Ĉu vi estas masoĥisto, k-do Lewin?

– Ne, mi nur ne ŝatas torturi homojn.

– Ĉu vi ŝatas esti torturata?

– Povas esti, ke mi vere estas masoĥisto, sed por mi suferado pli akcepteblas ol torturado.

– Vivu k-do Kristo!

– Senkiale vi mokas, Dobrovsky, ne mi ununuras tia en la mondo.

– En ordo, sed tiam diru, kion ni faru? Se vi ne volas tuŝi la kaptitojn, kuŝigu vin kaj dormu.

– Tion mi faros.

– Cetere la torturado ne estas deviga. Vi povas ankaŭ babili kun la kaptitoj.

– Kiel venkinta konfesprena patro.

– Bone, Lewin, vi faros, ajnon vi volas. Vi povas testi ilin psikologie, en iu kajuto mi vidis Rorschach- kaj Szondi-fotarojn. Analizu la animon de la solduloj!

– Dankon, Dobrovsky, mi iel venos al konsento kun mi. Vi kion faros al ili?

– Nenion hodiaŭ vespere. Nun taskas al mi superrigardi vin ĉiujn. Morgaŭ matene mi kurigos ilin sur la tereno, laŭ mi ili delonge ne faris formaciajn ekzercojn. Kvankam eblas, ke ĉi tiu ideo pri la libera okupiĝo ne plej trafas. Mi petas opiniojn prie.

F-ino Meghallan anoncas sin:

– Mi ne voĉdonas por izolitaj, apartaj ludoj. Mi proponas ludi, kvazaŭ ni estus en teatro. Krome mi opinias danĝera, samtempe malkateni ĉiujn kaptitojn. Per neatendita lerta atako ili sukcesus superforti nin, kaj tio vere sekvigus nian finon. Mi proponas ludigi per la kaptitoj kaj volontuloj el vi, kion ili farus al ni, se estus venkintaj ili. Eble tiel ankaŭ Lewin kaj liaj kunpensuloj trankviliĝos. La solduloj certe ne aŭdacos iri ĝis ekstremo, niaj armitoj ja staros ĉe la scenejo. Mi

kredas, io pli bona ne elpenseblas.

Dobrovsky ridetas:

– La afero estas tro komplikita, fraŭlino. Mi ne kredas, ke oni povus ludigi per ili la propran venkon. Eĉ se esprimi milde: ili malhavas emon, ŝajnas nekapablaj helpi nin per fantaziriĉaj ideoj.

– Proponu ion pli bonan!

– Mi ne scias, pro tio mi demandas vin.

– Pripensu, ni povus elprovi ĉiujn variantojn. Ni konsultus la Regularon kaj povus realigi la proponojn de la Societo.

– Ne estas interese, mankas ĝuste, por kio ni venis ĉi tien: la vivrisko.

– Ankaŭ se la solduloj estus venkintaj, ne ĉiuj el ni estus en vivdanĝero.

– Mi ne volas memorigi al vi la tristan sorton de la filo Bondy. En via ideo mankas ĝuste ĉi tio.

– Erare vi rezonas, Dobrovsky. Per la disponeblaj teĥnikaĵoj la procezoj traviveblas.

– Vi ne pensas serioze, kion vi diras, f-ino Meghallan, ĉu ne? La afero ja diferencas, se venkinto vin perfortas, kaj se vi trudas viron per mitraleto, deŝiri de vi la vestaĵojn kaj kuŝigi vin sur la betonon.

– Ne prave. La travivaĵo samas.

Kirios levas la manon:

– Vi ne pravas, f-ino Meghallan. Vi simple ne komprenas, kiom ege venkinto kaj venkito diferencas. Ni venkis, ni estas venkintoj. Ni havas du eblojn, aŭ humane ni traktos la kaptitojn, aŭ ni torturos ilin. Mi tamen proponas trian eblon, ni ĉesigu la ludon. Propradire ni trafaris ĉiujn variantojn. Ni atakis, retretis, ankaŭ perdis portempe, gerilis. Ni estis torturataj kaj torturantaj, iu nia kamarado estis murdita, ni ekzekutis la murdinton. Kio plias? Ni donos insulinon al la kaptitoj, ili malsatiĝos, ni ne donos al ili manĝon, ili blekos, poste ni donos al ili manĝon. Ni trudos ilin perforti virinojn, se ili kapablos. Tio min ne tro interesas. Mi proponas ekkontakti la reprezentantojn de la Societo kaj komuniki al ili, ke ni venkis kaj ne volas ĝisatendi la finon de la ludotempo, ni volas fini triumfe la militon, sepulti la mortintojn, fari ĉasadon, poste hejmeniri. Soltersky anoncas sin:

– Kirios, vi parolas, kvazaŭ ne por via vivo vi estus batalinta.

– Soltersky, vi komencas preni serioze ĉi tiun ŝercon – diras Kirios ridetante.

– Vi lozigas la disciplinon, kvankam la milito ankoraŭ ne finiĝis.

– Kial ĝi ne finiĝis, laŭ vi?

– Ĉar la venko devas esti ankaŭ tenata. Se tio dependus de vi, vi malkatenus la kaptitojn kaj redonus al ili la armilojn.

– Mi ne scias, kial elpensi tiajn malsaĝaĵojn. Mi vortumis tre precize, diris nur, mi ŝatus fini la ludon, sed kun la konsento de la Societo, post sirenado.

– Mi ne emas forkuri.

– Ĉu forkuri? Antaŭ kio?

– Ĝis morgaŭ, la dua posttagmeze ni povos esti venkintoj. Kaj ni ja restos tiaj.

– Kion vi intencas fari?

– Mi ne scias, sed unu aferon certe ne: mi ne ĉesos.

– Ni vidos, Soltersky. Ni demandos, kion la plimulto volas.

– Dobrovsky, jam diru ion ankaŭ vi – petas Soltersky senpacience.

– Ankaŭ laŭ mia opinio ni devos fari, kion la plimulto volas – respondas Dobrovsky.

– Jes, jes, sed ĉi tiuj manipulas la homojn.

– Manipulu ilin ankaŭ vi!

– Mi kredis, Dobrovsky, vi staras niaflanke.

– Kiuj estas tiuj ni?

– Kiuj konas siajn devojn.

– Se vi scias tiel precize viajn devojn, do sciigu ilin!

– Eluzi la venkon.

– Kion tio signifas?

– Venĝi la mortintojn.

– Tion ni scias. Kion kroman vi proponas?

– Humiligi la venkitojn.

– En ordo. Farita ankaŭ tio.

– Kiam?

– Ĉu al vi ne sufiĉas la cent batoj sur Narviks?

– Ne misŝercu, tiom ne sufiĉas.

– Kion pli vi deziras?

– Laŭ mi, la propono de f-ino Meghallan estas sprita kaj utila.

– Bone. Do ĝis nun ni aŭdis du esencajn proponojn: laŭ unu ni petu la ĉesigon de la ludo, laŭ la alia ni ludu en iu formo la rilaton inter la venkintoj kaj venkitoj. Dankon, Soltersky, parolu ankaŭ aliaj. Van Delft, bonvolu!

– Ni restis sume dudek tri. El la ĝisnunaj deklaroj mi vidas, ke troviĝas inter ni aro da sadistoj kaj aro da masoĥistoj. La sadistoj volas torturi, la masoĥistoj suferi. Ĉu ne eblus regule kontentigi ambaŭ grupojn? La sadistoj restu ĉi tie kun ses nearmitaj solduloj, la masoĥistoj eliru sur la terenon kun la ceteraj ses, tie ili transdonu al tiuj la armilojn kaj suferu. La pordojn ni zorge ŝlosos, por ke la eksteruloj ne povu enveni. Morgaŭ je la dua posttagmeze ni renkontiĝos.

– Do vi estas sadisto? – demandas Dobrovsky.

– Ne, mi estas neŭtrala, pro tio mi volas resti ene. Eble troviĝos loketo por kuŝiĝi kaj dormeti. Mi, nome estas sufiĉe laca.

– Ideo ne malbona. Do ni havas ankaŭ trian proponon. Dankon, van Delft. Kiu ankoraŭ deziras diri tion?

Steinbuch levas la manon.

– Mi ne komprenas, Dobrovsky, kial vi ŝanĝis vian originan intencon? Vi diris, plej volonte vi emus ekzekuti ĉiujn soldulojn. Laŭ mi tio estus la plej ĝusta solvo. Ili mortigis sep niajn kamaradojn.

– Ankaŭ da ili mortis tri.

– Kial vi defendas ilin?

– Mi ne defendas ilin, mi nur scias kalkuli. Sep estas dudek tri procentoj de tridek, kaj tri estas dudek unu procentoj de dek kvar. La diferenco sumas du procentojn, ili pli bonŝancis je du procentoj. Detranĉu unu orelon al soldulo, per tio vi regajnos la du procentojn.

– Kaj kiel ili konfesigis vin? Ĉu tio nulas?

– Pro tio ili jam ricevis la sian. Ni ekzekutis Murketos, donis kvitancon al Narviks.

– Narviks ni devus pendumi.

– Kial?

– Ĉar li estas fia fripono!

– Mi ne dirus, ke vi argumentas logike.

– Ĉu laŭ vi oni ne devus lin pendumi?

– Ne.

– Kial?

– Mi klarigos al vi. Li faris nenion tian, pro kio ni devus lin pendumi. Li volis eltiri ion el ni, li provis perforte, verŝajne li batus nin, se al li restus tempo. Tio enestas en la Regularo, pro tio ni ne povas koleri lin. Murketos estas alia kazo, li estis kromplane bestia kaj estas ja pro tio ekzekutita. Rekonu, Steinbuch, vi ne pravas.

– Vi ne komprenas min, tiel ankaŭ Soltersky vi ne komprenas.

– Kio, ĉu vi volas ribeli?

– Ni ne volas, mi nur klarigas, kial ne ĝustas, kion vi faras.

– Mi tre scivolas. Des pli, ke ĝis nun mi faris nenion, krom gajni por vi la ludon.

– Estis vere via ideo. Sed sen ni…

– Mi ne pridubas vian heroecon.

– Ĉu vi mokas?

– Vi malsaĝas, Steinbuch. Diru, kion vi volas!

– Malĝustas, kion vi faras aŭ proponas, ĉar vi malcertigas la homojn. En la liberaj okupiĝoj elformiĝos personaj interrilatoj, disvaporiĝos la komuna malamo. Ĉi tiujn homojn ni devas nepardoneme malami. Ili atencis nian vivon, ili ne meritas indulgon.

– En ordo, mi ne diskutos kun vi, la gekamaradoj voĉdonos, decidos, kion fari. Kiu ankoraŭ alparolos? Bonvolu, s-ino Tabor.

– Mi proponas ligi la soldulojn ne tro strikte, nur tiom, ke ili ne eskapu, kaj ni kuŝigu nin dormi, lasu ilin en paco, ili same havas siajn zorgojn kiel ni. Ni provu konsoli Bondy. Plej konformus, kompreneble, kion Kirios proponis, do fini jam ĉi-vespere kaj reiri en la hotelon por dormi. Al mi sufiĉas, mi estas laca, malpura kaj malsata.

– Dankon! Plu, kamaradoj. Hayan anoncas sin.

– Ankaŭ mi subtenas la proponon de Kirios. Daŭrigi ne havas sencon. Ni venkis, kaj punkto. Ankaŭ ŝakludon oni ne daŭrigas post matigo.

– Sed niakaze la nura venko ne egalas matigon! – ekkrias Soltersky.

– Do kion?

– Venĝon kaj humiligon.

– Malsaĝaĵo. Mi ne volas politiki, sed certe vi scias, kiel la germanoj traktis siajn kaptitojn, kaj ankaŭ kiel la usonanoj?

– Ĉu tion diras guste vi, kiu estas germano?

– Pro tio, ke mi estas germano, mi rajtas diri, ke vi ne devas tiel trakti la malamikon, kiel tiu traktus vin, ĉu ne?

– Vi estas defetisto.

– Bone, sed proe ne mortpafu min! Mi proponas, Dobrovsky, voĉdonigu la grupon.

Dobrovsky transprenas la vorton:

– Do ni voĉdonu, kamaradoj. Eblas la sekvaj solvoj: unue ni finos la ludon, venos al interkonsento kun la Societo. Due: ni finos la ludon, ne interkonsentiĝos kun la Societo, ĉi tie ni ĝisatendos la morgaŭan posttagmezon. Trie: la sadistoj restos ene, la masoĥistoj eliros sur la terenon. Kvare: en libera okupiĝo de nedifinita daŭro ĉiu faros al elektita kaptito tion, kion li volas. Kvine: ni ludigos per la kaptitoj, kion ili farus al ni, se ili venkus. Sese: ni neniigos la kaptitojn.

F-ino Bunyin paŝas al Dobrovsky:

– Estas ankaŭ sepe. Ni transdonos al ili niajn armilojn.

– Kiam?

– Nun kaj ĉi tie.

– Por kio?

– Por ke denove ili iĝu venkintoj.

– Ne malbona ideo, sed mi kredas, krom vi ne multaj pledas por tia solvo.

– Voĉdonigu ankaŭ pri ĝi!

– Ni enlistigos ankaŭ ĝin.

– Ĉu vi volas la aferon surpapere? – demandas Soltersky.

– Jes, sekrete.

– Stultaĵo, ni voĉdonu malsekrete, per manlevo.

– Laŭ mi, pli bone sur papero. Ni skribos la sep variantojn, kaj ĉiu metos krucon apud tiu, kiu plej kontentigas lin.

– Ĝuste, ni faru tiel – konsentas Soltersky.

– Ni preparos la dudek tri listojn, surskribos la sep variantojn, disdonos ilin, ĉiu plenigos la sian kaj portos en la teĥnikan kajuton n-ro 1, metas ĝin sur la tablon. Mi petas paperojn, globkrajonon kaj dudek tri krajonojn. Bonvolu helpi, Soltersky!

Soltersky elportas la skribilojn el la teĥnika kajuto, transdonas ilin al Dobrovsky, ili sidiĝas unuj apud la aliaj, komencas skribi la listojn. Ili notas la sep proponojn, poste disdonas la paperfoliojn inter la ludantoj.

Tiuj flankeniras, plenigas, faldas la foliojn, enportas en la teĥnikan kajuton kaj demetas ilin sur la tablon.

Dobrovsky kaj Soltersky eniras la kajuton, kolektas, elportas la foliojn.

La ludantoj interesite ariĝas ĉirkaŭ ili.

Dobrovsky malfaldas la paperojn unu post aliaj, komencas nombri la voĉojn. Post ol ankaŭ la lastan li trastudis, li anoncas surprizite:

– Kun tio mi ne kalkulis, kamaradoj. La rezulto de la sekreta voĉdonado jenas: dek kvar donis sian voĉon, por fini la ludon kaj ekkontakti la Societon, tri voĉdonis por la masoĥista-sadista varianto, tri por la teatra ludo, du por la libera okupiĝo, unu por la neniigo. Laŭ tio la plimulto de la grupo volas fini la ludon. Kiel komandanto mi estas por la demokratia gvidado, mi do akceptas la proponon de la plimulto, ekkontaktos la Societon. Sincere mi diras, la rezulto iom mirigas min. Mi kredis, la ekscito pludaŭros. Verŝajne la impresoj ricevitaj estis tro intensaj.

S–ino Perlinger levas la manon:

– La vero estas, Dobrovsky, ke ni tedigis. Interesis sole la vivdanĝero. Soltersky ne pravas, venĝo kaj humiligo ne tiel gravas. La vivrisko ĉesis, mi enuas.

– Kompreneblas ŝia tediĝo, post ol ŝi kontentigis sin, trabatis Narviks! – alkrias Soltersky.

– Povas esti, ke vi pravas, sed eĉ tiam ni povas diri nur, kion mi sentas, mi tediĝis, volas hejmeniri.

Dobrovsky pacige levas la manon:

– Mi kredas, ne valoras analizi la rezulton. Faktas, ke dek kvar el ni dudek tri volas fini la ludon, mi do ekkontaktos la koncernulojn de la

Societo.

Li manvokas al si van Delft kaj Soltersky, eniras la radiotelefonian kajuton, agordas la sendoricevilon, komencas voki la centron de la Societo:

– Ha lo, ĉi tie la operacaj ejoj, ni petas s-inon NiĤarĤos, ni petas s-inon NiĤarĤos. Ha lo, ha lo, ĉi tie la operacaj ejoj!

Ili reŝaltas la aparaton por ricevo, ĝi krepitas, poste virina voĉo anoncas sin!

– Ĉi tie s-ino NiĤarĤos, ĉi tie s-ino NiĤarĤos. Kiu parolas?

– La komandanto de la ludantoj, Dobrovsky.

– Laŭ mia scio, la ludantojn komandas Sorensen.

– Li mortis, la gvidadon post li transprenis mi.

– Kion vi deziras?

– Ni venkis.

– Gratulon!

– Ni volus ĉesigi la ludon.

– Kial?

– La plimulto de la ludantoj tediĝis, ne trovas amuziĝon en la torturado de la solduloj.

– Ĉu vi volas diri, ke ni preskribis al vi neriĉan programon en la Regularo?

– Eĉ per vorto ne, la programo bonegis, verŝajne okazis nur, ke dum la pasintaj tridek horoj densiĝis tiom da impresoj, ke la sojlo de stimuliĝo troaltiĝis.

– Faru provojn per aliaj ideoj!

– Ni ne deziras provi novajn ideojn. Kiel venkintoj kaj ne trudataj ni petas vin, ebligu al ni la ĉesigon de la ludo. La preparitan programon vi ne bezonas modifi, se vi havus eventualajn ĝenojn, volonte ni rezignos pri la certaj aranĝoj.

– Kiom da solduloj mortis?

– Du.

– Narviks.

– Kaptita.

– Ĉu sana?

– Jes.

– Bonvolu voki lin al la aparato.

Soltersky eliras, baldaŭ revenas, tirante post si la ĉenitan Narviks. Dobrovsky demetas liajn mankatenojn, sidigas lin apud si.

– Ha lo, Narviks, sidas apude. Ha lo, s-ino Niĥarĥos, Narviks sidas apude.

– Dankon. Narviks, bonvolu respondi, ĉu veras, ke vi estas venkitaj?

– Jes, ni estas venkitaj.

– Kiel tio okazis?

– Pro la senrespondeco de Kreisbach.

– Dankon. La gastoj volas fini la ludon. Kiel vi opinias pri ĉi tiu nekutima deziro?

– Decidas vi, sinjorino.

– Dankon, jen kion mi atendis de vi. Bonvolu redoni la mikrofonon al la komandanto de la gastoj!

– Jes, ĉi tie Dobrovsky.

– Do s-ro Dobrovsky, bonvolu ripeti la peton!

– Ni petas la Societon, redukti la tempodaŭron de kvardek ok horoj de nia ludo al tridek horoj kaj permesi la finon de la ludo.

– Bonvolu atendi kelkajn minutojn, mi transigos vian peton al la Centro. Mi anoncos min kun la respondo.

– Ni atendas la respondon, sinjorino, dankon.

Dobrovsky turnas sin kun rideto al Narviks:

– Mi esperas, tio sukcesos.

Narviks ne respondas. Dobrovsky tuŝas lian ŝultron:

– Mi ŝatus, ke vi ne forgesu la simplan fakton, ke provizore vi estas nia kaptito.

– Kion tio signifas? Kion mi devas fari?

– Klopodu respondi, se vi estas demandata.

– Vi tedas min, Dobrovsky, lasu min en paco!

– Ĝuste, mi lasos vin en paco, malaperu for de mi!

– Ĉu vi eĉ ne katenos nin?

– Mi ne katenos vin, iru al la diablo!

Narviks starigas, eliras en la halon, sidigas al la muro, apud la aliaj

solduloj.

Eksonas la laŭtparolilo de la aparato:

– Ha lo, ĉi tie s-ino Niĥarĥos. Mi petas s-ron Dobrovsky.

– Jes, ĉi tie Dobrovsky, bonvolu, sinjorino.

– La centro trovas la aferon tre tikla, petas la kompletigon de la informoj.

– Bonvolu!

– Rakontu resume, kio ĝis nun okazis!

– Por kia bezono?

– Por konstati, ĉu vi ricevis sufiĉe da impresoj.

– Ni sentas, ke jes.

– Oni kalkulas per komputilo. Bonvolu rakonti resume la okazintaĵojn!

– En ordo. Hieraŭ Sorensen frenezule atakis la fortreson, ses el ni mortis. Mi transprenis la komandon, organizis gerilon, ŝajne kapitulacis al la ĉefforto, la virinoj ellogis la soldulojn sur la terenon, niaj gerilanoj malarmis ilin. Hodiaŭ posttagmeze ni venkis. Transdiru al la Centro, aliaj grupoj atendas eĉ dudek kvar horojn, ĝis ili ekagas. Vi povas trankvili, ni travivis ĉion, kion ni volis. Miaj homoj vere enuas, ne scias, kion fari, tiakaze oni devas ĉesi, alie ili malŝatos la tutan aferon.

– Mi komprenas vin, sinjoro, sed la daŭro de la ludotempo konsistigas unu el la bazaj punktoj de nia entrepreno. Ni ne povas cedi el ĝi eĉ sekundon. Provu trovi alian solvon!

– Mi ne volas zorgigi vin, sinjorino, sed mi timas, se nun ni ne sukcesos fini la ludon, la pozitivaj informoj, disvastigotaj pri vi, suferos pro tio.

– Bedaŭrinde eĉ tiukaze ni ne povas modifi niajn bazajn regulojn.

– Vidu, se tiel statas la aferoj, ni kuŝiĝos dormi, tradormos la restan tempon. Ĝene nur, ke ne ĉiuj kapablas tradormi dek ok horojn.

– Mi ne intencas doni al vi ideojn, s-ro Dobrovsky, sed se vere vi tre enuas, kaj en la Regularo vi ne trovas kontentigan amuziĝon, mi proponas, enprenu dormigilon. En la medicinaj tekoj de la teĥnikaj kajutoj vi trovos dozojn kun diversaj efikoj, do oni povas akomodi la dormodaŭron kun ekarto de minuto.

– Tio havas nenian sencon, sinjorino.

– Mi scias.

– Do kial vi tiom insistas?

– Vi deziras de ni ion tian, kvazaŭ iu petus, ke la semajnoj konsistu estonte el ses tagoj. Rekonu, ke tio ne eblas.

– Nun mi ne diskutos kun vi, nur kiam ni persone renkontiĝos.

– Ĝuste. Ĝis la revido, kaj refoje mi gratulas vin kaj en mia nomo, kaj en tiu de la Societo por la venko.

– Dankon, sinjorino, ĝis la revido morgaŭ posttagmeze. Kie nun Soltersky? – li demandas al van Delft.

– Li eliris.

Dobrovsky malŝaltas la aparaton, elpaŝas en la halon. Malantaŭ la pordo staras Steinbuch, kun mitraleto, direktita al li.

– Al la muro! – li krude ordonas.

– Ĉu vi freneziĝis? Kion vi volas? – demandas Dobrovsky kolerigita.

– Mi diris, stariĝu al la muro!

Li levas la mitraleton de sur la ŝultro de Dobrovsky, ĵetas ĝin sur la betonon.

La aliaj ludantoj jam staras ĉe la muro, kun armiloj plankenĵetitaj, Soltersky, Bondy, Haecker, Huysmann kaj f-ino Meghallan gardas ilin.

La solduloj ekscitite turnadas siajn ĉenitajn manojn, esperplene spektas la scenon.

Soltersky haltas antaŭ Dobrovsky.

– Jen la sorto de defetistoj. Vi bonŝancas, mi ne tuŝos vin, vi havis bonan ideon. Bele vi dormos ĝis morgaŭ posttagmeze, ni farigos per vi tion, kion vi destinis por ni. Kaj dormos kun vi ankaŭ tiuj dek kvar gekamaradoj viaj, kiuj volis ĉesigi la militon.

Dobrovsky retrorigardas al Soltersky.

– Kiel vi eltrovos tiujn dek kvar?

– Mi divenos.

– Kion vi intencas fari?

– Kion f-ino Meghallan proponis. Oni devas ludi per la kaptitoj, ili ellernu, kiaj ni estas.

– Nun diras mi, ne trafu en miajn manojn, Soltersky!

– Plej frue nur morgaŭ posttagmeze. Steinbuch, eniru en la teĥnikan kajuton, elportu la medikamentan skatolon.

Steinbuch elportas la skatolon, metas ĝin malantaŭ la ludantoj sur la plankon. Soltersky levas ĝin, elprenas el ĝi flakoneton kun etikedo „Dormigilo”, elprenas dek kvar tablojdojn, enpoŝigas ilin kaj komandas:

– Envicigu sin, kiuj voĉdonis por la ĉesigo de la milito! Neniu movas sin.

– Bone, tiam mi nomos tiujn dek kvar, kiuj volis malkuraĝe forkuri. Dobrovsky, Lewin, Kirios, van Delft, s-ino Tabor, Hayan, f-ino Bunyin, s-ino Perlinger, Pekkinen, f-ino Neudorf, Charnton, Serantoni, Schmidt kaj s-ino Hidkay. Kiu ne agnoskas tion? Do ĉiuj agnoskas? Tiam ĉio akordas. Ankaŭ la ceteraj naŭ estas trovitaj, kies nomojn nun mi ne menciis!

Apud la armitajn gardistojn paŝas de la muro s–ino Litvak, f-ino Colin kaj Steko. Ili levas sian mitraleton de sur la planko, stariĝas malantaŭ la ludantoj.

Dobrovsky returnas sin:

– Vi estas kompleta idioto, Soltersky!

– Fermu la muzelon, kaj turnu vin al la muro, alie mi lasos en vin pafserieton! – kriegas Soltersky.

Dobrovsky returnas sin, staras senmove antaŭmure. Soltersky elpoŝigas tablojdojn, donas po unu al la ludantoj:

– Jen al vi, englutu ĝin! – diras unue al Dobrovsky, kaj direktas la mitraleton kontraŭ li.

Dobrovsky prenas la dormigilon, metas ĝin sur la langon kaj glutas ĝin, post li ankaŭ la ceteraj dek tri. Soltersky krias plu:

– Nun vi ricevis, kion vi volis, bele nun vi elludiĝos.

Morgaŭ posttagmeze, je la dua vi estos vekitaj, por festi la momenton de la naskiĝo de la paco. Nu, eksidi, poste iom post iom kuŝiĝi!

– Donu almenaŭ plejdon sub ni – petas Dobrovsky.

– Nulas plejdoj!

– La sakoj troviĝas en la angulo.

– Dirite: nulas plejdoj!

– Fripono!

– Fermu la muzelon, Dobrovsky, aĉa fino trafos vin, se vi ne silentos! Mi ne donas plejdojn, almenaŭ vi sonĝos esti militkaptitoj.

La dek kvar ludantoj malsuprenlasas sin malrapide sur la betonan plankon. Dormeme, maltrankvile ili turnadas la kapon, poste dormiĝas, kuŝas senmove.

Soltersky kaj Steinbuch paŝas al Narviks.

– Mi esperas, vi scias, kio vin ĉiujn atendas? – demandas Steinbuch.

Narviks respondas per trankvila voĉo:

– Ni scias.

– Vi meritas vian sorton.

– Mi ne intencas nigrigi vian humoron, sed ne kredu, ke vi forvelos sen peno kaj puno.

– Nu kio, ĉu vi eĉ minacas?

– Niaj amikoj trovos vin eĉ rande de la mondo kaj frakasos vian kapon.

– Ni ne timas ilin.

– Vi vidos. Ankaŭ Murketos vi ne devus mortigi, li agis sindefende.

Bondy ekblekas:

– Fripono, ĉio okazis pro vi, vi faris tion!

– Mi nur enketis.

– Pro tio vi volis dronigi min, ĉu?

– Mi ne volis. Ripete mi atentigis vin, ĉesu! Ni batalis kavalire, kiu mortis, mortis, vi humiligis min per tiu virino, sed nun jam sufiĉas. Se vi daŭrigos tiel, mi ne kredas, ke vi restos vivaj pli ol du tagojn. Pravis Dobrovsky, ĉiuj jam tediĝis, ni traludis la partion, ne valoras plustreĉi la kordon.

– Afabla vi estas, Narviks. Tamen kion vi proponas fari ĝis morgaŭ posttagmeze? – demandas moke Soltersky.

– Vi ridos, sed la sola solvo estas dormi. Ni malsatas, lacas, la nutraĵo konsumita... Ni englutos dormigilon, kaj morgaŭ posttagmeze, je la dua la servistoj vekos nin.

– Ne eblas, ni devas aranĝi teatron! – urĝas f-ino Meghallan ekscitite.

– Ŝi pravas, ni aranĝos teatron. Mi esperas, Narviks, vi havas neni-

on kontraŭ tio? – demandas Soltersky.

Narviks ne respondas.

– Ni ludos mutan teatron – diras Huysmann. F-ino Meghallan, konigu, kiel vi volas fari ĝin? – petas Soltersky. – Ĉu poste ni dormos? – demandas Haecker.

– Ĉu vi dormemas? Kuŝigu vin ĉi tie, inter ĉi tiuj – mokas Steinbuch kaj montras al la ludantoj, kuŝantaj sur la betono.

– Imagu al vi, mi dormemas.

– Kial vi ne diris, jam delonge vi povus esti enpreninta la tablojdon.

– Pri mi vi vane ŝercaĉas, vi ne povas ofendi min.

– Mi vidas.

– Bone. Ni aŭskultu f-inon Meghallan, kiel ŝi imagas la aferon – proponas Haecker.

La knabino parolas haste-kapte:

– Ni devus ludi ne tion, kion ili farus al ni ĉe sia venko. Mi elpensis ion pli distran.

– Diru! – urĝas Soltersky.

– Po du solduloj sidiĝos antaŭ ni kaj komencos interparolon. Dum la dialogo oni rajtas diri nur senchavajn frazojn, kaj teni paŭzojn, ne pli longajn ol tri sekundoj post ĉiu demando. Ni mezuros la tempon, kaj se iu ne kapablos respondi post la tria sekundo, aŭ diros sensencaĵon, tiun ni mortpafos. Ĉu vi konsentas?

– Tre bone – jesas Steinbuch.

– Kiom longe la ludo daŭros? – demandas Haecker.

– Kiom ni volas – ŝi respondas.

– Kiuj estu la unuaj?

– Laŭ mi ĉi tiu grizharulo kaj Kreisbach.

Rother kaj Kreisbach terurite rigardas al la ludantoj, gestantaj per siaj armiloj.

– Venu ĉi tien, eksidu sur la bordo de la baseno! – komandas f-ino Meghallan.

Ambaŭ solduloj stariĝas, iras antaŭ la knabinon, sidiĝas unu kontraŭ la alia. Steinbuch, Soltersky, Bondy, Haecker kaj Huysmann stariĝas malantaŭ ili, la paftubojn de la mitraletoj premas al ili en la dorson.

– Ni povas komenci. Mi diros la unuan frazon. Ĉu vi komprenis la ludregulojn? – demandas la knabino.

– Jes – respondas Kreisbach.

– Anstataŭ vi mi diros la unuan frazon, Kreisbach. Do. La ladhepataĵo ne tre bone gustas.

Steinbuch kaj Soltersky rigardas siajn horloĝojn. Rother haste respondas:

– La kuiristino enŝutis sablon.

– Kial vi ne elĵetas la kuiristinon? – demandas Kreisbach mallaŭte.

– Ĉar ŝi amikas kun mia edzino.

– Kiam vi edziĝis?

– Proksimume antaŭ kvar semajnoj.

– Kiom aĝas la kuiristino?

– Dudek tri.

– Kie ŝi prenis la sablon?

– Portis ĝin el Svedio, tiu de Saharo maldelikatas, ne uzeblas.

– Ĉu la sveda sablo manĝeblas?

– Ĉiuj sabloj manĝeblas, sed ili ne grasigas.

– Ĉu la kuiristino donas sablon ankaŭ al sia filo?

– Ne, ŝi amas sian filon.

– Ĉu vin ŝi ne amas?

– Jes ja, sed da konservaĵoj malmultas.

– Do ŝi enmetas sablon, por ke la enhavo plimultiĝu.

– Probable.

– Tiuokaze kiel povas esti, ke via edzino dikas?

– Ne nur konservaĵojn, ankaŭ aliajn manĝaĵojn ŝi konsumas.

– Kiujn ekzemple?

– Bovidaĵon.

– Kion ankoraŭ?

– Porkaĵon.

– Kion ankoraŭ?

– Ŝafaĵon.

– Kion ankoraŭ?

– Fiŝaĵon.

– Kion ankoraŭ?

– Krabaĵon.

– Ĉesu! Tio kontraŭregulas! – krias f-ino Meghallan.

– Ne estas preskribite, kiom longu la frazoj – rimarkigas Kreisbach raŭke.

– Ne ja, sed tiel estas facile.

– Stultaĵo, ĝi tedas min – diras Soltersky.

– Ni pendumu ilin! – proponas Steinbuch.

– Ne ŝercu, ne eblas.

– Sed kial? Ni venkis. Ni venĝos al ili, pendumos ilin. Ĉu ne, Bondy?

– Ne, ne necese.

– Pli frue ankaŭ vi estis por tio.

– Mi laciĝis, tediĝis. Edveno ne reviviĝos, se mi nun pendumos ilin. Geknaboj, ni kuŝigu nin, dormu iom.

– Vi idiotas, Bondy.

– Eble, tamen mi volus dormi.

– Do ni dormu, mi estas por tio, se ĉiuj konsentas – deklaras Soltersky.

– Diablo prenu vin, ni dormu – aprobas ankaŭ Steinbuch. Ridante, oscedante iras Soltersky al la solduloj:

– Sed unue la solduloj. Al ili ni donos duoblan dozon. Jen al vi la tablojdoj. Narviks, venu ĉi tien, mi katenos vin.

Narviks stariĝas, Soltersky katenas lin, transdonas al li du tablojdojn. Narviks glutas ilin, poste sidiĝas sur la betono, malrapide kuŝiĝas, dormiĝas.

La aliaj solduloj same enprenas la tablojdojn, kuŝiĝas, simile endormiĝas.

Soltersky donas ankaŭ al siaj kunuloj dormigilon, laŭvice unue al Haecker, Huysmann, f-ino Meghallan, Steinbuch, poste ankaŭ li enbuŝigas unu.

Ili paŝas al Dobrovsky, ĵetas plejdojn sur ilin, ankaŭ sub sin sternas po unu, kuŝiĝas kaj glitas en dormon.

Sur la bordo de la baseno kun vaporanta akvo dormas senmove dudek tri ludantoj kaj dek unu solduloj.

7

Eksonas sirenoj, signalantaj la finon de la ludo.

La flankopordoj malfermiĝas, blanke kitelitaj servistoj aperas tra ili kun blankaj banmanteloj, buntaj viŝtukoj kaj spongoj en la manoj. Aliaj portas trinkaĵojn, refreŝigaĵojn sur pletoj.

La ludintoj vekiĝadas unuj post aliaj; lacaj, egalhumoraj ili lasas la servistojn prizorgi ilin. Tiuj frotadas al ili la korpon, trinkigas al ili refreŝigaĵon, fortan brandon.

La solduloj ne vekiĝas, la servistoj vane frapadas al ili la vangojn. Do oni alportas brankardojn, forigas ilin.

Poste la servistoj starigas palmojn, kuŝoseĝojn basenborde.

La ludintoj etendiĝas lacaj en la kuŝoseĝoj, ili surhavas banmantelojn, kelkaj el ili kuŝas sur masaĝotabloj, spertaj masaĝistoj frapadas, lozigas al ili la muskolojn.

Junaj knabinoj enportas florojn en grandaj porcelanaj potoj, ŝprucblovas parfumon en la aeron.

Diketa virino en baletkostumo kondukas kvar fokojn en la halon, per brakogesto komandas ilin en la akvon, enĵetas al ili blankan pilkon, tiuj komencas ludi per ĝi.

La ludintoj kuŝas duonsvenaj, ne tre atentas la spektaklon.

Dobrovsky kaj Soltersky sidas en komfortaj rotangoseĝoj unu apud la alia.

– Estis bona truko, ĉu ne? – demandas Soltersky ridante.

– Mi fidis vin, kia eraro! – respondas Dobrovsky ridante.

– Rigardu, la kompatindan Bondy denove atakis konvulsia ploro. Hieraŭ superbone li tenis sin, li eĉ ridis. Tuj li ricevos vakcinon. Li atendas la edzinon, ŝi estas jam sciigita. Estos ĝenaj momentoj.

– Iam li trankviliĝos.

– Kompreneble, li trankviliĝos. Laŭ mi venontjare kune kun la edzino li revenos.

– Eble. Sed diru, kion vi faris, post ol ni dormiĝis?

– Nenion. Ni komplete stultis, kapablis elpensi nenion distran. La knabino eksperimentis, sed ankaŭ tio sensencis. Fine ankaŭ ni kuŝiĝis

dormi.

– Vidu, kia idioto vi estas, vi pretis min mortpafi.

– Ne koleru, vi kondutis strange.

– Kial? Ankaŭ vi kapablis elpensi nenion.

– Sed nur pro tio, ke la unuan fojon ni partoprenas. Mi revenos, ĉi tiu estas bona lernejo, porvira, multe lerneblas ĉi tie. Povas esti, la tempo mallongas. Dum tioma tempeto nenion oni povas elpensi. La Regularo ne taŭgas, farendas alia, mi cerbumos prie. Certu, estonte mi scios, kion fari. Ĉu vi venos sekvafoje?

– Eble, mi ankoraŭ ne scias.

– Oni devus kolekti la plej rutinajn knabojn, kunigi bravan grupeton.

– Mi pensis pri tio, ke la afero fareblus ankaŭ aliloke. Ĝi estas plaĉe amuza, ĉu, eĉ solduloj ne necesas, nur du grupoj. Mi faros ĝin en mia bieno.

– Ĉu vi invitos min?

– Kompreneble. Sed nun mi jam konas vin, ne ellasos vin el la vido.

– Espereble vi ne inklinas diri pri mi, kion Narviks opiniis pri Kreisbach?

– Ion tian mi ne rajtas aserti, ja per via helpo ni gajnis la ludon. Nur post la venko mi devintus vin pli atenti.

– Vi tro molis.

– Ankaŭ vi ne tro ferocis, nur la lango bravis al vi. La afero Bondy kontraŭ Murketos trosufiĉis al mi. Mi ne komprenas, kial la Societo insistis tiom rigide pri la observo de la ludodaŭro.

– Estis nekutime al ili. Mi pensas, okazis la unuan fojon, ke ne la solduloj venkis.

– Ni demandos la direktorinon – rimarkigas Dobrovsky.

– Malgraŭ ĉio vi distris vin bone, ĉu?

– Estis ne malbone.

– Mi rekomendos la aferon al miaj geamikoj.

– Mi same, sed kiun mi mem faros, superos ĉi tiun. Ĉe la enirejo aperas s-ino Niĥarĥos. Surhavas leĝeran sportveston, ekiras ridetante inter la ludintojn, salutas ilin, tiuj donas al ŝi glason, verŝas al ŝi, inter-

tintigas kun ŝi la glasojn. Ŝi direktas sin al Dobrovsky. Tiu stariĝas, ŝi etendas la manon, li kisas ĝin.

– Mi salutas la venkinton! – ŝi diras kun rideto, frapetas lian ŝultron.

– Kial vi mokas min?

– Mi ne mokas. Ĉu vi scias, kiom gravas ĉi tiu venko? Jam delonge mi gvidas ĉi tiun negocon, sed ankoraŭ neniam okazis, ke la gastoj venkis.

– Diru, sinjorino, kiomope oni kutime mortas?

– Tio estas bedaŭrinde ofica sekreto, mi ne rajtas malkaŝi ĝin, sed ne zorgu, viaj nombroj ne superas la averaĝon. Pli gravas al mi, kiel vi sentis vin?

– Bonege.

– Kiam ni interparolis radiotelefone, mi havis la impreson, vi ne kontentas pri la programo, la Regularo.

– Eĉ por momento ne! Jam ankaŭ tiam mi klarigis al vi, nia kazo estas eksterordinara. Ni venkis tro rapide. Mi mem ne kredis atingi la celon tiom tuje, per tia, sufiĉe ordinara ideeto.

– Ne modestumu, s-ro Dobrovsky, Narviks raportis, per kiel genia taktiko vi akiris la venkon por via grupo. Aparte mi ŝuldas dankon al vi por la humana traktado, kiun vi donis al niaj dungitoj.

– Kio koncernas Murketos…

– Mi konas la faktojn. Murketos pafis iom tro frue. Kompreneble, ni havas nenion kontraŭ viaj disponoj, vi procedis ĝuste, kiam vi donis avertan ekzemplon.

– Verdire danku ne min, sinjorino pro tio, ke la solduloj restis vivaj. Mi ne scias, ĉu vi konas lin, mi prezentas mian amikon Soltersky.

– Mi salutas vin, s-ro Soltersky. Do estas vi la ĉefhumanisto.

– Dobrovsky modestumas.

– Laŭ mia scio, post tio, ke vi dormigis Dobrovsky kaj liajn homojn, troviĝis inter vi kelkaj, kiuj volis neniigi la soldulojn?

– Ĉu tiom bone vi estas informita, sinjorino?

– Narviks kaj liaj homoj sciigis min pri ĉio.

– Do vi scias pli multe pri ni ol ni mem.

– Vi ŝercas, s-ro Soltersky. Sed tion ni certe scias, ke s-ro Dobrovsky kaj vi gajnis la ludon. Pro tio mi turnas min al vi. Senĉese ni klopodas plibonigi la kondiĉojn de la ludo kaj akomodi la Regularon al la interesoj de niaj gastoj. Mi volus peti vin ambaŭ pri konsiloj, rilataj al ĉi tiu laboro. Mi esperas, post la ĉasado vi pasigos ĉe ni ankoraŭ kelkajn tagojn, kaj ebligos al ni renkontiĝi. Mi certegas, vi donos al ni tre utilajn sugestojn.

– Sinjorino, ni faros ĉion laŭ nia povo – respondas Dobrovsky ĝentile.

– Mi volus ankoraŭ demandi vin, en kia stato troviĝas s-ro Bondy? Ĉu ni jam povas voki lian edzinon, aŭ ni ankoraŭ atendu?

– Alvoku ŝin trankvile, pli bone se ŝi apudestas lin. Hieraŭ vespere li sentis sin jam bone, nun li rompiĝis. Pli bone, se ŝi venos.

– Mi komprenas, sinjoroj, mi ne ĝenos vin plu. Ĝis la revido morgaŭ, dum la ĉasado.

– Ĝis la revido. Ni staros en ĉio je via dispono, sinjorino – diras Soltersky.

Ŝi stariĝas, ekiras al la ludintoj, starantaj basenborde.

8

Sur la vasta maldensejo staras longaj, pormetitaj tabloj. Placorande, antaŭ malaltaj arbustoj glimas braĝoj. Ĉasiste vestitaj servistoj ĉirkaŭstaras ilin, rostas viandon super ili. Turnadas la stangojn super la ardaĵo, graso gutadas de sur la rostaĵoj.

La ludintoj staras po opetoj sur la maldensejo, babilas, ridadas. Servistoj paŝadas inter ili, regalas ilin per trinkaĵoj, refreŝigaĵoj sur pletoj.

Malantaŭ la maldensejo, sur pado, ĉasiste vestitaj dungitoj kondukas spurhundojn, rajdĉevalojn. Kvarmembra orkestro staras inter la tabloj, la muzikistoj havas latuninstrumentojn, ludas mallaŭte malnovajn ĉasistajn melodiojn.

Kelkaj el la gastoj: Huysmann, Steko, Steinbuch enseliĝas, fortrotas.

La aliaj ludintoj paŝadas nerapideme al la tabloj, sidiĝas.

La sinjorino konversacias kun f-ino Meghallan rande de la maldensejo:

– Belege estis ĉe vi – diras la knabino.

– Mi ĝojas, ke plaĉas al vi ĉi tie. Kiel vi amuziĝis?

– Tre bone. Vere superbe.

– Mi aŭdas, vi havas bonajn ideojn?

– Ĉu vi kredas ilin bonaj?

– Mi scias. Ĉi tiun dialogan ludon ni enmetos en la Regularon, se vi permesas.

– Tio ĝojigus min.

Servisto en ĉasista vesto paŝas al la sinjorino:

– Sinjorino, iu sinjoro volas paroli kun vi.

– Bonvolu alkonduki lin!

La servisto foriras; reaperas kun alta, nigrahara junulo inter la randaj arboj. La servisto postrestas, la viro klinas sin antaŭ la sinjorino:

– Mi salutas vin, sinjorino. Eble vi ankoraŭ memoras min, ni jam intervidiĝis, kiam unuafoje vi faris viziton en la urbo.

Mire la sinjorino respondas, iom nervoze.

– Mi ne memoras.

– Mi bedaŭras ĝeni vin. Bonvolu veni kun mi!

– Mi havas gastojn, ĉu ne eblus poste?

– Mi bedaŭras, ne eblas. Mi alvokas vin veni kun mi, mi ne volus uzi perforton.

La sinjorino gestas pardonpete al f-ino Meghallan, ekiras kun la viro direkte al la arbaro. Ili venas inter la arbojn, marŝas senvorte.

Ne malproksime de la senarbejo, nigre vestitaj, ŝtalkaskaj frappolicanoj disvolvas sin en atakvicon, iom post iom ĉirkaŭas la maldensejon.

La sinjorino haltas frapita, returnas sin. Malantaŭe, sur eta maldensejo staras katenitaj solduloj en strikta ĉirkaŭpreno de policanoj.

La viro turnas sin al la sinjorino:

– Mi estas la prokuroro.

Li manvokas al si junan policanon, civile vestitan:

– Bonvolu voĉlegi la decidon de la enketa juĝisto.

La policano elpoŝigas paperon, kaj turninte sin al la sinjorino, komencas voĉlegi la tekston:

– De la Oficejo de la Distrikta Enketa Juĝisto. Pro bazita suspekto pri plurfoja plenumo de krimoj, endanĝerigantaj la publikan ordon, sekurecon kaj la socian pacon mi eldonas mandaton de provizora aresto kontraŭ la respondecaj gvidantoj, dungitoj kaj kunlaborantoj de la firmao, registrita kaj funkcianta sub la nomo Societo por Rekonstruo kaj Utiligo de Forlasitaj Fortresoj.

La sinjorino senmovas kelkajn sekundojn, poste turnas sin al la prokuroro:

– Mi insistas, ke mia advokato kaj ankaŭ la jura konsilanto de la Societo ĉeestu. Mi kredas havi rajton je tio.

– Kompreneble, ni avizos ilin.

– Mi mem volus paroli kun ili.

– Ĉiukaze ni eniru nun la fortreson.

– Permesu almenaŭ, ke mi orientu niajn gastojn!

– Mi jam donis instrukcion, post la ĉasado ankaŭ ili envenos la fortreson.

– Ĉu ankaŭ ilin vi intencas aresti?

– Ne, mi petos ilin, laŭeble plej baldaŭ hejmeniri.

– En ordo, ni povas ekiri. Ĉu ĉefkonsilisto Ruferios scias pri ĉi tiu

interveno?

– Ĉiuj scias pri ĝi, kiujn ĝi koncernas.

– Mi ne komprenas.

– Kvankam tre klare. Ĉu ni povas iri?

– Jes.

Polica ĵipo ĝiriĝas al ili, la prokuroro ĝentile antaŭenlasas la sinjorinon.

9

La sinjorino staras apud la prokuroro ĉe la fenestro de la direktora ĉambro de la fortreso. Meze de la korto, ĉirkaŭita de betona muro, sidas katenitaj solduloj antaŭ garbigitaj armiloj. Tra larĝe malfermita ŝtalpordo oni povas ĝisvidi la basenejon, kie la gastoj embarasite, hezite iradas tien-reen.

Civile vestita policano paŝas al ili, laŭte anoncas:

– Kontraŭ vi ne ekiros proceso, vi povas hejmeniri, poste vi estos pridemandataj kiel atestantoj. Bonvolu notigi viajn personaĵojn, adreson ĉe la deĵoranta oficiro. La sinjorino rimarkigas mallaŭte:

– Mi kredas, vi procedas principe kontraŭjure. Vi ne rajtas kateni niajn dungitojn, ili ne kontraŭstaris. Vi ne rajtis tion.

La prokuroro respondas kun serioza mieno:

– Vi pravas, sinjorino, tio vere superfluis. Okazis ne laŭ mia instrukcio.

La sinjorino ridetas pardoneme, la prokuroro envokas policoficiron el la koridoro:

– Bonvolu disponi, ke oni demetu la katenojn de ili.

– Sinjoro, nur por la sekureco...

– En ordo, sed ne okazis kontraŭstaro.

– Mi komprenas – respondas la oficiro, honorsalutas kaj eliras el la ĉambro.

Li aperas en la korto, donas instrukcion al la policanoj, tiuj deprenas la katenojn de sur la manoj de la solduloj.

– La telefono ne funkcias – diras la sinjorino kun moko en sia voĉo.

– Jes, iu distranĉis la kablojn.

– Mi ne povas informi mian advokaton.

– Ni informos lin – diras la prokuroro.

– Dankon! Venu, ni malsupreniru al la korto!

Ili venas en la basenejon, la gastoj promenadas zorgoplene en aretoj ĉirkaŭ la bordo. Bondy kuras renkonte al ili:

– Sinjoro, mi volus persone denunci la Societon. Iu dungito ilia murdis mian filon – li diras lamente.

– Poste, sinjoro – respondas la prokuroro.

– Li havis nenian kaŭzon por tio; la knabo intencis nur defendi min! – krias Bondy plorsingulte.

S-ino Hidkay prenas la ŝultrojn de Bondy, turnas lin al si:

– Ne koleru, sed vi sciis, venonte ĉi tien, ke io tia povos okazi. Vi ambaŭ subskribis la deklaron, konis la regulojn de la ludo. Ni ĉiuj bedaŭras vin, kunsentas al vi, sed ĉi tion mi ne konsideras honesta. Ni sciis, kion ni prenas sur nin. Kaj tio estas ne nur mia opinio, ĉiuj kamaradoj simile pensas.

Bondy forkuras, skuate de ploro.

Charnton ekstaras antaŭ la prokuroro:

– Vi probable malfacile komprenas, kio okazis ĉi tie…

– Kiu vi estas?

– Ne gravas. Fojfoje mi akiradas interesajn librojn, mi proponas al vi legi ilin, via profesio ja fakte intertuŝiĝas kun perforto.

– Kial vi supozas, ke mi ne konas la koncernan literaturon?

– Ĉu vi staras flanke de perforto?

– Mi estas oficisto, kaj la socio strebas ĉiam al kvitiĝo. Laŭeble koste de plej malmulta perforto.

– Ĉu vi konsentas pri tio?

– Mi ne diris tion.

– Per kio vi akuzas la Societon?

– Temas pri akuzo ne persona, mi plenumas la arestmandaton, donitan de la enketa juĝisto.

– Venu, ni reiru! – proponas la sinjorino kaj ekiras al la konstruaĵo. La prokuroro postsekvas ŝin.

Veninte en la direktoran ĉambron, ŝi verŝas viskion al la viro.

– Vi aspektas saĝa knabo. Ĉu vi emas iom kunludi?

– Mi ne komprenas vin.

– Estos interesa ludo, vi vidos.

– Se ne kontraŭleĝa.

– Mi promesas tion.

– Bone– konsentas la prokuroro.

Ili paŝas al la alkorta fenestro, ŝi okule elserĉas Narviks.

– Suprenvenigu tiun altan, blondan dungiton nian, tie ĉe la muro!

La prokuroro malsuprenvokas al policano, staranta sub la fenestro, montrante al Narviks.

– Suprensendu tiun junulon!

Narviks enpaŝas tra la pordo, mansalutas. La sinjorino klinas sin al lia orelo, enflustras ion. Narviks returnas sin, reiras en la korton.

La solduloj singarde disiĝas sur la korto, ŝteliras malantaŭ la policanojn, per ĵudomovoj subite malarmas la surprizitajn uniformulojn. Per la forprenitaj armiloj ili devigas tiujn stariĝi kun levitaj manoj almure.

La sinjorino ridetas:

– Vidu, ili estas profesiuloj. Ni povas kolekti la plej bonajn el la tuta mondo, ni bone pagas ilin. Mi petas ankaŭ vin, bonvolu same stariĝi al la muro kaj levi la manojn.

– Vi ŝercas, mi reprezentas la grekan ŝtaton.

– Mi ne ŝercas. Hodiaŭ vi reprezentas tian grekan ŝtaton, kiu inicias nun proceson kontraŭ mi. Sed ĉu vi certas pri tio, ke morgaŭ la sama greka ŝtato reprezentos ne aliajn principojn?

La prokuroro silentas.

– Nu vidu, vi ne certas. Bone, do ne stariĝu al la muro, ne levu la manojn, sidiĝu ĉi tie, malantaŭ la ekrano!

Ŝi montras al ekrano, staranta ĉambroangule. La prokuroro iras malantaŭ la ekranon, sidiĝas.

Du solduloj, armitaj per mitraletoj, eskortas tri policoficirojn en la ĉambron. Sidigas ilin sur seĝoj ĉe la tablo. La sinjorino sidiĝas aliflanke de la tablo, la solduloj posteniĝas dorse de la oficiroj.

Ĉi lastaj indignas:

– Ni protestas, vi uzis perforton kontraŭ publika instanco!

La sinjorino respondas kun rideto:

– Tio veras, ĝis vi staras en la povo. Sed nun staras tie mi, kaj vi troviĝas antaŭ tribunalo, vi respondecas nun pri viaj faroj.

– Sinjorino, ni faris nenion kontraŭleĝan – diras la grizhara oficiro, sidanta maldekstre.

– Silentu! Stariĝu! Via nomo, tiu de la patrino, naskiĝloko, tempo? Lasu, prefere donu la legitimilon!

La oficiro stariĝas, transdonas sian legitimilon.

– Kiom da jaroj vi servas? Precize diru!

– Tridek du jarojn, tri monatojn.

– Kiom vi perlaboras?

– Dek du mil.

– Ĉu vi povas vivteni vian familion?

– Jes.

– Ĉu vi jam partoprenis militon?

– Ankoraŭ ne.

– Kion vi faris sub la germanoj?

– Mi estis policano.

– Se oni rekrutos vin, ĉu vi enarmeiĝos?

– Ordono plenumendas, sinjorino. Mi ne povas elmeti mian familion al danĝero. Se mi ne iros, mi iĝos dizertinto, oni ekzekutos min.

– Sidiĝu!

La grizhara oficiro sidiĝas.

La sinjorino turnas sin al la meza:

– Kial okazas militoj laŭ via opinio?

– Mi ne komprenas la demandon.

– Tamen, kial?

– Ili estiĝas eble same, kiel akcidentoj surstrataj. Kie oni trafikas, tie okazas ankaŭ akcidentoj. Kie oni vivas, oni ankaŭ kverelas.

– Ĉu la kvereloj solveblas nur per milito?

– Finfine, jes.

– Do la militoj necesas?

– Mi ne meditis prie, sed eble jes.

La sinjorino turnas sin al la dekstre sidanto:

– Kaj viaopinie?

– Laŭ mi oni ne povas diskuti pri tio. La risorto de ĉiuj evoluoj estas la milito. Ankaŭ lerneje oni ja instruas tion: paco ne ekzistas, lerneje oni instruas nur pri militoj.

La sinjorino demandas denove la plej aĝan:

– Ĉu vi prijuĝas negative la soldatojn?

– Neniel, sinjorino, mi ne estas pacifisto.

– Kaj vi – ŝi demandas la mezan.

– Ankaŭ mi ne estas pacifisto. Oni eksigus min, se mi estus pacifisto.

– Do kial vi volis aresti min?

– Ĉar ni ricevis ordonon.

– Kaj se vi ricevos kontraŭan ordonon, ĉu ankaŭ tiun vi plenumos?

– Jes.

La sinjorino stariĝas:

– Mi finis, forkonduku ilin! – li diras al la du solduloj. Tiuj elkondukas la tri oficirojn el la ĉambro.

La prokuroro elpaŝas el post la ekrano:

– Ili ne kaŭzis al mi surprizon. Mi kredis, vi montros ion pli interesan. Cetere ni diskutas ne pri milito.

– Sed?

– Pri milito, ludata en paco.

– Ĉu vi scias, kio estas la esenco de ĉi tiu ludo?

– Multa mono.

– Vi komprenas nenion.

– Klarigu la aferon, eble mi komprenos ĝin.

– Vi kredas, ĉu ne, ke ni celas la instinktojn de agresemo?

– Mi kredas, ja tio evidentas.

– Vi eraras, ĉi tiu ludo servas kiel rimedo de socia liberigo, antipodas diagonale al la soldateca spirito, militemo. Volontuloj venas ĉi tien, kontraktas por kvardek ok horoj, okazas al ili ĉio, kio povas okazi en milito. La esenco de la ludo estas liberigo kaj redivido de nediferencitaj streĉoj. Mia ludo reĝustigas la moralan klimaton, perdigas enuon…

– Ĉu vi kredas, vi sukcesis fari kion ajn kontraŭ la milita organismo, la militoj mem?

– Jes.

– Naiveco. Mi ne volas eniri diskuton kun vi, sed permesu al mi kvalifiki vian defendon ridinda. Vi asertas, ke per individuaj agoj vi povas krei la funkcion, anstataŭantan la militon.

– Tion mi asertas.

– Ĉu vi scias, kiom oni elspezas ĉiujare por militaj celoj en la mondo?

– Ducent miliardojn.

– Ĉu vi scias ankaŭ, kian ekonomian sencon havas ĉi tiu giganta malŝparado?

– Kredu min, ankaŭ mi kutimas legi. Ĝi stabiligas la evoluon de la ekonomio, efikas katalize, eksterstaras la sferojn de aĉeto kaj oferto.

– Vi komencis senperspektivan entreprenon, ne ekzistas surogata funkcio…

– Mi estas konvinkita, ke la disvastigo de nia ludsistemo, post ĝia certa demokratiiĝo febligus, eble ĉesigus la plej gravajn motivojn de la milito, mi dirus, kreus la moralan konformaĵon, ekvivalenton de la milito. Pripensu nur, kiu enuas, venas memvole, devigata de neniu, faras ĝin dum du tagoj, ripetas ĝin, kiam ajn li volas…

– Por dek kvin mil doloroj.

– Pri tio mi diris, ke necesus certa demokratiigo. Oni devas malpliigi la elspezojn, ĉi-okaze la prezoj malaltigeblas.

– Vi prenas nur psikologiajn faktorojn en kalkulon. Pli frue mi jam menciis la ekonomian funkcion. Sed krom ĝi ekzistas pli grava: la politika. La „nacia” ekzisto postulas certan sinteron, rilaton al aliaj „nacioj”, ĉi tiuj sinteno kaj rilatoj nomiĝas ekstera politiko. Sed la ekstera politiko de „nacio” posedas nenian realan enhavon, se ĝi ne disponas tiujn rimedojn, per kies helpo ĝi povas validigi sin kontraŭ la ceteraj „nacioj”. Kaj ĝi povos tion nur, se por atingo de ĉi tiu celo ĝi povas minaci per ekuzo de forta milita organismo, ĉu ne?

– Mi vidas, vi preparis vin.

– Permesu al mi daŭrigi kaj klarigi, kial estas vivdanĝera, kion vi faras.

– Diru, mi scivolas.

– Sennombraj ekzemploj el la historio montras: reĝimoj, kiuj sekve de agadoj de diversaj privatinteresaj fortoj ne povis konservi la sugeston de milita danĝero kaj sian militan organismon, diseriĝis. Viaj konceptoj sekvigus plenan socian malintegriĝon. Militoj preventeblas ne per diserigo, sed nur per la demonstrado de forto.

– Mi volas ne diserigi. Ni kunskribis ĉiujn riĉajn familiojn de la mondo. Plejparte ĉi tiuj familioj direktas la grandan politikon. Se oni sukcesos elimini la agresemon el ĉi tiu gvida tavolo…

– Naiva idealismo. Kaj kio pri komunistoj kaj ceteraj potencialaj renversemaj elementoj? Ĉu ne la militistaro estas la plej taŭga kontrola, restrikta instanco?

– Ĉu ne policon vi volis diri?

– Polico estas militistaro, organizita kontraŭ internaj malamikoj.

– Mia ludo…

– Via ludo estas malintegra, febligas la koherigajn fortojn de la socio, estas patologia, damaĝa, peka.

– Mi ne povas diskuti kun vi.

– Ja ne necese. Taskas al mi, ne diskuti kun vi pri filozofio, sed plenumi la mandaton, ricevitan de la enketa juĝisto kaj eskorti vin al Kortena.

– Provizore la armilojn tenas ni en la manoj.

– Vi tre bone scias, niaj ŝtatsekuraj fortoj forbalaas vin en dudek kvar horoj disde la surfaco de la tero.

– Kune kun vi.

– Mi postulas, ordonu al viaj solduloj, redoni la forprenitajn armilojn al la policanoj!

– Kompreneble, ni ja nur ludis.

– Donu instrukciojn, sinjorino! La sinjorino ridetas:

– Vi estas mia homo. Ankaŭ ĝis nun mi trankvilis, sed nun vi konvinkis min definitive, ni bezonas timi nenion. Kaj cetere la Societo starigos tiajn atestantojn kaj ekspertizistojn en la proceso, per kies helpo ni certe gajnos ĝin. Venu, ni kuniru en la korton, mi donos instrukciojn. Malgraŭ ĉio vi ne koleras min, ĉu? La prokuroro ridetas:

– Mi nur plenumas mian devon.

Ili elpaŝas en la korton, intermiksiĝas kun la gastoj kaj solduloj. La sinjorino manvokas al si Narviks:

– Knaboj, redonu la armilojn al la policanoj! – ŝi vokas.

Tiuj redonas la armilojn al la policanoj, manpremas reciproke, ridetante interparoliĝas.

La sinjorino alparolas la gastojn:

– Gesinjoroj, mi petas vian pardonon pro la hodiaŭa incidento, sed mi esperas, estonte nenio simila okazos, kaj vi povos senĝene, agrable amuziĝi en la instalaĵoj de la Societo. Se vi estos asignitaj, mi petas vin, aperi, ni ja bezonas ĉiun veran ateston.

La gastoj direktas sin rapidpaŝe al siaj aŭtoj.

Grandaj policaŭtoj aperas retroire en la korto, la solduloj ridante ensaltadas, sidiĝas apud la policanoj sur longaj benkoj.

La veturiloj ekruliĝas.

La sinjorino sidiĝas apud la prokuroro en la polica ĵipo, ankaŭ ili ekveturas.

10

La ĵipo kun la sinjorino kaj la prokuroro venas inter la grandajn policaŭtojn.

La radiotelefono disaŭdigas rapidritman dancmuzikon. La muziko abrupte ĉesas, vira voĉo aŭdiĝas:

– Ĉi tie Falko, ĉi tie Falko, vokas Kolombon.

La policisto, sidanta apud la ŝoforo, manipulas la aparaton, iom forturnas ĝian butonon, respondas:

– Ĉi tie Kolombo, ĉi tie Kolombo, mi ricevas vian sendon.

– Haltu ĉe la kilometroŝtono 32. La tuta taĉmento haltu ĉe la kilometroŝtono 32. Fino.

– Mi ricevis vian sendon. Komprenis ĝin. Fino.

La muziko denove eksonas kaj post ioma tempo ĉesas.

– Ĉi tie Falko, ĉi tie Falko, al Kolombo. Restis nur tricent metroj ĝis la kilometroŝtono 32. Fino – diras la antaŭa vira voĉo.

– Mi komprenis. Fino.

Denove sonas muziko. La fronto de la taĉmento atingas la kilometroŝtonon 32.

Raŭpveturiloj de armea trupo staras survoje, vojrande. La policaŭtoj haltas, nur la ĵipo pluveturas pasrapide sur la vojo. Terenkolora amfibia komandveturilo staras en la vojkruciĝo. Juna majoro kun energia vizaĝo saltas el ĝi, iras al la prokuroro:

– Saluton!

La ĵipo haltas.

– Saluton. Kion tio signifas? Mi petas vin... – demandas la prokuroro.

– Laŭ speciala ordono de la ministerio pri militaferoj ni plueskortu ilin. Jen la teleksordono, bonvolu.

Li montras malhelbluan paperstrion.

– Kaj nun kion mi faru? – demandas la prokuroro incitite.

– Estas ordonite, ke la polico retiriĝu en la kazernon, kaj koncerne vin, la ĉefprokurorejo petas vin, ankoraŭ hodiaŭ raporti pri tio, kion vi faris.

La prokuroro kaj la sinjorino elĵipiĝas.

– Mi ne trovas ĝustaj tiajn krucinstrukciojn, tielan enmiksiĝon de la armeo en civilaferojn.

– Ja, amiko, tielas la vivo. Cetere ni ja servas la saman patrujon.

La majoro rigardas sian horloĝon, kvazaŭ la tempo lin urĝus:

– Mi kredas, vi povas ekveturi – li diras seke.

– Mi prezentas al vi la s-ron majoro. Li estas la milita komandanto de la distrikto – diras la prokuroro al la sinjorino.

La majoro premas la manon al ŝi, riverencas:

– Majoro Makros, mi tre ĝojas. Vi povas ekveturi, mi petas vin.

La prokuroro paŝas senvorte en la ĵipon, ĝi ekiras returne al la policaj veturiloj.

Ŝtalkaskaj soldatoj en terenkoloraj manteloj elaŭtigas la soldulojn, ĉirkaŭas kaj eskortas ilin direkte al la arbaro.

– La policaj veturiloj kaj la ĵipo de la prokuroro direktas sin al la urbo.

La majoro okulsekvas la scenon, ektuŝas poste la brakon de la sinjorino:

– Ankaŭ ni povus ekveturi.

– Kial? Kien oni veturigos min?

– Sinjorino, bedaŭrinde mi devas komuniki al vi, restis al vi nur dek minutoj.

– Mi ne komprenas vin.

– Restis dek minutoj el via vivo.

– Ĉu vi volas min mortigi?

– Ankaŭ tiel oni povus sin esprimi. Mi ricevis la ordonon, ke vivaj vi ne povas veni en la urbon.

– Sed kial?

– Ordonojn oni neniam motivas, sed mi povas diri al vi mian personan opinion. Kion vi faris, estas funde nova ideo. Kaj profunda, kaj filozofia, eble vi eĉ ne sciis, kiom tia...

– La Societo defendos min.

– Ne ŝercu, la Societo jam delonge rezignis pri vi. Hieraŭ la ministerio pri militaferoj reaĉetis la fortreson.

– Mi ne komprenas, kion vi volas. Ĉu vi volas daŭrigi la aferon ali-

maniere? Ni povas fari ĝin ankaŭ alimaniere. Se vi ne volas kun la Socieeto, mi povas organizi tion ankaŭ sola. Diru nur, kiel vi volas tion.

– Mi nur plenumas ordonon, sed laŭ mia persona opinio kaj ĝisnunaj spertoj homo, kiu faras longe unu aferon, rigidiĝas. Por novaj taskoj, esencaj ŝanĝoj bezonatas novaj homoj.

– Tio ne veras. Mi povas ĉion. Vi povas informiĝi prie, mi kapablas organizi ĉion. Vi ne gajnos, se vi mortigos min. Vi povus utiligi min, utiligi por kio ajn. Mi kapablas fari ĉion. Diru kion, mi faros ajnon.

– Mi komprenas vin. Kiel vi interrilatas kun la solduloj? Ĉu ili ŝatas vin?

– Ili adoras min.

– Kiom ili opas?

– Kvardek kvar.

– Por kiom da tempo vi dungis ilin?

– Por du jaroj.

– Kiom ili perlaboras?

– Ĉu kune?

– Jes.

– Unu kaj duonmilionon.

– Mi komprenas. Laŭ via opinio, ĉu ili pretus starigi sin en la servon de la greka ŝtato?

– Mi persvados ilin.

– Ili venus en la etaton de la sepa, speciala departemento de la militafera ministerio.

– Diru, kion vi volas? Kion vi deziras de mi? Mi laŭfaros ĉion. Diru nur, kio farendas!

– Mi kredas, mi povos aranĝi la aferon. La militafera ministerio transprenos la fortreson kaj intencas instruigi tie specialan trupon kontraŭ komunistoj kaj gerilanoj. Ni pensis pri tio, ke ni transprenos vin kaj la soldulojn en la etaton de la armeo, vin kiel organizanton en rango de kapitano, la soldulojn kiel instruktorojn en leŭtenanta rango kun plialtigita salajro. Ĉu vi kapablas fari tion?

– Mi faros tion.

– Ĉu mi povas fidi vin koncerne la soldulojn?

– Mi estas en via mano.

– Prave. Dankon, jen kion mi volis.

– Kial vi faris kun mi ĉi tiun ludon?

– Necesis, ni kredis, vi profetas kontraŭ militoj. Ni volis elprovi vian flekseblecon.

– Mi komprenas. Estis sufiĉe kruda testo.

– Se mi ĝuste scias, ankaŭ vi ne aplikis pli mildajn.

– Povas esti.

– Cetere mi estos la komandanto de la militinstrua tendaro.

– Kaj la prokuroro?

– Se iu el la solduloj hezitos, ni transdonos tiun al li. Murdo punatas ĉi tie sufiĉe dure.

– La soldulojn konfidu al mi.

– En ordo. Tiam ni reiru nun en la fortreson, ni ĉirkaŭrigardu, babilu kun la solduloj. Mi pensas, vi konsentas kun mi.

– Jes.

– Tiom pli, ke vi estos unu el miaj anstataŭantoj.

– Dankon, s-ro majoro.

– Ne danku, mi opinias vin eminenta organizanto, ni bezonas vin. Kiel oni nomas la estron de la solduloj?

– Majoro Narviks.

– Narviks. Ĉu norvego?

– Ekde hodiaŭ greko.

– Mi komprenas. Do ek, sinjorino!

Fino

Gyula Hernádi (1926-2005): devenas el intelektula familio. Li studis medicinon, sed devis enarmeiiĝi, El la kaptiteco en Krimeo li revenis en 1947, faris diversajn studojn, fine li trovis sian alvokiĝon en teatro kaj literaturo. Kiel verkisto li debutis en 1955 kun poemoj, noveloj, romanoj. Li famiĝis per siaj scenaroj por la reĝisoro Miklós Jancsó.

La fortreso estas forlasita milita komplekso defenda, kiun privata societo aĉetis kaj aranĝas en ĝi versimilajn militajn ludojn por splenaj milionuloj kontraŭ veraj solduloj kun eblo mortigi kaj morti, travivi militkaptitecon. Post unu tia ludo la societanoj estas arestitaj kaj kondamnotaj, sed la ŝtato intervenas.

* * *

Dobrovsky turnas sin al la senkonsile starantaj, palaj ludantoj:
– Gekamaradoj, unue mi petas du volontulojn, kiuj rigardos la viktimojn. Se eblas helpo, ili bandaĝu kaj alportu ilin, se mortintaj, lasu ilin surloke. Ĉi tri kadavrojn ni portu malantaŭ la altaĵon. Kiuj memvolas?
Hayan kaj Pekkinen elpaŝas, prenas al si du sanitarajn pakojn kaj ekrampas direkte al la fortreso.
Dobrovsky prenas la kadavron de Sorensen, tiras ĝin malantaŭ la altaĵon, singarde metas lian kapon sur la herbon. Serantoni kaj Soltersky kuŝigas Katharson kaj Tunnel apud Sorensen.
Dobrovsky revenas, demandas per trankvila voĉo:
– Gekamaradoj, ĉu neniu vundiĝis inter vi?
– Neniu – respondas f-ino Neudorf.
– Ega bonŝanco. Ĉi tiu frenezulo estis kondukanta nin en memmortigon.
– Kial vi lasis tion? – demandas la knabino.
– Mi ne scias, estis nura paneo. Ankaŭ vi ne oponis.
– Mi ankoraŭ ne militis.
– Vi pravas, estis senpripense. Vi aŭdis, kion la dungito de la Societo diris, ne eblas fini la batalon, ni devas ĝin daŭrigi. Ni devas trovi efikan, saĝan solvon, alie ili mortigos nin.